



EL POPOLO CINO

人民中国报道

2

1970

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Utiligu la antikvajn en
servo al la nuntempo,
utiligu la fremdlandajn
en servo al Ĉinio.

Kune floru cent floroj,
forigu la oldajn por
elŝovi la novajn.



Mi bone scias, ke survoje trovas sin danĝeroj, sed spite tion mi antaŭen marŝos kun kuraĝo. El la kvara sceno de la revolucia moderna pekin-opero "Sagaca Kaptio de la Tigra Monto": Šaŭ Gianbo (dekstre) kaj Jang Zijong (maldekstre) studas militan projekton por sagace kapti la Tigran Monton.



El la unua sceno: regimento partia komitato de iu trupo de ĈPLA, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "fandi solidan bazlokon en la Nordoriento", organizis persekutan taĉmenton por mobilizi la amasojn, ekstermi banditarojn en la regiono de Mudan-rivero kaj firmigi la postfronton, kunagante kun la kampa armeo por grandkvante ekstermi vivfortojn de Ĉiang Kajšek.

La plotonestro de rekognosko Jang Zijong (meze) raportas al la regimento stabestro Ŝaŭ Gianbo (maldekstre) aktivadon de la bandito Vulturo.

Heroojn Verajn Oni Trovas Tamen Nur en la Tempo Nuna

—Laŭdo pri la Modlado de la Heroa Figuro de Jang Zijong en la Revolucia Modela Pekinopero *Sagaca Kupto de la Tigra Monto*

LA revolucia modela pekinopero *Sagaca Kupto de la Tigra Monto*, kiu estas prilaborita per ripetada forĝado por atingi ĉiam pli altan perfektecon, signas la altan ideologian nivelon kaj brilan sukceson en arto de revoluciaj modelaj teatraĵoj. Kvazaŭ ruĝa batalstandardo, ĝi stimulas la batalvolon de la vastaj amasoj de la revolucia popolo kaj kuraĝigas ilin batali por efektiviĝi plenepleksan diktaturon de la proletaro super la burĝaro en la sferoj de superstrukturo.

La literatura kaj arta revolucio de la proletaro, kun la brila atingado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj kiel signo, estas grava konsistiga parto de la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando. Ĝi ne similas al la burĝara Renesanco, kiu anstataŭigis unu ekspluatantan sistemon per alia, nek al la burĝara Kle-

riga Movado, kiu ne tuŝis la ekspluatantan sistemon mem, nek al la Movado de 4 Majo, kies enhavo estis opono kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. La revoluciaj modelaj teatraĵoj, kiujn persone flegis la estimata kaj kara kamaradino Giang King, starigis figurojn de proletaraj herooj neniam aperintajn en la historio, forpelis la reprezentantojn de bienuloj kaj burĝoj, kiuj ĉiam superregis la scenejon dum pli ol mil jaroj, kaj igis la verajn mastrojn de la historio ekokupi la sferon de literaturo kaj arto, kaj tiel komenciĝis la nova erao de la historio de literaturo kaj arto.

Jang Zijong, la heroo de la revolucia modela pekinopero *Sagaca Kupto de la Tigra Monto*, estas tipo de proletaraj herooj modlita per la mondkoncepto kaj arta metodo de la proletaro.

TIPO DE HEROOJ DE LA PROLETARO

En historio, por firmigi sian regadon, ĉiuj ekspluataj klasoj, ĉiam per literaturaj kaj artaj rimedoj, prikantis siajn reprezentantojn priskribante kaj beligante ilin kiel “mondsavantojn” kaj “heroojn”, dum ili traktis la laborantan popolon, kiu estas vera kreanto de la monda historio, kiel rekrementon. Nun, ni devas reinversigi la historion, kiun inversigis la ekspluataj klasoj, kaj klopodi por modli figurojn de proletaraj herooj en la literatura kaj arta tereno de socialismo per la artaj metodoj de la proletaro por firmigi la diktaturon de la proletaro.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Revoluciaj literaturo kaj arto devas krei diversajn karakterojn laŭ la reala vivo por helpi la popolon antaŭenpuŝi la historion.”** La plej elstara punkto de la brila atingo de la revolucia modela pekinopero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estas ĝuste tio, ke ĝi sukcese modlis tute novan tipon de proletara heroo en la persono de Jang Zijong. En la lastaj kelkaj jaroj la nomo Jang Zijong jam fariĝis simbolo de fideleco, kuraĝeco kaj saĝo de proletoj kaj profunde gravuriĝis en la koro de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La imponaj versoj, kiaj: “Kompartiano sekvas la alvokon de l’ Parti’ en faroj kaj prenas sur sin ĉiam pezan taskon kun fervoro”, “Por ke jam flirtu ruĝaj flagoj tra la tuta mondo, sentime mi min ĵetus sur glav-monton aŭ en fajran maron” kaj “Kontraŭ frost’ mi maten-sunon havas en la koro”, jam disvastiĝis inter ili kiel ĵuroj stimulantaj la batalvolon de la revolucia popolo. Jang Zijong, la heroa figuro de la proletaro, kiu disradias brilon de Maŭzedongpenso, fariĝis giganta spirita forto kuraĝiganta la revolucion popolon marŝi antaŭen.

Jang Zijong estas rekognoskisto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Liaj batalspertoj forĝis por li karakteron penseman, sagacan, kuraĝan kaj spritan. Sed tio estas nur unu flanko de lia karaktero. Se oni priskribus lin nur el tio emfazante sole la “aventurecon” de la intrigo kaj lian personan talenton, tio distordus la figuron de la heroo, kiel jam okazis antaŭe en multaj teatraĵoj kaj filmoj. Laŭ la instrukcio de kamaradino Giang King, sur la bazo de profunda kompreno pri la heroo, la Teatra Grupo de *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* donis, de la komenco ĝis la fino, sian atenton por elmontri la altan politikan konscion de tiu revolucia batalanto

de la proletaro kaj priskribis kun granda energio la klasan naturon de la heroo, kiu devenas de familio de dungita kamplaboristo kaj havas amaran familian historion en la malnova socio: lian senliman fidelecon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj lian sinceran klasan amon al la popolamasoj. Pere de la priskribo de la proletaraj kvalitoj de la heroa figuro de Jang Zijong, la opero faris lin reprezentanto de sennombraj herooj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en arto.

La opero ne nur priskribas la altajn saĝon kaj kuraĝon de Jang Zijong, sed ankaŭ profunde priskribas ilian profundan fonton, ke lia granda saĝo kaj granda kuraĝo venas de la nutrado de Maŭzedongpenso kaj de lia senlima fideleco al la popolamasoj. Tio estas plej emocie priskribata en la sceno “Demando pri Pasinta Sufero en Montaro”.

Dum sia spurado de la banditoj, Jang Zijong renkontis ĉasiston Ĉang. Ĉang ĵus trafis prirabadon de banditoj kaj estas suspekta al Jang, kiu nun aperas en militista uniformo, kvankam li rekonas ke Jang estas la “felkomercisto”, kiu savis lian infanon. Jang tuj identigis sian personon kaj propagandas al li la celon de nia armeo. Kiam Jang diris ke nia armeo venas en profundajn montojn, ĝuste por ekstermi la banditojn, la ĉasisto kaj lia filino, kiuj havas profundan malamon kontraŭ Vulturo, jam ne povas plu reteni sian emocion. Ĉang Baŭ, kiun ŝia patro “alivestis kiel knabon mutan”, ekakuzas kun larmoj la krimojn de Vulturo antaŭ la intimulo PLA-ano. La akuzado de Ĉang Baŭ plena de doloro kaj indigno en tiu sceno estas larmige kortuŝa, kaj tiu akuzo ardigas la indignon de Jang Zijong kaj elkondukas lian bravan ĵuron: “La subprematoj tra la mondo havas ja similan sufer-konton, kaj volas venĝi sin, ho venĝi sin — kaj pro verŝita sang’ postuli sangon!” Travivaĵojn, kiaj tiuj de la patro kaj filino Ĉang, Jang jam milfoje vidis aŭ aŭdis. Kaj ankaŭ lia propra vivo estas plena de sango kaj larmoj. Kiam li kun senlime profunda klasa amo de proletaro diras al Ĉang Baŭ, ke “La Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ subtenas nin!” li aludas ankaŭ pri si mem per la vorto “ni”. Li estas batalanto por liberigi la popolamasojn kaj samtempe mem estas unu inter ili. Li estas propagandisto por instigi la popolamasojn al batalo kaj samtempe mem estas edukata de ili. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ li efektivas la amasan disciplinon, zorgas la amasojn en suferoj, propagandas al la amasoj kaj faras enketon inter ili. La aferoj, kiujn li plenumas kiel rekognoska plotonestro, estas tiel ordinraj, sed dank’ al sia profunda prole-

tara sento, li kortuŝis "Dion", kiu estas neniu alia ol la vastaj popolamasoj. La popolamasoj prenas lin kiel sian karulon kaj informas lin pri ĉio, kion ili scias pri la banditoj, kaj tiel li ekhavas neelĉerpeblan fonton de saĝo. La sanga interligiteco, kiun li havas kun la popolamasoj, kaj lia elkorra fideleco al la Partio formas kombinite la firman bazon de lia maltimo antaŭ la malamikoj. En la sceno "Penetro en la Banditan Neston", li montras sin tiel aplomba kaj trankvila, pro ke "apude staras kvazaŭ l' tuta klasfrataro"; kaj li povas tiel senĝene kondukti antaŭ la ferocaj malamikoj, pro ke li "maten-sunon havas en la koro". En la sceno "Triumfa Renkontiĝo ĉe la Centkoka Festeno", la subita apero de Luan Ping puŝas Jang Zijong en tre danĝeran situacion, sed Jang montras neniom da timo antaŭ la danĝero kaj tute neglektas sian personan sekurecon. Malgraŭ ke Luan Ping minacas arogante kaj provas kompromiti lian vivon, li travidis la timeman klasnaturon de Luan Ping, kiu ne kuraĝas malkaŝi la fakton, ke li estis kaptita de nia armeo. Kaptante firme tiun lian vundpunkton, Jang Zijong turnis sian pasivecon en aktivecon kaj ŝanĝis malfavoran situacion en favoran. Li venkis la malamikon, triumfe renkontiĝis kun siaj kamaradoj ĉe la centkoka festeno, kaj ekstermis la bandon de Vulturo. Lia kuraĝo ne estas "persona riskemo" celanta profitojn de malmultaj homoj aŭ malgranda kolektivo, sed venas de lia senfina fideleco al la revolucio kaj popolo. Lia saĝo estas uzata ne en manovrado por ĉasi personajn profitojn kaj potencon, sed en ĝusta juĝo pri objektiva realo farita surbaze de enketado kaj esploro por ekstermi malamikojn en la interesoj de la klaso. Ĉio ĉi tio estas rezulto de la nutrado de Maŭzedongpenso.

Tiel en la nuna tempo kiel en la pasinteco, en la abundaj literaturaj kaj artaj verkoj, estas figuritaj multaj "saĝaj" kaj "kuraĝaj" personoj. Sed ĉu



Jang Zijong

estas iu tia tipo inter ili en arto, kia estas Jang Zijong, kiu servas tutkore kaj tutanime al la popolo, nedisigeble ligiĝas kun la laboranta popolo kaj havas la saĝon kaj kuraĝon de la proletaro? Ne, neniam. Jang Zijong estas reprezentanto de la sennombraj proletaraj herooj troviĝantaj en la reala vivo, la figuro de heroo armita per la granda Maŭzedongpenso kaj tute nova heroo tipo, kiu staras komplete kontraŭ la t. n. "herooj" de feŭda kaj burĝa klasoj priskribitaj en literaturaj kaj artaj verkoj ĝis nun. La apero de Jang Zijong en la *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* kaj la tipoj de herooj en la aliaj revoluciaj modelaj teatraĵoj enskribis novan ĉapitron en la historion de literaturo kaj arto de la homaro.

GRANDA HEROO FORĜITA EN GRANDA BATALO

Kiam Jang Zijong aperas en la opero, li jam estas maturiĝinta heroo de la proletaro. Lia alta figuro estas modlita de diversaj flankoj de lia rilato al la Partio, al liaj kamaradoj, al la amasoj kaj al la malamikoj. Se oni komparas lin kun granda arbo kun densa foliaro kaj profundaj radikoj, do la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la de ĝi kondukata granda revolucia batalo estas la fekunda kaj grasa grundo, kiu la arbon kreskigas. La modlado de la figuro de Jang Zijong estas farata sur la bazo de profunda priskribo pri la heroo batalo farata de tiu popola armeo. Pere de modlado de la heroo figuro de Jang Zijong, la opero varme prikantas la grandan popolan armeon; kaj pere de profunda priskribo pri tiu popola armeo, ĝi efike elstarigas la figuron de la proletara heroo Jang Zijong.

En la sceno "Planado pri Batalo", la pridemandado de Luan Ping kaj decido de batala plano estas gravaj ĉeneroj de la intrigo. Sed, en la ludado, kio nin forte impresas, estas la arda heroo fizionomio de la revolucia trupo. La antaŭvida kapablo de la komandanto, la aktiva batal fervoro de la batalantoj, la frata interrilato inter la superuloj kaj subuloj, la reciproka kuraĝigo inter la kunbatalantoj, la sufiĉa milita demokratio kaj la decida rolo de la partia gvido, ĉio ĉi tio impresas nin intime. "Kompartiano sekvas la alvokon de l' Parti" en faroj kaj prenas sur sin ĉiam pezan taskon kun fervoro" kaj "Mi bone scias, ke survoje trovas sin danĝeroj, sed spite tion mi des pli impetos kun kuraĝo." Tiuj kantpecoj de Jang Zijong plenaj de revolucia braveco elverŝas la koron de la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. La priskribo pri tiu popola armeo tre multe helpas nin kompreni heroon Jang Zijong. Absolute ne estas hazarde, ke Jang Zijong povas fari la mondskuajn heroaĵojn.

En la komenca periodo de la Liberiga Milito, laŭ la instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Fondi solidan bazlokon en la Nordoriento" kaj sub la rekta komando de Viceprezidanto Lin, nia Popola Liberiga Armeo en la Nordoriento sendis parton da trupoj por iri profunde en la kamparon kun la celo mobilizi la amasojn, elimini banditojn, firmigi la postfronton kaj frakasi atakojn de la usonĉiang-aj reakciuloj kunlabore kun la kampa armeo. La rakonto pri ekstermo de la obstinaj banditoj de Vulturo fare de nia persekuta taĉmento en profundaj montoj kaj malnovaj arbaroj, pri kiu

skribas la opero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto*, estas miniaturo de tiu granda batalo. Laŭ la instrukcio de kamaradino Giang King, la nomita Teatra Grupo serioze studis la tiaman militan situacion en la nordorienta batalkampo kaj la strategian principon de nia partio kaj profunde priskribis la fonon de epoko, en kiu la herooj troviĝis. Dank' al la viva priskribo de la tuta fono de la batalo, la heroo Jang Zijong estas metita en la grandioza kaj majesta bildo de popola milito kaj strikte kaj organike ligita kun la vasta tuto de la batalo.

Tiam, ekstermi la banditojn kaj mobilizi la amasojn estis du taskoj interligitaj. Sen mobilizo de la amasoj, nia armeo ne povis firme apogi sin, nek ekstermi la banditojn; kaj sen ekstermo de la banditoj la amasoj ne povis esti vere mobilizitaj. En la opero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* trakuras de la komenco ĝis la fino la ruĝa linio ke la Popola Liberiga Armeo mobilizas la amasojn kaj faras la militon sin apogante sur la amasoj. Post la sceno "Planado pri Batalo", la speciala tasko de enpenetro en la neston de la banditoj, kiun prenis sur sin sola Jang Zijong, kaj la tasko de la persekuta taĉmento iri al Giapi-valo kaj tie mobilizi la amasojn estas komencitaj samtempe kaj interplekte. La mobilizo de la amasoj fare de la persekuta taĉmento en Giapi-valo kaj la entuziasma sceno ke "la kamaradoj kaj popol' en foro jam pretas ekbatali je signalo kontraŭ l' banditaro" multe komprenigas al ni, kian rilaton havas la malfacila batalo de Jang Zijong en la nesto de la banditoj kun la sorto de la vastaj popolamasoj, kaj tiel plene elmontras la profundan signifon de la agado de Jang Zijong. La mobilizado de la amasoj fare de nia armeo kaj la animskuaj bataloj faritaj de Jang Zijong en la nesto de la banditoj interligiĝas kaj briligas reciproke, formante unuecan tuton. La komandanto de la taĉmento, fervoja laboristo Li Jongki kaj lia patrino, la ĉasisto Ĉang kaj lia filino Ĉang Baŭ kaj la batalantoj, kiuj arde deziras sin ĵeti en batalon, ĉiuj aktivantaj en tiuj scenoj aperas kun siaj apartaj trajtoj en la grandioza bildserio kaj forte elstarigas la heroan figuron de Jang Zijong.

Li Jongki, kiu entenas profundan malamon kontraŭ la malamiko kaj neniam vidis la Popolan Liberigan Armeon, havas personan sperton pri tio ke "kiel bandit' soldat' subpremas ĉiam la popolon" en la malnova socio, kaj li komence sintenas malamike al la karuloj PLA-anoj, kiam tiuj subite venas antaŭ lin. La batalantoj de PLA kuracas lian malanan patrinon kun plena amo de la proletaro. Tio turnas lin de singardemo al dubo kaj de dubo al pridemandado. Tuj kiam li komprenas, ke niaj batalantoj estas soldatoj de la popolo, kiuj batalas

“Por forekstermi la reakciulojn kaj transformi l’ mondon”, li nereteneble dronis en miksitaj ĝojo kaj doloro kaj prenas PLA-anojn kiel siajn intimojn, esprimante sian soifon sekvi la Komunistan Partion kaj partopreni la liberigan batalon: “Kiom ajn multas malfaciloj kaj danĝeroj, la Tigran Monton mi ja sturmos la unua por konkeri!” Krome, estas malgranda Ĉang Baŭ, kies avinon mortigis Vulturo kaj kies patrino sinmortigis sub lia premo, de ok jaroj atendas kaj atendadas la leviĝon de la suno super la profundaj montoj. Kiam la persekuta taĉmento venas al Giapi-valo kaj mobilizas la amasojn, la ĉasisteto, knabino alivestita en knabon tuj turniĝas en bravan batalantinon. En la antaŭvespero de atako kontraŭ la Tigra Monto kaj ekstermo de Vulturo, ŝi aktive petas pri partopreno de la batalo kun pafilo en la manoj: “Nepre partoprenos mi l’ batalon por plene forbalai l’ banditaron.” Tiel, samtempe kun la modlado de la heroa figuro de Jang Zijong, tio plene montras la rolon kaj pozicion de la popolamasoj en popola milito, prezentante la grandiozan bildon de amasa leviĝo de centmilionna subpremata popolo sub la brilo de Maŭzedongpenso. El la leviĝintaj popolamasoj formantaj revolucian torentegon aperas sennombraj heroaj, inter kiuj Jang Zijong estas nur tiu, kiu estas plej elstara kaj plej matura.

La modlado de Jang Zijong, la tipo de proletara heroo estas nedisigeble kombinita kun profunda priskribo de la granda epoko, kiu lin edukas. Tiu epoko ja estas nova epoko kun Maŭzedongpenso kiel sia granda standardo, en kiu la sunbrilo de Maŭzedongpenso prilumas, la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kondukas kaj la ŝtormoj de popola milito forĝas heroajn personojn. Kun tiu epoko neniuj aliaj epoko en la historio estas komparebla. Nur tiu epoko povas elkulturi tian grandan heroon kia Jang Zijong.

Per sia profunda ideologia enhavo kaj granda arta atingo, la revolucia modela pekinopero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto*, kiun persone flegas la estimata kaj amata kamaradino Giang King, starigis heroan figuron spegulantan la grandiozan batalon de la granda epoko kaj malfermis novan vastan mondon por la literaturo kaj arto de la proletaro.

KLARA PRINCIPO DE LA PROLETARA PARTIA SPIRITO

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo aŭ literaturo kaj arto apartenas

al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion. Fakte ne ekzistas tia afero, kiaj arto por arto, arto staranta super klasoj, arto paralela kun aŭ sendependa de politiko.” En la “Resumo de la Kunsido pri la Literatura kaj Arta Laboro en la Armeo, Kunvokita de Kamaradino Giang King laŭ la Komisio de Kamarado Lin Biaŭ” estas montrite: “Niaj literaturo kaj arto estas tiuj de la proletaro, de la Partio. La principo de proletara partia spirito estas la plej okulfrapa trajto, per kiu ni distingiĝas de aliaj klasoj.”

La revolucia modela pekinopero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* varme priklaras la proletaran heroon Jang Zijong sur klara starpunkto de la proletaro kaj kun forta proletara sento kaj malkovras la kruelan, ruzan, malsaĝan kaj putran naturon de klasaj malamikoj kun forta klasa malamo. Sub tiu akra kontrasto, Jang Zijong, tiu heroa figuro de la proletaro, donas al ni neforigeblan impreson.

Oni devas priskribi ankaŭ negativajn personojn, sen tiuj ne ekzistas kontraŭa flanko kaj ne eblas bone elstarigi la pozitivajn personojn. Sed, ĉu ni priskribu la kreantojn de la monda historio aŭ priskribu kaj lavumu la reakcian arogantecon de la malamikoj per la ĉefa spaco? Ĉu ni loku en la centron heroon aŭ negativajn personojn? Tio estas problemo de starpunkto, ĉu ni staru sur la flanko de la pozitivaj personoj aŭ tiu de la negativaj personoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**Oni priskribas ankaŭ negativajn personojn, sed tio servas nur kiel kontrasto por reliefigi la lumon de la tuto**”, la Teatra Grupo de la *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* antaŭ ĉio turnas sian atenton al elstarigo de heroaj personoj de la proletaro kaj al elstarigo de revoluciaj popolamasoj kaj priskribas ilian heroon temperamenton “**faligi ĉiujn malamikojn, sed neniam esti subigita de malamikoj**”. Dume, rilate al la negativaj personoj enĵetotaj en historian rubejon, kiaj Vulturo k. s., oni devas turni al ili rigardon malamikan, malŝatan kaj malestiman kaj malkovri ilian ekstere fortan sed interne sensukan naturon de papertigro baraktanta antaŭ morto.

La sceno “Mortigo de Tigro kaj Ascendo de la Monto” estas simpla epizodo, en kiu Jang Zijong respondas la pridemandojn de la banditoj kaj poste estas kondukata sur la monton, se oni rigardas ĝin nur el la vidpunkto de evoluo de la intrigo. Sed, kiel bone kaj kiel impone ĝi estas aranĝita en la opero! Jang Zijong, kiu portas sur si la esperon de la popolo, rajdas sur galopanta ĉevalo en montoj sub neĝado kaj elkantas sian heroan senton kaj noblan deziron de revolucia batalanto vizaĝe al la

multaj montoj: “Por ke jam flirtu ruĝaj flagoj tra la tuta mondo, sentime mi min ĵetus sur glav-monton aŭ en fajran maron. Mi deziregas, ke degeluj tuj jam la neĝeroj, ke nian mondon nun jam regu bela primavero!” La lirika kanto en akompano de vigla dancado plene prezentas al la publiko la altan spiritan mondon de la heroo antaŭ batalo. Tuj poste intermetiĝas la mortigo de tigro, tiel ke la potenco kaj braveco de Jang Zijong estas plie disvolvata, kaj tio tre bone servas kiel perono por profunde eniri en tigran kavernon. La mizeraĉa figuro de la alvenantaj banditoj, kiuj timeme rigardas la mortintan tigron kaj samtempe pridemandas Jang Zijong, formas akran kontraston al la heroeco de Jang Zijong ankoraŭ restanta post la mortigo de la tigro.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas ekzameni ĝian esencon kaj trakti ĝian aspekton nur kiel enkondukanton ĉe la sojlo.”** La literaturo kaj arto de la proletaro kaj Partio devas preni Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpenson kiel orientilon por observi la realan vivon kaj eltiri ĝian esencon, por profunde malkovri la esencon de aferoj, kiun oni ne povas facile vidi tra la eksteraj fenomenoj, kaj tiel unuigi kaj eduki la popolon kaj kuraĝigi ĝian batalspiriton. En la scenoj, en kiuj Jang Zijong batalas vidalvide kun la malamikoj, ni forte sentas la klaran principon de la proletara partia spirito kaj plej plenan disvolvon de la krea metodo de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko en la kreado de la revolucia modela pekinopero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto*.

En la sceno “Penetro en la Banditan Neston”, la banditoj estas multaj, sed Jang Zijong estas sola sen akompananto, kaj cetere aperas en la persono de Hu Biaŭ, bandito venanta por submetiĝi kiel dependulo. Laŭ aspekto, la malamikoj estas ŝajne “potencaj” kaj Jang Zijong estas senhelpa. Sed la esenco de la afero kaŝita sub la fenomenoj estas, ke la malamikoj, Vulturo kaj lia bando, estas vintraj muŝoj, kiuj estas profitavidaj kaj troviĝas en senlirejo, dum Jang Zijong estas proletara revolucia batalanto armata de Maŭzedongpensoj kaj havas post si vastajn popolamasojn kiel subtenantojn. Ĉu oni priskribu la eksterajn fenomenojn laŭ la vidpunkto de la burĝaro, aŭ malkovru la esencon de la batalo

laŭ la vidpunkto de la proletaro, tio estas du tute kontraŭaj linioj en literatura kaj arta kreado. La kontraŭrevoluciaj reviziistoj klopodis lavumi la “imponecon” de Vulturo kaj emfazi la “banditan karakteron” de Jang Zijong por detrui tiun revolucionan modelan operon, sed tiu maĥinacio hontinde fiaskis. En la priskribado de la fenomeno de “prezento de mapo” fare de Jang Zijong ŝajniganta sin Hu Biaŭ, la opero igas la spektatorojn ĉiam senti ke Jang Zijong estas proletara heroo kaj la malamikoj estas malfortaj, malgrandaj kaj nemenciindaj. Tiu brila priskribo profunde spegulas la esencon de la afero, elmontras la spiritajn fizionomiojn de personoj de du antagonismaj klasoj kaj enkorpiĝas la deziron kaj postulon de la proletaro.

Ĉiuj ideoj kaj ĉiuj projektoj de la tuta verko de la revolucia modela pekinopero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* estas rigore bazitaj sur la reala vivo, sed la vivo de ĝi spegulita ne estas ordinara reala vivo. **“La vivo spegulita en literaturaj kaj artaj verkoj, kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da univertsaleco.”** Sekvante la revolucionan literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, la Teatra Grupo de la *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* modlis la brilan figuron de la proletara heroo Jang Zijong per la krea metodo de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko. La opero ĝisfunde diferencigas sin de la malnova literaturo kaj malnova arto de ĉiuj ekspluatitaj klasoj, ne nur per sia tute nova ĉefrolulo kaj tute novaj temoj kaj subjektmaterialo, sed ankaŭ per tute nova krea metodo.

La revolucia modela pekinopero *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* starigis por ni elstaran modelon en modlado de figuro de proletara heroo kaj en la batalo, kritiko kaj reformo de la literatura kaj arta fronto. Ĝi estas grava signo ke nia literatura kaj arta revolucio eniris en novan etapon. La brila figuro de la heroo Jang Zijong nepre kuraĝigos nin en la grandioza mondrenversa batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo. La granda spirita forto nepre turniĝos en grandan materian forton.

“Heroojn verajn oni trovas tamen nur en la tempo nuna.”

En Klopodado Modli la Brilajn Figurojn de Herooj de la Proletaro

— Kelka sperto en modlado de heroaj figuroj
de Jang Zijong k. a.

Teatra Grupo de *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*
de la Ŝanhaja Pekinopera Trupo

SUB la direktado de la granda ruĝa standardo de Maŭzedongpenso, la revolucia moderna pekinopero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estis refoje polurita por atingi pli grandan perfektecon kaj estis prezentita al la publiko kun pli granda potenco kaj imponeco.

Jam pasis 11 jaroj, de kiam tiu teatraĵo estis verkita kaj prezentita. Sed ĝi ricevis sian veran vivon nur en la postaj 7 jaroj, dum kiuj ĝi estis reviziata sub la rekta gvido kaj partopreno de kamaradino Giang King, t. e. dum la brilaj jaroj plenaj de akraj klasbataloj, de la komenco de 1963 ĝis la nunaj tagoj.

En la meza tagdeko de januaro 1963, kiam kamaradino Giang King faris enketadon kaj esploradon pri literatura kaj arta rondo, ŝi trovis tiun teatraĵon en Ŝanhajo kaj tuj rimarkis, ke en ĝi troviĝas sufiĉe multa rekremento. Tamen, ŝi samtempe rimarkis ke en ia senco ĝi liveras eblecon al pekina opero prezenti modernan vivon, sekve, ŝi decidis

fari al ĝi ĝisfundan transformon. De tiam la teatraĵo kaj la operspeco reprezentata de ĝi iom post iom surpaŝis la revolucian vojon montritan de Maŭzedongpenso. Kaj ankaŭ de tiam la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia kompanio komencis furiozajn atakojn kaj ĉiamanieran subfoson kontraŭ tiu teatraĵo kaj la revolucio en la pekina opero.

Tiu batalo manifestiĝis en multaj aspektoj. Estis batalo inter la persista sekvado de la proletara literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj opono kontraŭ tiu linio. Estis batalo por gajni al si la literaturajn kaj artajn trupojn inter la proletara komandejo estrata de Prezidanto Maŭ kaj la burĝara komandejo estrata de Liu Ŝaŭki. Rilate al arta penso estis batalo kontraŭ la eraraj tendencoj, kiaj konservativeco kaj adoro al la fremdlandaj, por persisti pri la principoj “**Utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” kaj “**forigi la oldajn por elŝovi**

la novajn”, kaj pri la metodo de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko. Rilate al kreado, la plej elstara punkto, kiu estis ankaŭ la fokuso de plej intensa batalado, estis la problemo de modlado de la figuro de ĉefa heroo.

La penso de la temo estas enkorpigita en la figuroj de personoj. Kaj ankaŭ la intrigo, komponado k. a. estas aranĝitaj ĉirkaŭ personoj, inter kiuj la ĉefa persono servas kiel akso. Kia persono rolas kiel la ĉefa persono, tio signas, kiu klaso superregas la scenejon kaj de kiu klaso la reprezentanto fariĝas la mastro de la scenejo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: “Se vi estas burĝara literaturisto aŭ artisto, vi pri-kantas ne la proletaron sed la burĝaron; se vi estas proletara literaturisto aŭ artisto, vi pri-kantas ne la burĝaron sed la proletaron kaj la laborantan popolon: unu el la du kazoj devas esti.” Tiu profunda marksism-leninisma tezo montras la bazan diferencon, laŭ klasa esenco kaj ankaŭ laŭ arta esenco, inter la literaturo kaj arto de la proletaro kaj tiuj de la burĝaro de ĉiuj epokoj. La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj Ĝoŭ Jang k. s. kontraŭrevoluciaj elementoj, ĉiurimede pri-kantis kaj laŭdis la literaturajn kaj artajn verkojn, kiuj beligas la burĝaron, kaj oponis kontraŭ modlado de figuroj de herooj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la scenejo, lasante ĉiuspecajn diablojn kaj demonojn praktiki sur la scenejo diktaturon super la proletaro kaj la laboranta popolo. Por ke la literaturo kaj arto de la proletaro povu vere starigi sur la scenejo figurojn de herooj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ilin pri-kanti, ekstreme akraj kaj malfacilaj bataloj estis neeviteblaj.

Sub la direktado de la proletara literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, ni frakasis diversajn intrigojn de klasaj malamikoj, kritikis ĉiajn absurdajn asertojn de ili distrustetitajn, kaj modlis la brilajn figurojn de herooj de la proletaro Jang Zijong kaj aliaj per la metodo de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko en kreado. Tiuj herooj figuroj ne prezentas iujn konkretajn personojn en la vivo sed koncentritajn tipojn de miloj kaj dekmiloj da herooj aperintaj en revoluciaj bataloj. Kiel tipo, ilia vivo, “**kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da universaleco**”. La heroo figuro de Jang Zijong en la *Sagaca Kupto de la Tigra Monto* estas senprecedenca brila tipo en la arta historio de la homaro; ĝi estas komunisma batalanto brave luktanta

por ĝisfunde ekstermi ĉian ekspluatan klason kaj ekspluatan sistemon, estas potenca batalilo por solidigi la proletaran diktaturon kaj giganta forto por “**helpi la popolon antaŭenpuŝi la historion**”.

Sube ni koncentre preparolos kelkajn punktojn el nia sperto en modlado de la heroo figuro de Jang Zijong.

DE DIVERSAJ FLANKOJ MODLI LA BRILAN FIGURON DE LA PROLETARA HEROO PER LA METODO DE KOMBINO DE REVOLUCIA REALISMO KAJ REVOLUCIA ROMANTIKO KAJ TRA LA VOJO ĈEFE MALKOVRI LA INTERNAN MONDON DE LA PERSONO

Kiel modli la figuron de proletara heroo alte, sukplene kaj brile estas la plej grava politika tasko staranta antaŭ ni kaj estas nova tasko en la literatura kaj arta revolucio de la proletaro. En tio troviĝas la baza diferenco de la literaturo kaj arto de la proletaro dis de tiuj de ĉiuj ekspluatataj klasoj, inkluzive tiujn de burĝaraj Renesanco, Kleriga Movado kaj kritika realismo en la 19-a jarcento.

Por atingi tion oni devas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ, apliki la metodon de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko, meti la heroon en tipan medion de klasbatalo de la revolucio de la koncerna historia epoko, de diversaj flankoj malkovri plene kaj profunde la klasajn kvalitojn enkorpigitaĵojn en lia mondkoncepto, ideologio, stilo, karaktero kaj temperamento, montri lian altan politikan konscion kaj la komunisman brilon de lia interna mondo. Kaj ni aplikis tiun artan metodon de la proletaro en modlado de figuro de la proletara heroo Jang Zijong en la nomita opero.

Jang Zijong estas heroo-rekognoskisto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo armita per Maŭzedongpenso kaj havanta revoluciajn saĝon kaj kuraĝon de revolucia proletaro. En la opero, pere de ĉiuj ĉeneroj de la intrigo, ni koncentris ĉiujn fortojn por modli tiun heroan figuron, aplikante la diversajn artajn rimedojn de literaturo, muziko, danco, prezentarto kaj dekoracio. Ni firme kaptis kelkajn ĉefajn flankojn, nome: lian profundan klasan amon al siaj superuloj, kolegoj kaj al la laboranta popolo kaj ankaŭ lian fortan klasan malamon kontraŭ la usona imperiismo, Ĉiang-kliko, banditoj kaj ĉiuj klasaj malamikoj;

lian firman revolucian volon ekstermi la lakeojn de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek, la bandon de Vulturo kaj ankaŭ lian grandiozan idealon pri revolucio; koncerne al lia idealo, lian idealon pri la ĉina revolucio kaj ankaŭ tiun pri la monda revolucio; koncerne al lia temperamento, lian ĉiele altan bravecon kaj ankaŭ lian karakteron de nekonsternebla flegmo, subtileco kaj sagaco. Kaj ĉiuj tiuj aspektoj estas firme ligitaj kun la baza punkto, la animo de tiu heroo, kiu “maten-sunon havas en la koro”, — senlima fideleco el la tuta koro al Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenso. Tiel, stariĝas antaŭ ni Jang Zijong kiel giganta proletara revolucia heroo havanta senlime vastan horizonton kaj proletaran spiriton de ĝisfunda revolucio kaj ĉie elstariganta la politikon de la proletaro — en brila figuro ne nur alta sed ankaŭ sukplena.

En modlado de figuro, la vojo kiun ni sekvis, tute diferencas de tiu sekvata de la origina scenaro¹. El sia reakcia politika celo, plenumo da reprezentantoj de la burĝaro ĉiurimede klopodis por nigri Jang Zijong en la origina scenaro. Sub la ŝildo de la teorio de “priskribo de la vero”, ili senkaŝe kriaĉis por elstarigi “impertinentecon, aŭdacon kaj krudecon” aŭ t. n. “banditan temperamenton” ĉe Jang Zijong, lasis lin zumi flavajn ariojn dum sia irado al la monto, amindumi kun Rozo, la adoptita filino de Vulturo, rakonti senbride trivialajn historiojn, ... tiel ke Jang Zijong estis modlita en vaganton plenan de bandita temperamento kaj kun ĵargonaĵoj en ĉiuj frazoj, en aventuriston riskeman kaj stultan. Tia figuro estas precize vivanta tipo por la aventurema kaj militarisma reakcia milita linio de Liu Ŝaŭki!

Kritikinte tiun eraran tendencon, ni klopodis modli la tipan figuron de la heroo Jang Zijong laŭ la fizionomio de la proletaro. Sube ni donas kelkajn ekzemplojn por klarigi tion:



El “Sagaca Elsendo de Informo”: Kun senlima amo kaj ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ kaj la laboranta popolo, Jang Zijong brave kaj sagace batalas sola en la bandita nesto.

1. En la origina scenaro, ne nur mankas priskribo de la intima rilato kaj klasaj sentimentoj de Jang Zijong al la laboranta popolo, kaj troviĝas eĉ nenia detalo pri lia kontaktiĝo kun la amasoj. Kaj tio estas absolute ne malhavebla por modli la figuron de proletara batalanto kaj enkorpiigi la spiriton de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “**fondi solidan bazlokon en la Nordoriento**”. Pro tio ni sekvis la instrukcion de kamaradino Giang King kaj decideme forstrekis la du scenojn, kiuj priskribis negativajn personojn per superstiĉo kaj murdo, kaj speciale aldonis la scenon “**Demando pri Pasinta Sufero en Montaro**”, kiu enkorpiigas la intiman rilaton inter la armeo kaj popolo,

esprimas la intiman rilaton de Jang Zijong kun la amasoj, kiu sin apogas sur la amasoj kaj faras propagandon inter ili, kaj priskribas, kiel li kaptas Lupan Hurlon kaj kiel li informiĝas pli klare pri la interliga mapo kaj centkoka festeno, tiel ke malkovriĝis la du gravaj flankoj de klasa amo kaj klasa malamo en la figuro de Jang Zijong. Sen tiuj ne estas videbla la klasa karaktero de la interna mondo de tiu heroo kaj li montriĝus nur blinda aventuristo sin apartiginta de la amasoj.

2. En la origina scenaro, kvankam estas priskribite, ke Jang Zijong sukcesis penetri en la neston de la banditoj, tamen, tute ne estas esprimita lia pensa bazo, dank' al kiu li povis penetri en la neston de la banditoj kaj venki la malamikojn. Sed tiu punkto estas tre grava por elstara kompartiano kaj heroo-rekognoskisto, armita per Maŭzedongpenso. Pro tio, laŭ la instrukcio de kamaradino Giang King, ni projektis por Jang Zijong petanta pri komision en la sceno IV kompleton de kantoj "Kompartiano" laŭ la melodioj *hipi juanban*, kun komenco en libera takto, *erliu* kaj *kuajban*², por esprimi lian memkonscian kaj firman sekvon de la strategia kaj taktika penso de Prezidanto Maŭ, lian altan proletaran politikan konscion, lian firman decidon "Mi havas ruĝan koron flam-similan, por haki la diablojn ĝi fariĝu akra glavo" kaj lian batalvolon "Mi bone scias, ke survoje trovas sin danĝeroj, sed spite tion mi des pli impetos kun kuraĝo." Tiu punkto estas montrita ankaŭ en la koncernaj kantoj en la scenoj III kaj V. Tiel, tiu persono estas provizita per pli profunda pensa enhavo, kaj oni vidas, ke li estas tipo de sennombraj soldatoj de la laboristoj kaj kamparanoj kreskantaj en revoluciaj bataloj kaj harditaj sub la edukado de Maŭzedongpenso. Se oni ne reliefigus la altan politikan konscion de Jang Zijong armitan per Maŭzedongpenso, la spektatoroj ne nur ne povas vidi, kia pensa forto subtenas lin rekte penetri en la koron de la malamikoj, sed ankaŭ timus kaj eĉ dubus, ĉu li povos sukcesi.

En la origina scenaro, Jang Zijong ne estas modlita kiel batalanto armita per Maŭzedongpenso, kaj de la komenco ĝis la fino troviĝas eĉ neniuj vorto pri Maŭzedongpenso. Sed la animo de heroaj personoj en la epoko de Maŭ Zedong estas ĝuste la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. Sen elmontri de tiu baza politika konscio, tute ne estas preparolebla pri modlado de figuro de proletara heroo. Pro tio ni faris ĝisfundan ŝanĝon ankaŭ en la sceno VIII kaj speciale projektis gravan kernan kanton por esprimi ke li "maten-

sunon havas en la koro" kaj havas elkoran fidelecon al la Partio kaj popolo, ke Maŭzedongpenso estas la fonto de lia saĝo kaj forto. Sen tio, Jang Zijong povus nur esti sentalenta, triviala kaj aĉa vaganto.

3. En la origina scenaro, Jang Zijong montriĝas persono sen idealo pri la ĉina revolucio, por ne paroli pri idealo pri la monda revolucio, kaj eĉ la grava signifo de la batalo de kupto de la Tigra Monto en la tuta Liberiga Milito estas por li malklara. En lia penso estas nur: "En vasta arba maro akompanas min nur ombro" kaj "Sin trovas ĉie blankaj ostoj, sangmakuloj, sed ne homoj", kaj tio formas lian spiritan mondon! Tre grava politika kvalito havenda por heroo persono de la proletaro estas "preni en la koro la patrolandon kaj en la vido la mondon", lukti por realigi komunismon, "**tiu estontan, plej altan idealon senlime luman kaj senlime belan**", kaj decide plenumi ĉiujn taskojn asignitajn de la Partio. Sen tiu idealo, la heroo sur la scenejo ne povas havi vastan horizonton kaj lia figuro ne povas esti alta. Pro tio ni ĝisfunde ŝanĝis la scenon V kaj speciale aranĝis por Jang Zijong longan kanton el la melodioj *erhuang* kaj *hipi*, malkovrante lian grandiozan idealon kaj heroan revolucian entuziasmon "ke jam flirtu ruĝaj flagoj tra la tuta mondo" kaj "ke nian mondon nun jam regu bela primavero!" Tiu revolucia idealo estas certagrade montrita ankaŭ per la koncernaj kantoj en la scenoj III kaj IV ekz.: "volante nepre rompi la katenon de mil jaroj kaj elkrei eternan fonton de feliĉ' por la popolo." Ni opinias, ke drasta reliefigo de tia nobla komunisma idealo en la korfundo de heroo persono estas grava enhavo de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantiko. Sen elmontri de tiu aspekto, Jang Zijong montriĝus nur kiel pigmeo, kiu vidas nur ĝis la pinto de sia nazo.

La elmontri de la karaktero kaj temperamento de Jang Zijong, kiu estas unuflanke kuraĝa kaj brava kaj aliflanke ankaŭ subtilema kaj sagaca, same ne devas esti ignorata. Por esprimi lian temperamenton de "kuraĝ' ĉiele alta" kaj lian heroan volon, kiu "tremigas rokomuron", ni uzis antaŭ la sceno V novan ŝtormecan enkondukan muzikon figurantan galopadon de rapida ĉevalo en vento kaj neĝo por enkonduki la lantan kantadon de Jang Zijong laŭ reformita *erhuang daŭban*, sub rapida akompana muziko, figurantan lin kantadi rajdante sur galopanta ĉevalo kaj disradiante imponecon, kuraĝon kaj bravecon, tiel ke la spektatoroj klare sentas la alproksimiĝon de rajdanta heroo, kiu timas nenian malfacilon aŭ danĝeron kaj kuraĝas impeti antaŭen

sen hezito, antaŭ ol la heroo aperas sur la scenejo. La speciale projektitaj dancoj de rajdado kaj mortigo de tigro, prezentataj de Jang Zijong post sursceniĝo, pli intense prezentas lian kuraĝan kaj bravan temperamenton. Aliflanke, por esprimi lian subtileman kaj sagacan karakteron, ni aparte esprimis emfaze en lia kerna kanto en la sceno VIII liajn trajtojn de atentema kaj subtilema pensado kaj sagaca kaj sprita decidemo, dank' al kiuj li povas rapide atingi ke "post rekognosk' septaga jam klariĝis ĉio plene". rKome, en diversaj scenoj, ni aranĝis por li tri luktojn per sagaco kun Vulturo kaj du kun Luan Ping. La du supre menciitaj flankoj estas plie evidentigitaj en la batalo en la sceno X. Estas evidente, ke sen esprimo de lia kuraĝa kaj brava aspekto lia figuro ne povas esti sufiĉe alta kaj brila, kaj sen esprimo de lia detalema kaj sagaca aspekto lia figuro ne povas esti sufiĉe solida kaj sukplena.

La aliajn heroajn figurojn de la opero ni modlis ankaŭ sur la bazo de la sama principo. Prenu Li Jongki kiel ekzemplon. Li estas tipo de laboranta popolo, kiu havas revolucian tradicion, suferas subpremon kaj ekspluaton kaj havas nepacigeblan klasan malamon kontraŭ la kuomintang-aj reakciuloj. Tuj kiam tiu klasa malamo estas ekscitita, levita kaj direktata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Popola Liberiga Armeo, ĝi elŝprucigas senfinan revolucian forton. Pri tia persono ni ne nur priskribis lian ardan klasan malamon kontraŭ Vulturo "Kaptinte vin, mi vin dishakos pro la krimo!" sed ankaŭ lian profundan amon al lia patrino kaj al la klasaj fratoj Ĝang Daŝan k. a.; ni priskribis lian meditado "Jen la soldatoj nin prizorgas kaj kuras, afable nin pritraktas, en helpdon' ne lacas", sed ankaŭ la eksplodon de lia sento, kiam li eksciis ke la propraj trupoj "venis jam hodiaŭ". De multaj generacioj li suferas la pezan klasan subpremon, tial ke "kiel bandit' soldat' subpremas ĉiam la popolon" kaj por li "vundoj kaj cikatroj kaj indigno en la koro" registras lian familian historion plenan de sango kaj larmoj. Tuj kiam li vidas ke venis fine jam la sopirata savanto, ŝprucas erupcie lia arda indigno kontraŭ la reakciuloj kaj lia klasa sentimento al la Partio kaj soldatoj de la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj de multaj jaroj kaŝiĝis en lia korfundo, kaj estas incititaj en li la fera volo kaj decidemo por ekstermi la malamikojn: "De nun la Kompartion mi sekvados por lupĉas' estonte, kaj sturmos tra torent' kaj fajr' kaj vivoferos mi volonte." Kaj, poste, pere de sciigo pri la sekreta vojo kaj gvido dum skiado en la sceno IX kaj batalo en la sceno X kaj aliaj agoj, liaj supre menciitaj aspektoj estas plie disvolvitaj, tiel ke sub la edukado de la Partio, tiu

heroa figuro progresas paŝon post paŝo kaj poste fariĝas milica taĉmentestro gvidanta la amasojn, kiu unuiĝas, batalas kaj venkas kune kun la Popola Liberiga Armeo, farante kontribuojn en ekstermado de malamikoj.

Por persisti en kombinado de revolucia realismo kun revolucia romantiko kaj perfekte modli la brilan figuron altan kaj sukplenan de proletara heroo de diversaj flankoj tra la vojo ĉefe malkovri la internan mondon de la heroo, necesas zorgi pri kombino de vasteco kun profundecon en komponado. Se oni atentis nur pri vasteco en komponado kaj ignoras profundecon en forta malkovro de la enhavo de diversaj flankoj, tio kondukos al la stato ke ekzistas nur ekstera brileco sen efektiva enhavo, ke ĉiuj flankoj estas tuŝitaj, sed mankas arta edifa forto kaj konvinkivo en penso. Sekve, post konsidero pri la komponado por reliefigi de diversaj flankoj la karakteron de la heroo, oni devas ĉiurimede uzi kun plena fervoro la pozitivajn faktorojn de ĉiuj artaj rimedoj, energie reliefigi la ĉefajn trajtojn de la heroo en la ideologio kaj karaktero, profunde, detale kaj efike malkovri la internon en diversaj flankoj, por kiel eble plej profunde esprimi la brilan internan mondon de la proletara heroo. Tiu laboro postulas atenton, kaj por ĝi ne taŭgas malatentemo. Dum nia reviziado de la opero la vastaj amasoj de laboristaj, kamparanaj kaj soldataj spektantoj faris al ni multajn bonajn kaj subtilajn proponojn, kiuj multe helpis nin.

RELIEFIGO DE NEGATIVAJ PERSONOJ, DE ALIAJ POZITIVAJ PERSONOJ KAJ DE MEDIO KAJ ETOSO DEVAS SENSANCELIĜE SERVI AL ELSTARIGO DE ĈEFA HEROO

La heroaj personoj de la proletaro ĉiam elmontras sian heroan karakteron en la intensaj bataloj kun la kontraŭrevoluciaj fortoj kaj meze de la revolucia kolektivo. Tial, elstarigi ĉefan heroon per kontrastigo de negativaj personoj, per akompano de aliaj pozitivaj personoj kaj per lavumo de medio estas nepre sekvenda principo por la literatura kaj arta kreado de la proletaro. La traktado de negativaj kaj neĉefaj personoj ofte influas figuron de ĉefa heroo en sufiĉe granda mezuro. Prezidanto Maŭ instruis al ni en sia verko *Pri Kontraŭdiro*, ke neĉefaj flankoj de kontraŭdiro "en certaj kondiĉoj... manifestas sin siavice en la ĉefa kaj decida rolo". Tial, se oni konscie aplikas tiun principon, oni povas, en certaj

kondiĉoj, pli bone elstarigi la brilecon de figuro de ĉefa heroo, same kiel "elstarigi la lunon per lavumo de nuboj". Male, se oni malobservas tiun principon, senbride lavumas la negativajn personojn, kaj tiel glitas en ŝlimon de "priskribo de mezaj personoj", aŭ se oni ĵonglas per artifiko k. a., tio certe reduktas, detruas kaj eĉ dronigas la brilecon de la figuro de heroo.

En tiu ĉi rilato, laŭ nia sperto, necesas zorgi por "tri elstarigoj": inter la personaro elstarigi la pozitivajn personojn, inter la pozitivaj personoj elstarigi la heroajn personojn, kaj inter la heroaj personoj elstarigi la ĉefan heroon. Sekve, la aranĝado kaj traktado de ĉiuj personoj (inkluzive la pozitivajn kaj negativajn) kaj cirkonstancoj devas submetiĝi al la premiso de elstarigo de la ĉefa heroo. Ĉisube ni pritraktas la tri flankojn laŭvice:

1. Kontrastigi ĉefan heroon per negativaj personoj. Prezidanto Maŭ diris, ke ni "**priskribas ankaŭ negativajn personojn, sed tio servas nur kiel kontrasto por reliefigi la lumon de la tuto**". Servi kiel kontrasto estas submetiĝo. Kiu al kiu submetiĝas, tio estas problemo, kiu estas sub kies diktaturo sur la scenejo, aŭ kiu klaso superregas la scenejon. Sur nia socialisma scenejo, la superregantoj devas esti heroaj personoj de la proletaro en ĉiu ajn tempo, kaj negativaj personoj povas esti nur kontrasto por la heroaj personoj. Tio signifas, ke traktado de negativaj personoj devas eliri el la bezonoj de modlado de ĉefa heroo. Alie, se oni priskribas negativajn personojn sammezure kiel pozitivajn personojn aŭ tiel priskribas ilin ke ili montriĝas tre arogantaj kaj okupas la ĉefan lokon, tio nepre rezultigos inversigon de la historio kaj la situacion, ke diversspecaj demonoj kaj diabloj diktatoras. Ĝuste tia estas la sceno VI en la origina scenaro de la *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*. Tie Vulturo sidas alte kaj superregas la scenejon, dum Jang Zijong troviĝas en pasiveco kaj turniĝas ĉirkaŭ li, servante kiel kontrasto por li. Tia inversigo de la historio estas nun reinversigita de ni. Antaŭ ĉio ni forigis la scenojn, kiuj lavumas la arogantecon de malamikoj kaj plie movis la sidlokon de Vulturo de la centro de la scenejo al flanko, servigante lin de la komenco ĝis la fino kiel kontraston por Jang Zijong. Dume, Jang Zijong sursceniĝas impone en majesta muzikado kaj troviĝas ĉiam en la centro de la scenejo; cetere, en formo de samtempa kantado kaj dancado li troviĝas ĉiam en aktiveco, kvazaŭ tiras Vulturon je la nazo sur la scenejo. Dum prezento de la mapo, Jang Zijong estas lokita alte super la aliaj, kaj Vulturo kun sia bando respektive ordigas sian vestaĵon por akcepti ĝin kun kliniĝo.

Tio multe estingas la arogantecon de la burĝaro kaj kreskigas la dignon de la proletaro. Tiu ŝanĝo vekis fortajn reagojn. La vastaj revoluciaj amasoj tre ĝojiĝis pro tio kaj diris: "Bonege!" "Tio estas vere kompleta returniĝo!" "Jen granda kontentigo!" Sed la modernaj reviziistoj sentis kaj malammon kaj teruron kaj doloron. Ili historie nin blasfemis, ke ni "entute ignoras la leĝojn de vivo kaj regulon de teatro". Kio estas "la leĝoj de vivo"? Kaj kio "la regulo de teatro"? Unuvorte, ili parolis pri "la leĝoj de vivo" de restaŭro de kapitalismo kaj pri "la regulo de teatro" de kontraŭrevolucia burĝara diktaturo! Tiujn varojn ni ne nur "entute ignoras", sed ankaŭ volas senkaŝe frakasi komplete. Frakaso de la t. n. "regulo de teatro" kiu prenas la ekspluatitan klason kiel mastron de la scenejo, estas granda venko de la literatura kaj arta revolucio de la proletaro.

2. Akompani ĉefan heroon per aliaj pozitivaj personoj. La rilato inter ĉefa heroo kaj aliaj pozitivaj personoj estas ankaŭ rilato de dialektika unueco. Ĉefa heroo estas membro kaj samtempe ankaŭ reprezentanto de la klaso kaj de la amaso. La amaso estas la bazo por la ekzisto de heroo, kaj heroo estas la modelo de la amaso. Granda heroo aperas nepre en heroo kolektivo. Tial la ĉefa heroo devas esti tiel priskribata, ke li ne apartiĝas de la amaso, tamen li estas pli alta ol la amaso. Ni devas unuflanke modli heroan figuron, kiu estas pli alta ol la ordinaraj pozitivaj personoj, kaj aliflanke modli ankaŭ heroan kolektivon, kiu formas la bazon de ekzisto de heroo kaj en kiu enkorpiĝas la influo de heroo. Tamen, oni ne devas preni ambaŭ egale, sed priskribi la ordinarajn pozitivajn personojn el la bezono de modlado de ĉefa heroo por elstarige akompani lin. Kaj oni ne devas lasi ordinarajn pozitivajn personojn invadi la rolon de ĉefa heroo, nek tro senvalorigi la amason por levi la ĉefan heroon kiel superhomon kaj cignon inter anasoj. Ekzemple, la sceno I de la nomita opero antaŭe³ finiĝis sur la persono de Ŝaŭ Gianbo, tiel ke Jang Zijong, kiu estis jam for el la scenejo, ne povis doni profundan impreson al la publiko. Nun la finiĝo estas ŝanĝita per kolektiva *lianghiang* kun Jang Zijong kiel centro kvazaŭ ruĝa floro bele kontrastas el verda foliaro. Ĉi tie la akompano de la heroo kolektivo, la persekuta taĉmento, forte elstarigas impresive la figuron de Jang Zijong ordinara sed alta, jam en la komenco de la teatraĵo. Plie: en la sceno III, pere de la akompano de ĉasisto Ĉang kaj Ĉang Baŭ la influo de la heroo inter la amaso estas vivece kaj efike manifestata. La plej tipa ekzemplo de elstarigo de Jang Zijong per aliaj personoj troviĝas



Jang Zijong luktas kontraŭ banditoj en la Tigra Halo.

en la sceno IV. Tie ni speciale aldonis fragmentojn pri komitata kunsido de la partia filio kaj demokratia kunveno, por elstarigi la senfinan forton donitan de la Partio kaj kunbatalantoj al Jang Zijong, kaj la koncernaj kantoj kaj paroloj de Ŝaŭ Gianbo kaj Ŝen Dehua rekte skizas la biografion de Jang Zijong, eldiris lian klasan bazon, politikan kvaliton kaj la plenan konfidon de la Partio kaj amaso al li. Krome, en “Antaŭenmarŝo en Venko”, “skiado” kaj “interbatalo”, ni kreis tute novan dancon surbaze de la vivo kun ensorbo de iuj tradiciaj dancformoj por modli la heroajn figurojn de la persekuta taĉmento kun heroa braveco kaj alta batalvolo, kaj tiel liveris la amasan bazon al la “fort’ kaj vol’ de ŝtalo” de Jang Zijong. Ĉio ĉi tio konvinke montras, ke kvankam Jang Zijong sola batalas en la nesto de la malamikoj, “tamen, apude staras kvazaŭ l’ tuta klasfrataro”, kaj “iliaj fajraj koroj” varmigas lian bruston kaj donas al li senfinan saĝon kaj kuraĝon. Kaj tio tre konkrete manifestas la grandan penson de popola milito de Prezidanto Maŭ.

3. Elstarigi ĉefan heroon per lavumo de medio. Lavumo de medio estas nemalhavebla ĉenero por

modli ĉefan heroon. Se tio estas bone farita, ĝi povas ludi pozitivan rolon en malkovro de la interna mondo de ĉefa heroo; alie ĝi malhelpas en tio aŭ eĉ ludas detruan rolon. Tial, lavumo de medio, inkluzive dekoracion, devas bazi sin sur personoj (precipe sur ĉefa heroo). Se oni tion faras aparte dis de la personoj, vidante nur objektojn sed ne homojn, tiam oni suriras la vojon de burĝara estetikismo.

Ankaŭ en tiu rilato la *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* traspertis akrajn batalojn. Ekzemple, en la origina scenaro, ĉiujn mediojn, en kiuj aperas la komandantoj kaj batalantoj de la persekuta taĉmento antaŭ la surmonteniĝo de Jang Zijong, formas arboj kun klinitaj branĉoj kaj kurbaj trunkoj; tiu etoso malprospera, malvarma kaj inerta tute ne konformas kun la temperamento de Jang Zijong kaj liaj kunbatalantoj, kiuj estas plenaj de vigeleco kaj heroa braveco. En la nuna scenaro tio estas tute nevidebla. Nun, en la scenoj I, III, IV, V kaj IX la fono estas tute el altegaj arboj kun fortikaj kaj rektaj trunkoj kaj branĉoj. Precipe en la sceno V, inter la altaj pinoj enpenetras tra la foliaro lumkolo-

noj de la suno. Tio en reciproka briligo al la impona kantado kun "kuraĝ' ĉiele alta" vive kaj efike manifestas la bravan, firman, neflekseblan kaj heroan karakteron de Jang Zijong. Aranĝo de medio en la sceno VIII estas pli tipa. En la origina scenaro, Jang Zijong kaŭras en obskura kaj malvasta kaverno, donante impreson de premateco kaj senkapableco. Al la plenmano da burĝaraj reprezentantoj, tio certe taŭgas por modli ilian "idealan personon", kiu havas malvastan horizonton kaj trivialan animon. Sed, tio evidente ne taŭgas por ni en modlado de giganta heroa figuro havanta senlime vastan horizonton. Pro tio, laŭ instrukcio de kamaradino Giang King, ni ĝisfunde ŝanĝis la medion kaj etoson de tiu sceno post kritiko de la erara tendenco, lasante Jang Zijong alte stari kvazaŭ verda pino en frosto kaj neĝo kaj laŭte kanti sur majesta kaj kruta montpinto, sur la fono de ĉeno da montoj ondantaj malproksime kaj bunte brilantaj nuboj en matenruĝo. Kiam Jang Zijong kantas: "Kaj kontraŭ frost' mi maten-sunon havas en la koro", subite heliĝas la firmamento, brilas la koloraj nuboj kaj kolono da aŭroro ruĝigas la pintojn de krutaj rokoj. Kune kun la melodio de *Ruĝas la Oriento*, ĉio ĉi tio tre efike simbolas la altan spiritan mondon de Jang Zijong, ke li "maten-sunon havas en la koro".

PROTEKTI KAJ DEFENDI LA REVOLUCIAN MODELAN OPERON

Prezidanto Maŭ instruis al ni: "La imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj certe ne akceptas volonte sian malvenkon kaj ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon. Post paciĝo de la tuta lando, ili ankoraŭ ĉiamaniere entreprenos sabotadon kaj malordigadon kaj ili ĉiutage kaj ĉiuminute intencos restariĝi en Ĉinio. Tio estas neevitebla kaj tute senduba, kaj sub nenia cirkonstanco ni devas malstreĉi nian singardemon." El la sperto de kreado de la *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, ni profunde sentas, ke revolucia modela opero naskiĝis kaj maturiĝis en vivmorta lukto inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj kaj la figuro de la proletaraj herooj estis modlata tra la malfacila kaj zigzaga vojo en tiu luktado. De kiam ni komencis la kreadon de la opero ĝis la nuna tempo, klasaj malamikoj neniam ĉesis fari atakojn kaj subfosojn. La sola diferenco estis nur tio, ke la atakoj kaj subfosoj estis faritaj per malsamaj rimedoj kaj kun malsamaj trajtoj en malsamaj situacioj de la batalo. Kiam ni ĵus komencis modli la heroan figuron, ili jam provis strangoli la revolucion modernan operon en ĝia lulilo. Kiam ni jam starigis heroan figuron sur la scenejo, ili aplikis

la metodon de kaŝa interŝanĝo por ĉiurimede distordi kaj malbeligi la figuron de la proletara heroo. Kiam la modlita heroa figuro fariĝis pli matura, ili alprenis pli insidan metodon ŝajnigi sin "varme amantaj la modelan operon" por kaŝe subfosi ĝin. Iuj el ili uzis sukertegitajn obusojn de "flato" kaj "kajolo" por detruiri nian batalvolon, esperante ke la heroa figuro de ni modlita deformiĝu nerimarkite. Krome, iuj cinike identigas herojajn personojn en la opero kun si mem aŭ kun siaj parencoj aŭ amikoj, deklarante ke tiu kaj tiu en tiu kaj tiu opero estas mi aŭ iu alia, por altigi sin, ĉasi politikan kapitalon kaj subfosi la prestiĝon de revolucia modela opero. Lastatempe iu homo sin nomanta Sun deklaras senbaze ke Ŝen Dehua en la *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estas li mem, senbridigas sian langon, ĉie fanfaronas brue pri plej diversaj aferoj, kaj kotumas herojajn figurojn de PLA-anoj, priskribante tiujn herojajn batalantojn, kiuj timas nek malfacilojn nek morton, kiel timemulojn, aspirantajn manĝi kokostojn postlasitajn de malamikoj kaj tiujn batalantojn kaj komandantojn de PLA havantaj altan politikan konscion de la proletaro kiel kanajlajn soldatojn. Tiu homo, kiu malbeligas PLA-anojn kaj subfosas revoluciajn modelajn operojn, montras sin politika poŝtelisto! Ni esprimas nian plej grandan indignon kontraŭ tiuj aĉuloj! Ni avertas bonkorajn kamaradojn nepre ne esti trompitaĵoj de tiuj homoj. Riproĉu kaj kondamnu tiujn homojn por plene elimini iliajn venenajn influojn, protektu, defendu kaj fortikigu la modelajn operojn kun alta politika konscio kaj revolucia singardemo. Ke la modernaj reviziistoj blasfemas la modelajn operojn, tio ĝuste malkovras ilian terurigon kaj malfortan esencon de papertigro kaj atestas ke la modelaj operoj jam trafis iliajn vundpunktojn. La modelaj operoj estas nia potenca ideologia batalilo en opono kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

La pasintaj tagoj estis plenaj de batalo kaj la estonteco saturas nin plene per braveco. Ni pli alte tenu la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, marŝu kuraĝe antaŭen, pli energie transformu nian ideologion kaj elmodlu pli da brilaj figuroj de proletaraj herooj, por ke ili enradikiĝu por ĉiam sur la socialisma scenejo kaj socialisma ekrano en servo al la popolo de Ĉinio kaj al la popoloj de la tuta mondo.

(El la gazeto *Hongqi*, 1969, n-ro 11)

1. *La scenaro, laŭ kiu oni prezentis antaŭ 1963.*
2. *Hipi juanban, erliu, kuajban k. s. estas nomoj de melodioj uzataj en pekina opero.*
3. *Tiel oni prezentis en la jaro 1961.*

Sagaca Kapto de la Tigra Monto

Kolektive Adaptita de la Teatra Grupo de *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* de la Ŝanhaja Pekinopera Trupo

(Traduko laŭ la scenaro por prezentado en oktobro de 1969)

NOTO DE LA REDAKTORO DE LA GAZETO "HONGQI"

Sub la intima zorgado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, post milfoja polurado kaj foj-refoja rebonigado, la revolucia moderna pekinopero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* nun dissendas ankoraŭ pli brilajn radiojn. Nun ni publikigas la scenaron por la prezentado en Pekino en oktobro de 1969 kaj ĝin rekomendas al la vasta legantaro de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj batalantaj sur diversaj postenoj. Por sia prezentado, diverslokaj operaj trupoj bonvolu uzi tiun ĉi scenaron.

PERSONOJ

Jang Zijong (Jang), estro de rekognoska plotono de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo (ĈPLA)

Ŝaŭ Gianbo (Ŝaŭ), stabestro de regimento de iu trupo de ĈPLA

Li Jongki (Li), fervojisto.

Ĉang Baŭ (Baŭ), filino de ĉasisto.

Ŝen Dehua (Ŝen), vicestro de rekognoska plotono de iu trupo de ĈPLA.

Sanitaristino de iu trupo de ĈPLA.

Malgranda Guo (Guo), korpgardisto de iu trupo de ĈPLA.

Ĝong Ĝiceng (Ĝong), batalanto de iu trupo de ĈPLA.

Lju Hongje (Lju), batalanto de iu trupo de ĈPLA.

Luo Ĉanggiang (Luo), batalanto de iu trupo de ĈPLA.

Nombro da batalantoj.

Ĉasisto Ĉang (Ĉang), la patro de Ĉang Baŭ.

Patrino Li (Patrino Li), la patrino de Li Jongki.

Ĝang Daŝan (Ĝang), fervojisto.

Edzino de Li (Edzino de Li), la edzino de Li Jongki.

Nombro da vilaĝanoj.

Vulturo, bandita ĉefo de la Tigra Monto kaj estro de la falsa Kvina Sekuriga Brigado de Kuo-mintango.

Luan Ping (Luan), "interliga adjutanto" sub Klabo Hju, la bandita ĉefo de Cic-monto.

Bandita stabestro (B. stabestro).

Bandita ĉefadjudanto (B. ĉefad.).

Bandita rotestro (B. rotestro).

La Kolonoj kaj nombro da banditoj.

S C E N O I

MARŜO EN VENKO

Vintro de 1946. Iu loko en Nordorienta Ĉinio.

Sovaĝa arbaro profunde en montaro, brilanta neĝo blanka.

Plene armita persekuta taĉmento de iu trupo de ĈPLA rapide enmarŝas kun ruĝa flago ĉe la kapo de la trupo.

La batalantoj dancas en maniero de marŝado kontraŭ vento sur neĝkovrita montvojo.

Luo: Haltu!

Viciĝas la trupanoj.

Luo: Kamarado stabestro, ni venas al vojforko!

Ŝaŭ: Ripozu ĉi tie.

Luo: Jes. Lju Hongje!

Lju: Tie ĉi.

Luo: Gvatu!

Lju: Jes. (Li eliras por gvati.)

Luo: Ripozu ĉi tie!

La batalantoj: Jes.

Malgranda Guo donas mapon al Ŝaŭ, kaj tiu ĉi ekrigardas ĝin kaj esploras la terenon.

Luo: Ripozu ĉi tie, proviantisto!

Voĉo post la kuliso: "Ripozu ĉi tie!"
Henado.

Ĉiuj piedfrapas la teron por sin varmigi kaj forskuas la neĝon de sur sia korpo.

Ŝaŭ: Ĉu vi laciĝis?

La batalantoj: Ne!

Ŝaŭ: Bone! Kamaradoj! Kamaradoj Jang Zijong kaj Ŝen Dehua iris al la antaŭa haltejo por rekognosko kaj tie ĉi estas nia renkontejo. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "fondi solidan bazlokon en la Nordoriento", la regimenta partia komitato organizis la persekutan taĉmenton por mobilizi la amasojn ĉe la areo de

Mudangiang, ekstermi la banditojn, firmigi la postfronton en kunagado kun la kampa armeo por frakasi la atakadon de Usono kaj Ĉiang Kajŝek. Tio ĉi estas tasko kun granda strategia signifo. La obstina banditaro de la Vulturo fuĝis en primitivan arbaron profunde en la montaro. Ni jam serĉadis plurajn tagojn marŝante en neĝvento, sed ĝis nun ankoraŭ ne trovis ĝin. Ni nepre disvolvu la spiriton de kontinua batalado, (decideme kaj forte) "faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn

Ŝaŭ kaj la batalantoj: por akiri venkon."

Envenas Lju Hongje.

Lju: Raporton! Plotonestro Jang kaj kamarado Ŝen jam revenis de rekognoskado!

Jang Zijong kaj Ŝen Dehua envenas kaj salutas.

Jang: Raporton!

Ŝaŭ: Vi estas lacigitaj, kamarado Jang!

Jang: Dum ni rekognoskis alivestite laŭ la ordono, ni savis mutan knabon en sovaĝa montvalo. Kaj dank' al helpo de lia patro ni sukcesis iri al la vilaĝo Nigra Drako, kolekti tie informojn kaj trovi spurojn de la Vulturo.

Ŝaŭ: Bone.

Jang (kantas laŭ *hipi jaŭban*¹):

Ĉi tie estas loko de bandit-frekvento;

Sin nomas la rabband' la Tria Sekuriga Regimento.

Lastnokte ĝi prirabis la vilaĝon Nigra Drako.
(Laŭ *kuajban*.)

Jen de Vultur' kruela ĝisĉiela krima ago!

En la direkt' al Giapi-valo nun forkuras ili,

Videble kun la celo al la Tigra Mont' reiri.

Ŝaŭ: Kamaradoj, eltrovinte spurojn de Vulturo, nun ni devas firme lin persekuti. Luo Ĉang-giang!

Luo: Tie ĉi.

Ŝaŭ: Ni pasigu la nokton en la vilaĝo Nigra Drako!

Luo: Jes.

Ŝaŭ: Kamarado Jang!

Jang: Jes.

Ŝaŭ: Ni devas pliapaŝe akiri informojn pri la malamiko. Vi iru kun Ŝen Dehua —

Ŝen: Jes.

Ŝaŭ: Ĝong Ĝiceng!

Ĝong: Jes.

Ŝaŭ: Lju Hongje!

Lju: Jes.

Ŝaŭ: Daŭre antaŭeniru por rekognosko!

Jang: Jes.

Ŝaŭ: Ekmarŝu!

Ili ĉiuj faras *lianghiang-on*²

— La Kurteno falas.

SCENO II

PRIRABADO DE GIAPI-VALO

Vesperigo. Vilaĝfino de Giapi-valo, kie oblikve staras kaduka arbo kaj malorde altas rokegoj apud profunda ravino.

La banditaro de Vulturo, la kuomintanga "Kvina Sekuriga Brigado", trapasas Giapi-valon dum fuĝado al sia monta citadelo post malvenko. La bandita ĉefo Vulturo ŝtele rigardas en la vilaĝon.

B. ĉefad.: Via Moŝto la Tria, reirante al nia monto ĉifoje ni jam akiris ne malmulte da objektoj sur la vojo, kaj krome Giapi-valo troviĝas ĉe la pordo de nia domo, do ni ĝin ne tuŝu.

B. stabestro: Jes, ja proverbo diras: "Leporo ne manĝas la herbojn ĉirkaŭe de l' nesto!"

Vulturo: Kial ankoraŭ zorgi pri tio! Kaptu por mi kiel eble plej multe da malriĉuloj kaj ilin eskortu hejmen por konstrui fortikaĵojn! Viroj kaj virinoj ĉiuj taŭgas!

B. stabestro (kompreneme): Jes, mi komprenas.

La bandita stabestro iras kun la banditaro sub sia gvido en la vilaĝon. Kiam la bandita ĉefadjutanto ekiras tien, Vulturo haltigas lin per voko.

Vulturo: Ĉefadjutanto, eble jam dek tagoj forpasis post kiam Lupa Hurlo foriris por serĉi Luan Ping?

B. ĉefad.: Jes, ankau mi maltrankvilas pro tio.

Vulturo: Post la reveno al la Tigra Monto, la unua afero fareda estos rapide pligrandigi niajn fortojn.

B. ĉefad.: Jes. Se Lupa Hurlo nur trovos Luan Ping kaj akiros la interligan mapon el la manoj de Klabo Hju, tiam la areo de Mudangiang jam fariĝos nia.

Vulturo: Sed ja ankau komisiito Hoŭ ĉie serĉas tiun ĉi mapon, do zorgu, ke li ne kaptu ĝin!

B. ĉefad.: Trankviliĝu, Via Moŝto la Tria, la interliga mapo ja ne povos forflugi, ĉar Lupa Hurlo kaj Luan Ping estas ĵuritaj amikoj.

Vulturo: Nu! La usonanoj publike klopodas por paca intertraktado inter Kuomintango kaj la Kompartio, sed kaŝe ili transportas soldatojn por Ĉiang Kajŝek, kaj oni diras, ke Ĉiang Kajŝek jam venis al Ŝenjang por persone supervidi la batalojn kaj deziras

*El la dua sceno "Prirabado de Giapi-valo":
Fervojisto Li Jongki brave levigas al rezisto.*



ekstermi en tri monatoj la komunistajn trupojn sude kaj norde de Ŝanhajguan. Mi pensas, ke jam estas tempo por agi!

B. ĉefad.: Bone! Tuj kiam la nacia armeo alvenos, vi jam fariĝos Ĝenerala Komandanto en norda Manĉurio! Via moŝto ja estas nemalhavebla kiel por Generalo Ĝang kaj Manĉukuo tiel ankaŭ por Ĉiang Kajŝek. Hahahaha!

Vulturo: Hahahaha!

Hundbojoj aŭdiĝas en la vilaĝo.

Vulturo sturmas en la vilaĝon kun la bandita ĉefadjutanto.

Interne de la vilaĝo leviĝas ĉie flamoj kaj krioj.

Li Jongki enkuras kun ĉaspafilo kaj ĉasaĵo en la manoj.

Li Jongki (kantas laŭ *hipi hiaŭdaŭban*):
Kriegas homoj kaj leviĝas flamoj ĝis ĉielo,
(Laŭ *kuajban*.)
Patrinoj vokas siajn idojn kaj patrinojn idoj,
Refoje rabas, murdas kaj bruligas la banditoj,
Mi luktos kontraŭ ili spite eĉ al vivofero!

Banditoj perforte kaptas kaj eskortas gejunulojn kies brakoj estas kunligitaj. Li Jongki luktas kun la banditoj dum la vilaĝanoj estas batataj kaj fortirataj de la banditoj.

La edzino de Li Jongki estas entirata kaj lia patrino postkuras kun bebo en la brakoj. Bandita rotestro deprenas perforte la infanon de la maljunulino kaj kruele ĵetas ĝin sub la rokmuron. Kun indignego Li Jongki luktas kun la banditoj kaj estas vundita je la maldekstra brako. Alvenas Vulturo kaj pafas al li.

Edzino de Li: Jongki!

La edzino de Li Jongki ŝirmas Li Jongki per sia korpo, estas trafita de kuglo kaj mortas. Vulturo kaj la aliaj eliras.

Li (rigardante la edzinon indigne): Ho, patrino de mia infano! patrino de ...

Patrino Li (sinĵetas al la kadavro kaj krias dolore):
Ho bofilino mia!

Li (kantas laŭ *hipi kuajban*):
Subite falas katastrofo tondrosimila,
Indigno arde brulas nun en mia sino.
Mi nepre venĝos min por ŝuldo la sanga,
Vulturo!
Kaptinte vin, mi vin dishakos pro la krimo!

Li Jongki volas postkuri por mortlukto. Banditoj alrapidis kaj kunligas lin. Li baraktas tutforte.

Patrino Li: Jongki!

Li: Panjo!

Li Jongki forportiĝas.

Li: Panjo! Panjo! Panjo!

Patrino Li (almoviĝas surgenue): Jongki!

— **La kurteno falas.**

S C E N O III

DEMANDO PRI PASINTA SUFERO EN MONTARO

Posttagmezo. Malproksima montvalo. Malgranda ligna kabano. Sur la tablo en ĝi malorde kuŝas manĝiloj.

Ĉang Baŭ ordigas la tablon en la domo, kaj Ĉasisto Ĉang rigardas eksteren.

Baŭ: Kiel krude kondutis la viro kaj virino, paĉjo. Ili formanĝis la tutan pecon da kapreolaĵo ĵus akiritan de ni.

Ĉang: Ĉu vi scias, kiuj ili estas, Ĉang Baŭ?

Baŭ: Ĉu la viro ne diris, ke li estas PLA-ano?

Ĉang: Hm! Antaŭ ok jaroj, kiam mi estis forkaptita sur la Tigran Monton, mi vidis lin tie. Li nomiĝas Lupa Hurlo, li estas bandito.

Baŭ: Ha!

Ĉang: Ni ne povas resti plu ĉi tie! Ni tuj ordigu la havaĵojn kaj forfuĝu al via onklo Daŝan en Giapi-valo.

Baŭ: Jes. (Ŝi komencas kolekti la havaĵojn.)

Ĉang (al si mem): La du felokomercistoj, kiuj venis al ni antaŭ kelkaj tagoj, diris, ke komunistoj venis al nia hejmloko kaj helpas la malriĉulojn sin liberigi. Ĉu vere tiel estas?

Baŭ: La du felokomercistoj, paĉjo, estas ja bonuloj, se ili ne savus min en la neĝejo, mi jam frostmortus!

Ĉang: Ho jes! Rapidu!

Baŭ: Jes.

Ĉasisto Ĉang estas fininta la pakadon. Ĉang Baŭ deprenas felojn de sur la muro kaj ekvidas homajn figurojn ekster la fenestro.

Baŭ: Jen denove venas homoj, paĉjo!

Ĉasisto Ĉang haste kovris ŝian buŝon per sia mano.

Ĉang: Ne parolu!

Ili atente aŭskultas.

Jang Zijong, Ŝen Dehua, Ĝong Ĝičeng kaj Lju Hongje venas singardeme en blankaj peltaj vestoj kaj militistaj ĉapoj, kies ruĝstelaj insignoj estas kovritaj de kapuĉoj.

Jang (kantas laŭ *hipi sanban*):

Ni penas ĉasi l' suspektatojn sed ne povas spuron trovi,

Ŝen: Maljuna Jang, ĉu tiu ĉi ne estas la domo de la ĉasisto Ĉang?

Jang: Jes.

(Li kantas daŭre.)

Ni revizitu la ĉasiston por problemon nian solvi.

Kamaradoj Ŝen Dehua kaj Lju Hongje!

Ŝen kaj Lju: Tie ĉi.

Jang: Antaŭen iru por daŭra serĉado; kaj se vi akiros informon, venu ĉi tien por rekuniĝi kun ni!

Ŝen kaj Lju: Jes. (Ili eliras.)

Jang: Ĝongĉjo! Gvatu!

Ĝong: Jes. (Li eliras.)

El la kvara sceno "Planado pri Batalo": Ŝaŭ Gianbo (dekstre) kaj Jang Zijong (maldekstre) interkonsiliĝas pri projekto por sagace kapti la Tigran Monton.



Jang (paŝas al la domo kaj ekfrapas je la pordo.):
Samlokano!

Ĉasisto Ĉang venas el la domo en maltran-
kvilego.

Ĉang (esplorante la fremdulon): Vi estas...

Jang: Ĉu vi ne rekonas min? Mi estas neni-
alia ol la felokomercisto, kiu venis ĉi tien
antaŭ kelkaj tagoj!

Ĉang: felokomercisto?

Jang: Jes.

Aŭdinte la voĉon, Ĉang Baŭ rapidas el la
domo.

Jang (al Ĉang Baŭ): Via patro ne povas
rekonu min, frateto. Ĉu ne estis mi, kiu sendis
vin hejmen?

Baŭ (Atente pririgardinte lin, ŝi volas ekparoli
sed abrupte ĉesas kaj kapjesas):....

Jang (jam iom rimarkas tion, sed li restas kvazaŭ
li nenion rimarkus.): Kiel saĝa knabo!

Ĉang (atente pririgardas Jang Zijong kaj rekonas
lin.): Ha! Ĉu vi ne estas mastro Jang!

Jang: Jes.

Ĉang: Nun mi memoras, ke ni eĉ rekonis unu la
alian kiel samlokanojn. Envenu por iom sidi.

Ili eniras la domon kune.

Jang (al Ĉang Baŭ): Ĉu vi jam fartas pli bone?

Ĉang (rapide klarigas): Li estas mutulo.

Jang: Ho, jes, jes, jes.

Ĉang: Vi estas kaj komercisto kaj soldato, sed
kio finfine estas via profesio?

Jang: Mi ne estas komercisto efektive ja. (Li
detiras la kapuĉon kaj aperigas la ruĝan stelon.)
Mi estas ĈPLA-ano!

Ĉang (duondube): Ankaŭ vi estas PLA-ano?

Jang: Jes ja. Ĉu vi vidis PLA-anon?

Ĉang (singardeme): Ne, neni — am!

Jang (sidiĝas sur ŝtipa tabureto): Lastfoje mi
ne multe babilis kun vi. Ni venis ĝuste
de Ŝandong-provinco, ni estas armeo gvidata
de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio.

Ĉang: Ho, de tiel malproksime! Por kio do vi
venas ĉi tien?

Jang: Por ekstermi la banditojn! (Li prenas
hakilon kaj ĝin batfiksigas sur ligna amboso.)

Ĉang: Ekstermi la banditojn? Ĉu vi kapablas?

Jang (ekstaras): Nia ĉefa trupo nin sekvas!
Nia Ĉina Popola Liberiga Armeo akiris gran-
dajn venkojn en la Nordoriento, kaj la tuta
areo de Mudangiang jam liberiĝis. La
plejparto de la banditoj jam estas frakasita
kaj postrestas nur la obstina banditaro de
Vulturo, kiu fuĝis en primitivan arbaron en
la montaro. Ni nepre ekstermos ĝin kiel
eble plej rapide!

Ĉang (indigne): Ho, Vulturo!...

Jang: Maljuna Ĉang, Vulturo ja kruele prirabis
tium ĉi distrikton! Vi kaj via infano rifuĝis
profunde en la montaron, vi certe spertis
plene suferojn.

Ĉang (indigne sidiĝas kaj ekprenas la hakilon):...

Jang: Diru, maljuna Ĉang!

Ĉang (ne volante tuŝi la ĉagrenaĵon): Tio jam
forpasis antaŭ ok jaroj, do ni ne parolu pri
tio! (Li forjetis la hakilon.)...

Baŭ (ne povante sin deteni): Pa — ĉjo!

Ĉang (surpriziĝas kaj diras maldolĉe): Vi, Ĉang
Baŭ...

Jang (kun senlima simpatio): Diru, knabo! La
Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ sub-
tenas nin!

Baŭ: Mi diros, oĉjo, mi diros!

(Ŝi kantas laŭ *fan-erhuang daŭban*.)

*En neĝa nokt' antaŭ ok jaroj katastrof' sur
nin subite falis,*

(Laŭ *kuajsanjan*.)

*Vulturo buĉis la avinon mian kaj l' gepatrojn
miajn li forrabis.*

*Kaj oĉjo Daŝan en vilaĝo Giapi-valo min kres-
kigis.*

*Sukcesis hejmvrevni paĉjo, sed patrino mia
per falego memmortigis.*

Ho, Panjo!

*Timante ke mi falos en ungegojn persekutajn,
Min paĉjo alivestis kiel knabon mutan.*

(Laŭ *juanban*.)

*En ĉiu tago, sur la krutaj montoj ni ĉasiras.
Kaj ĉiunokte panjon kaj avinon ni sopiras.*

(Laŭ *duoban*.)

Ni rigardadis al la steloj kaj la luno,

Ni sopiradis la aperon de la suno

Kaj l' tagon kiam en libero ni paroli povos



El la oka sceno: Jang Zijong pretas sendi la militan informon pri la Tigra Monto al la persekuta taçmento.



El la kvina sceno: Jang Zijong surĉevale galopas tra neĝan arbaron kaj kun sentima heroismo penetros sola en la banditan neston.

El la sesa sceno: Jang Zijong sin montras aplomba kaj brava vizaĝe al la banditaro, kaj manifestas revolucion heroismon sagacan kaj sentiman de komunisto.



*Kaj en knabinaj vestoj mi min trovos.
Sopiras ni likvidi l' ŝuldojn sangajn de l' ok
jaroj,
Flugilojn havi, flugi sur la montojn kun pafiloj,
por ekstermo de l' luparoj!*
Paĉjo! (Ŝi sin ĵetas en la sinon de ĉasisto
Ĉang.)

Jang (kantas indigne laŭ *hipi juanban*):
*Malgranda Ĉang Baŭ ĵus akuzis la banditojn
pri ilia krimo,
Pro l' plend' el sangaj larmaj vortoj, de malam'
pleniĝas mia sino.
La subprematoj tra la mondo havas ja similan
sufer-konton,
Kaj volas venĝi sin, ho venĝi sin—kaj pro l'
verŝita sang' postuli sangon!*
(Laŭ *liuŝuj*.)
*Ekstermu Vulturon, liberigu la popolon,
Ke ĝi fariĝu mastro kaj ekvidu sun-aŭroron.
De nun sekvadu la savanton Kompartio,
Ŝanĝiĝos certe l' landa fizionomio.
Samkiel en hejmloko nia, ankaŭ tie ĉi feliĉos
mil generacioj!*

Ĉang (emocie): Maljuna Jang!

Ankaŭ li sidiĝas. Ĉang Baŭ intime donas
akvon al Jang Zijong. Jang Zijong ĝin trinkas
en unu spiro.

Ĉang: Maljuna Jang, viaj vortoj penetris en
mian koron. Sed estas malfacile ekstermi
Vulturon. Havante 27 subterajn fortikaĵojn
en 9 grupoj, li povas ataki, sin defendi kaj
forĝliti. Ja neniu povas lin tuŝi!

Jang: Ho jes, oni diris, ke eĉ la vojo al la monto
estas tre malfacile trairebla!

Ĉang: Vere tiel estas. Fronte al la monto estas
nur unu publika vojo, kiu estas tre kruta sur
altaĵoj kaj intense gardata. Kiu do povas
ĝin grimpi?

Jang: Kiel vi sukcesis descendi la monton antaŭe?

Ĉang: Dorse de la monto sin trovas unu danĝera
vojo, kiu trapasas krutegaĵojn, tial neniu
kuraĝas iri ĝin kaj la banditoj ĝin ne gardas.
Kiam mi malsupreniris la monton tra ĝi antaŭ
ok jaroj, mi falis hazarde sur forkon de arbo,
alie mi jam disrompiĝus en pecetojn!

Jang: Tre utila estas via informo pri la tiea
cirkonstanco, maljuna Ĉang. Se ni nur agos
unuanime, ne estos monta citadelo nekonke-
rebla por ni!

Ĉang: Jes! Ni ja longe atendadis la venon de
tiu ĉi tago! Hahaha! Mi ja ne volontis
trakti vin kiel fremdulon, maljuna Jang, sed
venis al ni viro kaj virino antaŭ nelonge. La
viro, kiu evidente estis bandito, tamen asertis,
ke li estas ano de la Ĉina Popola Liberiga
Armeo.

Baŭ: Mia patro vidis lin sur la Tigra Monto.
Li nomiĝas Lupa Hurlo.

Jang: Lupa Hurlo! Kion li diris krome?

Ĉang: Li nomis la virinon bofranjo, kaj diris ke...
li estas ĵurita amiko de Luan Ping.

Jang (pretervole): Luan Ping! (Li stariĝas.)

Ĉang (stariĝas): Verŝajne la virino estas la
edzino de Luan Ping. Lupa Hurlo kverelis
kun ŝi por akiri ian mapon.

Baŭ: Interligan mapon.

Ĉang: Jes.

Jang: Interliga mapo?

Ĝong Ĝiceng alvenas kaj eniras la domon.

Ĝong: Plotonestro! Revenas kamaradoj Ŝen kaj
Lju.

Ŝen Dehua kaj Lju Hongje alvenas kaj
eniras la domon.

Ŝen: Maljuna Jang, ni trovis virinan kadavron
profunde en densejo nordoriente de ĉi tie
kaj sangmakulitan ganton apud ĝi. (Li trans-
donas la ganton al Jang Zijong.)

Lju: Ĉar intensega neĝblovo kovris la piedsignojn,
ni ne povis vidi, kien la murdinto fuĝis.

Jang: Maljuna Ĉang, kredeble vi foje vidis tiun
ĉi ganton?

Ĉang (rigardas la ganton): Jes, ĝi apartenis al
Lupa Hurlo.

Jang (sendube): Certe li mortigis ŝin kaj forra-
bis la interligan mapon. Tre komplika
estas la kazo, kamaradoj, kaj ĝi koncernas
al tiu Luan Ping, kiun ni kaptis. Lju Hongje!

Lju: Tie ĉi.

Jang: Ni iros kapti la murdinton. Vi raportu
ĉion al la stabestro. Mi proponas esplorde-
mandi Luan Ping por plua informo pri la
interliga mapo!

Lju: Jes. (Li elkuras.)

Jang: Urgas la afero, maljuna Ĉang, kaj mi ne

povas pli longe interbabili kun vi. Jen ni restigu al vi bakitan rizon.

Jang Zijong demetas sian sakon de bakita rizo kaj ĝin donas al ĉasisto Ĉang; ankaŭ Ŝen Dehua malligas la sian kaj ĝin donas al Ĉang Baŭ.

Ĉang: Maljuna Jang!

Ŝen: Akceptu!

Baŭ (kortuŝite): Oĉjoj...

Jang: Ĝis revido! (Li sin turnas kaj estas ironta.)

Ĉang: Kien vi volas iri, maljuna Jang?

Jang: Mi iros persekuti Lupan Hurlon.

Ĉang: Neeble! Lupa Hurlo certe iras al la Tigra Monto. La vojoj ĉi tieaj estas malfacilaj, kaj krome nun la montoj estas kovritaj de dika neĝtavolo, do ili fariĝas netroveblaj por fremduloj. Nu, mi kaj mia infano servu kiel viaj vojevigantoj!

Jang (emocie paŝas al Ĉang): Multajn dankojn, maljuna Ĉang!

Ĉang: Ni iru!

Ĉiuj faras lianghiang-on.

— **La kurteno falas.**

SCENO IV

PLANADO PRI BATALO

Mateno. La vilaĝo Nigra Drako — tranoktejo de la persekuta taĉmento. En la komandejo vigne brulas lignokarba fajro.

Ekster la pordo hurlas ventego kaj flirtas neĝfloketoj antaŭ la fono de altaj montoj kaj densaj arbaroj.

Saŭ (neurĝe kantas laŭ *erhuang daŭban*):
Diboĉas norda vento, la arbaroj

Muĝas, skuante la montvalojn,

La pordo estas malfermita de ekblovo.
Saŭ Gianbo paŝas al la pordo kaj rigardas malproksimen.

(Laŭ *hujlong*.)

*Neĝfloketoj dancas en l'aero,
Sinvestas l' altaj montoj per arĝentmantelo —
Jen ĉarmas la nordlanda belo.*

Li fermas la pordon.

(Laŭ *erhuang manban*.)

*Tiel superba estas la patrio!
Majeste pompas ĝi kaj multvarie!
Kiel ni povas lasi lupojn ĝin detrui plie!*
(Laŭ *juanban*.)

*Montris al ni l' direkton de antaŭen-ir' la Centro de l' Partio,
Ne haltigeble ardas la flamegoj de l' revolucio.
Portante la esperon de l' popolo
PLA militiras tra mil kaj mil lioj
Por ke tra l' lando ĉie flirtu l' ruĝa flag' en gloro.*

*Usono kaj Ĉiang koluzie ruzojn kovas,
Diversajn artifikaĵojn provas,
Atakas nin jen kaŝe jen malkaŝe
Kaj per pactrakto falsa trompas ĉiupaŝe.
Sed ni kun la justeco en la manoj
Kaj en la brust' profunda malamego
Batalos unu kontraŭ deko
Kaj ĵetos ĉiujn malamikaĵojn al ekstermaj flamoj!*

Jang Zijong envenas.

Jang: Raporton!

Saŭ (aŭdinte lian voĉon): Maljuna Jang!

Jang Zijong venas en la domon. Saŭ Gianbo rapide paŝas al li.

Saŭ: Ĉu vi jam kaptis la murdinton?!

Jang: Jes! Jen estas letero kaj interliga mapo, kiujn ni trovis ĉe li. (Li donas al li la mapon kaj leteron.)

Saŭ: Tre bone!

Jang: Tre malfacile troveblaj estas la vojoj en tiu ĉi distrikto. Feliĉe la ĉasisto Ĉang helpis nin kiel nia gvidanto! La murdinto pretendis esti rekognoskanto de nia armeo, sed la ĉasisto Ĉang senmaskigis lin kaj nur tiam li konfesis, ke li estas viro de la Tigra Monto. Li nomiĝas Li Ĉonghaŭ kaj lia kromnomo estas Lupa Hurlo.

Saŭ: Tre bone! La ĉasisto donis al ni grandan helpon. Antaŭ longe Prezidanto Maŭ jam instruis al ni: “**La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia apogo.**” Se ni nin disigus de la popolo, ni ne povus fari eĉ paŝeton!

Jang: Ho jes! Kaj krome, la ĉasisto Ĉang montris al ni du vojojn kondukantajn sur la monton. Mi jam faris malnetan mapon laŭ la direkto montrita de li. (Li donas al li la malnetan mapon.) Lupa Hurlo konfesis la publikan vojon fronte de la monto. Li diris, ke tie ne

troviĝas defendaj fortikaĵoj kaj estas tre facile suriri la monton laŭ tiu vojo.

Ŝaŭ: Hm! Evidente tio estas mensogo. Ĉu vi jam faris taŭgan aranĝon por la ĉasisto kaj lia filino?

Jang: Ni restigis nian bakitan rizon al la ĉasisto, kaj ili intencas translokiĝi al Giapi-valo.

Ŝaŭ: Bone! (Li rigardas la mapon kaj legas la leteron.) He, maljuna Jang, en sia konfeso Luan Ping ja ne parolis pri tiu ĉi mapo.

Jang: Ne. Lupa Hurlo diris, ke ĝi montras la lokiĝon de tricent sekretaj interligaj punktoj en la Nordoriento kontrolatajn de Cic-monto. Tio ĉi estas vere grava afero!

Ŝaŭ: Luan Ping jam estas alportita. Ni tuj esplordemandu lin por bone informiĝi pri la mapo.

Jang: Bone, mi iru por alporti lin. (Li volas ekiri.)

Ŝaŭ: He, maljuna Jang, Luan Ping estas via malnova kontraŭulo. Denove vi faru la demandadon.

Jang: Jes.

Ŝaŭ iras en la internan ĉambron.

Jang (al la gardstaranta batalanto ekster la pordo):
Malgranda Ĝang!

Malgranda Ĝang: Jes.

Jang: Alportu Luan Ping.

Malgranda Ĝang: Jes.

Malgranda Guo eskortas Luan Ping en la domon. Ekvidante Jang Zijong, Luan Ping volas lin saluti.

Jang Zijong montras al li seĝon kaj Luan Ping sidiĝas.

Jang: Luan Ping!

Luan: Jes.

Jang: Ĉu vi ĉion konfesis lastatempe?

Luan: Mi ja volas konfesi kaj diri kion mi devas konfesi.

Jang: Vi ankoraŭ ne konfesis pri iu objekto.

Luan: Mi jam havas nenion, krom la vestoj portataj, via moŝto!

Jang (ekster lia atendo): Mapon!

Luan: Mapon!

Jang: Interligan mapon!

Luan (surpriziĝas): O! (kun ŝajnigita aplombo) Mi pripensu... (Li ŝajnegas sin pensanta.) O, jes, jes, nun mi ekmemoras. Mi aŭdis, ke Klabo Hju havas sekretan interligan mapon.

Jang: Vi aŭdis!?

Luan: Ne miskomprenu, via moŝto. La mapo estas la plej kara trezoro de Klabo Hju, kaj mi neniam eĉ vidis ĝin.

Jang: Vi devas kompreni nian politikon, Luan Ping!

Luan: Mi komprenas, mi komprenas! Indulge trakti krimkonfesinton kaj rigore puni rezistanton.

Jang: Diru al mi, kio vi estas sur Cic-monto?

Luan: Tion vi ja scias, mi estas interliga adjutanto.

Jang: Sed interliga adjutanto ne konfesas la interligajn punktojn, nek vidis la interligan mapon. Hm! Videble vi ne volas diri la veron.

Luan Ping ŝajnegas sin senrimeda.

Jang (subite): Lin eskortu for!

Guo: Iru!

Luan (manapogante la seĝon en timego): Ne, ne! Mi... (sin vangfrapante) mi estas damninda, damninda! Mi petas pardonon de via moŝto! Nun mi diru la veron, ke vere troviĝas sekreta interliga mapo. Sur ĝi estas markitaj tricent sekretaj interligaj punktoj de Klabo Hju en la Nordoriento! Ĝi estas en la manoj de mia edzino. Tial mi petas, ke vi ellasu min, ke mi trovu ŝin por preni la mapon, ĝin prezenti al via moŝto kaj tiel fari kontribuon por kompensi la krimon kaj ricevi pro tio malseveran punon. (Li riverencas.)

Jang: Ankoraŭ kiujn lokojn vi kontaktis krom tiuj tricent?

Luan: Aliajn lokojn? Krome nur Vulturon mi kontaktis. Vulturo tamen delonge deziras, ke li sola tenu hegemonion super norda Manĉurio. Li unuiĝas kun Klabo Hju nur ŝajne sed ne kore, tial mi tre malofte kontaktiĝis kun li. En la pasinta jaro, oni invitis min al la centkoka festeno okazigita por celebri la naskiĝtagon de Vulturo, sed mi ne iris ĝin ĉeesti.

Jang (atente aŭskultas lian konfeson): Vi devas senartifike konfesi la veron! Detale skribu ĉiujn interligajn punktojn por mi.

Luan: Jes, jes.

Jang: Elportu lin!

Guo: Iru! (Li eskortas Luan Ping eksteren.)

Ŝaŭ venas el la interna ĉambro.

Jang: Vere ruza estas la aĉulo!

Ŝaŭ (humure): Kiel ajn ruza estas la vulpo, ĝi tamen ne povas ne esti kaptita de lerta ĉasisto! Lia konfeso pri la interliga mapo tamen koincidis kun tiu de Lupa Hurlo.

Jang: Kaj krome li eldiris la centkokan festenon pretervole.

Ŝaŭ: Jes.

Jang: En tiu ĉi letero Vulturo denove invitis lin suriri la monton por ĉeesti la festenon. Mi pensas, ke en tio ĉi ankoraŭ kaŝiĝas io.

Ŝaŭ: Prave.

Ŝen Dehua envenas.

Ŝeŭ: Raporton!

Ŝaŭ: Envenu.

Ŝen Dehua eniras la domon.

Ŝen: Stabestro, la kamaradoj malpacience deziras ataki la Tigran Monton kaj ĉiuj prezentas petskribon por batalo!

Ŝaŭ: Kredeble vi donis ekzemplon por tio. Ĉu ne?

Ŝen: Mi.....

Ŝaŭ: Hahahaha! (Li sidiĝas apud la lignokarba forno.) La deziro de la kamaradoj estas komprenebla. Nun frataj trupoj jam fermis la pramejojn kaj gravajn vojojn en la areo de Mudangiang. Vulturo certe ne povos forkuri! Sed tiu ĉi aĉulo estas nefacile traktebla. Ni jam diskutis plurfoje, ĉu ne? Klopodi ekstermi la banditojn per granda trupo ja similas al batado de pulo per pugno. Tio ne taŭgas. Ankaŭ ne taŭgas logi ilin malsupreniri la monton por ilin ekstermi parton post parto, ĉar urĝa estas nia tasko. Tiu ĉi estas eksterordinara batalo! Ni devas bone memori la instruon de Prezidanto Maŭ: malestimi la malamikon strategie, sed plene taksi la malamikon taktike! Kunvoku refoje demokratian kunvenon, kamarado Dehua, por fari bonan diskutadon laŭ la nova situacio.

Ŝen: Jes. (Li eliras.)

Jang Zijong deziras eliri.

Ŝaŭ: He, maljuna Jang, kian ideon vi havas?

Jang: Mi proponus refoje esplordemandi Lupan Hurlon por pli bone informiĝi pri la aranĝo de centkoka festeno sur la Tigra Monto.

Ŝaŭ: Bone! Mi atendas, ke vi elcerbumos bonan ideon!

Jang: Jes. (Li eliras.)

Ŝaŭ (kantas laŭ *hipi kuajsanjan*):

Klopodojn niajn en la lastaj tagoj por inform' pri l' malamiko riĉrikolto rekompencis, Ni zorge analizis, kaj l' batalan planon re kaj re pripensis.

La Tigra Monto estas provizita per subteraj fortikaĵoj kaj tuneloj, Do por ĝin kapti ni sagacon uzu en prefero. Por fordetrui de interne kaj ekstere l' neston de l' banditoj,

Ni devas sendi lertan viron en banditaj vestoj en la koron de la malamiko. Sed por plenumi l' gravan taskon kiun do ni sendu?

(Li pripensas.)

(Laŭ *juanban*.)

Por fari ĉi aferon Jang Zijong ja tute kompetentas, Li, filo de kampul-dungito, estas bonkvalita, De l' infanaĝo li baraktis en sufer' sang-ŝvita. Kun arda venĝavido serĉis li savanton sian, La Kompartion trovis kaj suriris vojon la revolucian.

(Laŭ *erliu*.)

Post rekrutig' li ĵuris elradiki ekspluaton,

Centfoje li batalis brave, multe faris meritaĵojn. Li plurajn fojojn eksplodigis malamikajn fortikaĵojn per sagaco, Kaj ankaŭ savis multe da kunbatalantoj kaj sam-patrianoj el bandita nesto.

Multfoje li batalis kun banditoj en arbara oceano, Kaj kaptis Luan Ping, Hu Biaŭ ankaŭ Lupan Hurlon.

Se en la danĝerejon ni ĉifoje sendos lin en solo, Mi kredas, ke kun fajroruĝa koro kaj ŝtalfirma volo,

Li certe povos venki la Vulturon.

Ŝen Dehua envenas kaj iras en la domon.

Ŝen: Stabestro!

Ŝaŭ: Kiel iris la demokratia kunveno, kamarado Dehua?

Ŝen: Ni faris detalan studon pri la malamiko kaj konvinkiĝis, ke ni povas kapti ĝian neston nur per sagaco sed ne per forta atako kaj ni nepre



El la sepa sceno: Stabestro Ŝaŭ Gianbo (meze) gvidas la persekutan taĉmenton mobilizi amasojn en Giapi-valo, kaj la popolamasoj firme petas permeson por ataki la Tigran Monton kune kun la PLA-anoj.

devas sendi iun kamaradon penetri en la neston de la banditoj...

Ŝaŭ: Jes. Ni interparolu pri tio!

Jang Zijong alvenas kaj eniras la pordon. Ŝaŭ Gianbo pririgardas lin kaj Ŝen Dehua lin rigardas kun miro.

Jang: Mi Hu Biaŭ venas por prezenti al vi mapon! (Li riverencas en bandita maniero.)

Ŝaŭ: Hu Biaŭ? Maljuna Jang, hahahaha!

Ŝen: Maljuna Jang!

Jang: Hahahaha! (Li sidiĝas)

Ŝaŭ: Tuj diru al ni vian ideon.

Jang: Mi opinias, stabestro, ke la plej bona maniero por kapti la Tigran Monton estas per sagaco.

Ŝaŭ: Jes.

Jang: Kaj la centkoka festeno de la malamiko estas bona ŝanco.

Ŝaŭ: Ĉu vi jam scias ĉion pri tio?

Jang: Jes. La lasta tago de la lasta monato de lunkalendaro jaro estas la naskiĝtago de Vulturo kaj tiutage festeno kun kokoj el cent familioj estas donata, kaj ĝi estas nomata cent-

koka festeno. (Li stariĝas.) Mi proponas, ke ni sendu iun kamaradon penetri en la banditaron, por ke li bone konu la fortikaĵojn kaj tunelojn kaj poste kolektu la banditojn en la Tigran Halon profitante la festenon kaj ilin ebrigu per alkoholaĵo...

Ŝaŭ: Nia taĉmento suriru la Tigran Monton eksteratende, kaj faru surprizatakon al ili!

Jang: Jes, stabestro. Do asigu la taskon al mi!

Ŝen: Ankaŭ aliaj kamaradoj proponis, ke maljuna Jang prenu tiun ĉi taskon!

Ŝaŭ: Jes, bone! Kamarado Dehua, (li transdonas la interligan mapon al li.) Prenu la mapon kaj faru kopion. He, krome vi sciigu, ke ni okazigu komitatan kunvenon de la partia filio iom poste.

Ŝen: Jes! (Li eliras.)

Ŝaŭ: Ĉu vi estas certa pri sukceso en tio, maljuna Jang, ke vi alivestu vin en banditon por penetri en la citadelon de la Tigra Monto?

Jang: Mi posedas tri favorajn kondiĉojn.

Ŝaŭ: La unua?

Jang: Klabo Hju de Cic-monto ĵus falis kaj mi povas alivesti min en lian ĉeval-bredan adju-

tanton Hu Biaŭ, kiu estas nun en niaj manoj kaj neniam vidita de Vulturo; kaj krome mi bone scias la ĵargonon de la banditoj kaj ne povos esti malkaŝita.

Ŝaŭ: La dua?

Jang: Mi portos la interligan mapon al Vulturo kiel interkonan donacon kaj certe akiros lian fidon.

Ŝaŭ: Bone.

Jang: Kaj plej grava estas la tria kondiĉo...

Ŝaŭ: Kaj ĝi estas la eterna fideleco de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, al la Partio kaj al Prezidanto Maŭ!

Jang (elkore): Vi vere komprenas min, stabestro!

Ŝaŭ (kun profunda amo): Tiu ĉi tasko ne similas al la antaŭaj, maljuna Jang!

Jang: Stabestro!

(Li kantas laŭ *hipi juanban* kun komenco en libera takto.)

Kompartiano sekvas la alvokon de l' parti' en faroj

Kaj prenas sur sin ĉiam pezan taskon kun fervoro,

Volante nepre rompi la katenon de mil jaroj

(Laŭ *erliu*.)

Mi bone scias, ke survoje trovas sin danĝeroj,

Sed spite tion mi des pli impetos kun kuraĝo,

(Laŭ *kuajban*.)

Havante firman volon de l' Malsaĝa Avo,

Ni povas venki ĉian malfacilon,

Por haki la diablojn ĝi fariĝu akra glavo!

Ŝaŭ: Bone! Vi rajdu sur la bronzkolhara ĉevalo de Klabo Hju kaj veturu nordorienten laŭ la vojo montrita de la ĉasisto Ĉang...

Jang: Por ĉirkaŭvoje suriri la monton.

Ŝaŭ: Post via foriro, la persekuta taĉmento enmarŝos Giapi-valon por mobilizi la amasojn, aktive prepari sin por batalo kaj atendi vian informon!

Jang: Mi metos la sekretan sciigon al vi en la pinarbaron sudokcidente de la Tigra Monto laŭ la konsentita signo.

Ŝaŭ: La 26-an de la kuranta monato, mi sendos Ŝen Dehua al tiu loko por preni vian informon.

Jang: Mi garantias ĝin elsendi al vi ĝustatempe.

Ŝaŭ: Bone. Ricevinte vian informon, la persekuta taĉmento tuj ekmarŝos por ataki la obstinan banditaron de Vulturo de interne kaj ekstere kaj ĝin ekstermi sur la Tigra Monto!

Jang: Tiu ĉi batala plano estas perfekta, stabestro. Do tiel decidiĝu la afero!

Ŝaŭ: (emocie tenas la brakon de Jang Zijong. Kaj post paŭzeto li ekparolas.)

Kamarado Zijong! Estu kuraĝa kaj samtempe singardema!

(Li kantas laŭ *hipi kuajban*.)

Sendube povas vi plenumi l' gravan taskon kun sukceso,

Ĝi havas ja signifon gravan por la ag-progreso.

Por ĝin decidi rekunvenos la filia komitato,

La malamikon venku ni per kolektiva saĝo en agado.

Jang Zijong kaj Ŝaŭ Gianbo faras *lian-hiang-on*, firme manpreman unu la alian.

—La kurteno falas.

SCENO V

MORTIGO DE TIGRO KAJ ASCENDO DE L' MONTO

Kelkajn tagojn post la lasta sceno.

Piedo de la Tigra Monto. Dika neĝtavolo kaj densa arbaro. Gigantaj pinoj leviĝas en nubon. Sunradiaj faskoj penetras en la arbaron.

Jang (vigle kantas laŭ *erhuang daŭban* post la kuliso):
Trarajdas kun kuraĝ' ĉiele alta mi neĝstepon kaj arbaron!

Alivestita Jang Zijong engalopas vipante sian ĉevalon kaj dancas kvazaŭ rajdanta jen tra arbaro, jen trans monttorenton, jen sur monteĝon, jen malsupren de kruta deklivo. Dum la galopado li ĉirkaŭrigardadas.

Jang (kantas laŭ *hujlong*):
Kun nobla vol', heroa celo, frontas mi al l' altaj montoj.

(Laŭ *manban*.)

Por ke jam flirtu ruĝaj flagoj tra la tuta mondo,
Sentime mi min fetus sur glav-monton aŭ en fajran maron.

Mi deziregas, ke degelu tuj jam la neĝeroj,

(Laŭ *sanban*.)

Ke nian mondon nun jam regu bela primavero!

(Laŭ *hipi kuajban*.)
Kaj saĝon kaj kuraĝon al mi donis la Partio,
Do ĉia malfacilo kaj danĝero por mi estas ja nenio.

*Por forekstermi la banditojn mi ŝajngas min
bandito,
Kaj l' Tigran Monton enpenetras kiel bajoneto.
Mi furas enterigi vale la Vulturon,
Mia heroo vol' tremigas la rokmuron.
La kamaradoj kaj mi rekuniĝos ĉe l' centkoka
festo,
Kaj certe ni renversos tute la banditan neston!*

Malproksime aŭdiĝas muĝo de tigro. La ĉevalo surpriziĝas kaj faletas. Jang Zijong restarigas la ĉevalon per vipfrapo, turnas kaj haltigas ĝin kaj salte deĉevaliĝas. Iom post iom proksimiĝas la muĝado kaj Jang rapide eliras tirante la ĉevalon. Li envenas denove. Rapide li demetas sian surtuton, elprenas sian pistolon kaj ekpafas al la tigro. La tigro muĝas dolore kaj mortas.

Aŭdiĝas pafoj de malproksime.

Jang (krias tuj poste kun singardemo): Pafoj! Banditoj descendas la monton. (aplombe) Mi ĵus mortigis unu beston, kaj nun venas tuta grego, sed vi same ne povos eskapi la sorton de pereco!

La bandita stabestro krias post la kuliso: "Haltu!" Li envenas kun la banditoj.

Jang Zijong surmetas la surtuton, brave paŝas al ili kaj ilin salutas en bandita maniero.

B. stabestro: "Kien glitas fungo? Kia prezo?"*

Jang (ne respondas kun levita kapo):

Bandito A (vidante la tigron mortigitan de Jang Zijong ekkrias kun timo): Tigro! Tigro, tigro!

La banditoj panike retropaŝas de la tigro.

Jang: Hahahaha! Kiaj kuraĝuloj! Ĝi estas tigro mortinta.

Bandito A (ekrigardas al ĝi): Kiel lerta pafisto! Disrompiĝis ĝia frunto!

B. stabestro: Ĉu vi pafmortigis ĝin?

Jang: Ĝi sin ĵetis al miaj kugloj.

B. stabestro: Nu, brave! Al kiu monta citadelo vi apartenas? kaj por kio vi venas ĉi tien?

Jang (kontraŭdemandas): Verŝajne vi apartenas al la Tigra Monto?

B. stabestro: Hmhm! Sendube. (Li ekkonscias pri sia neglektemo.) Nu! Al kiu monto vi apartenas finfine?

Jang: Pri tio vi ne demandu. Mi volas persone vidi brigadestron Cuj por raporti al li gravan aferon.

B. stabestro: Kial vi ne scias eĉ la regulojn de la monto? Videble vi ne estas "liuzi" sed "kongzi"!**

Jang: Se mi estus "kongzi", mi ja ne kuraĝus veni riskeme al la Tigra Monto!

B. stabestro (minace): "Moha? Moha?"**

Jang Zijong havas pretan ideon kaj ne respondas kun levita kapo.

Banditoj: Diru!

Jang (fiere): Antaŭ ol mi vidos brigadestron Cuj, vi neniel akiros mian respondon!

B. stabestro (senrimede): Bone! Ni iru! Kie estas via pafilo?



*El la sepa sceno:
Sub la helpo de intimoj PLA-anoj, fervojisto Li Jongki (maldekstre) altigis sian klasan konscion kaj faris firmam decidon ataki la banditaron kaj revolucii sekvante la Komunistan Partion.*

Jang: Ne timu!

Jang Zijong ĵetas sian pistolon al bandito A, kaj montras al li per gesto, ke oni portu la tigron kaj tiru la ĉevalon.

B. stabestro: Portu la tigron kaj tiru la ĉevalon!
Banditoj: Jes!

Jang Zijong faras *lianghiang*-on. Li iras antaŭen firmpaŝe, aplombe kaj brave.

—La kurteno falas.

S C E N O VI

PENETRO EN LA BANDITAN NESTON

Tuj post la antaŭa sceno.

La Tigra Halo en malhela kaverno. Pendas kelkaj lampoj.

Vulturo sidas en seĝo. La “Ok Kolonoj” senorde staras ambaŭflanke. Aliaj banditoj staras malantaŭe de la maldekstra parto en la Halo.

Vulturo geste montras al la stabestro, ke oni enportu la veninton.

B. stabestro: Lia Moŝto la Tria ordonas enporti “liuzi”!

Banditoj: Enportu “liuzi”!

Jang Zijong envenas grandpaŝe kun levita kapo.

Jang (kantas laŭ *hipi kuajban*):

*Kvankam en tigra nest' mi estas sola en batalo,
Tamen, apude staras kvazaŭ l' tuta klasfrataro.
Malgraŭ la kruelec' milfute alta de Vulturo,
Kontraŭ l' demonoj luktos mi por la popol' kun
fort' kaj vol' de ŝtalo.*

Jang Zijong iras antaŭ ilin kaj salutas laŭ bandita maniero.

Vulturo (subite): “La Reĝ' Ĉiela regas Tigron Teran!”*

Jang: “Pagodo subigas hidron!”*

La Kolonoj: “Moha? Moha?”*

Jang: “Tagmeze oni alparolas homon, neniu havas sian domon!”*

Vulturo: “Kial ruĝas la vizaĝo?”*

Jang: “Ĉar mi estas sana!”*

Vulturo: “Kial nun ĝi flaviĝas?”*

La banditoj minace alproksimiĝas al li kun glavoj kaj pafiloj.

Jang (aplombe): “Pro frosto mi ĝin ŝmiris per vakso!”*

Vulturo pafestingas olean lampon. Jang Zijong transprenas pistolon de la bandita stabestro kaj estingis du oleajn lampojn per unu pafado. La banditoj ekfluŝas unu al alia kun miro kaj la Kolonoj tion ĉesigas.

Vulturo: Mm, laŭ via diro, do vi estas homo de brigadestro Hju?

Jang: Ĉevalbreda adjutanto de brigadestro Hju — Hu Biaŭ!

Vulturo: Hu Biaŭ? Diru al mi, kiam vi ekservis al brigadestro Hju?

Jang: Kiam li fariĝis policestro.

Vulturo: Oni diras, ke brigadestro Hju havas kelkajn plej ŝatatajn objektojn?

Jang: Du trezoraĵojn.

Vulturo: Kiujn nome?

Jang: Bonan ĉevalon kaj akran glavon.

Vulturo: Kian ĉevalon?

Jang: Bronzkolharan kun bukla hararo.

Vulturo: Kian glavon?

Jang: Japanan sabron por komandanto.

Vulturo: Kiu donacis ĝin al li?

Jang: La Japana Mikada Armeo.

Vulturo: Kie ĝi estis donacita?

Jang: En Vuhe-pavilono de Mudangiang!

Vulturo (post paŭzo): Mm, vi diras, ke vi estas ĉevalbreda adjutanto de brigadestro Hju, sed kial mi vidis nur adjutanton Luan Ping, sed ne vidis vin en la kunveno kunvokita de komisiito Hoŭ?

Jang: Via Brigadestra Moŝto, mi estas nur ordinara servanto ĉe brigadestro Hju. Kiel mi povus min kompari kun adjutanto Luan, kiu ĉiam okupas sin per la gravaj aferoj!

Vulturo: Por kio vi venas al la Tigra Monto?

Jang: Por servi al Via Moŝto kaj havi prosperan estonton. Sed hodiaŭ je mia unuafaja alveno,

*jargono de banditoj.

vi, frategoj, estas tiel suspektemaj kontraŭ mi.
Ĉu tio ne estas iom kontraŭ la kavaliroco?

Vulturo: Hihihhi! Tion ni faris ja por la sekureco de la citadelo.

La Kolonoj: Hahahaha!

Vulturo: Hu Biaŭ, kiam falis la cic-monta citadelo?

Jang: La trian de la dekdua luna monato.

Vulturo: Kial vi vojaĝis tiel multe da tagoj por veni ĉi tien?

Jang: Estis nefacile por mi veni ĉi tien, Via Moŝto. Post la falo de la cic-monta citadelo, mi min kaŝis plurajn tagojn en Bajsongvan.

Vulturo: Bajsongvan?

Jang: Tie loĝas la tria onklo de Luan Ping.

Vulturo: Ĉu vi vidis Luan Ping?

Jang: Jes, mi vidis lin.

Vulturo: Kaj kiel estas Lupa Hurlo?

Jang: Lupa Hurlo?

Vulturo: Jes.

Jang: Mi ne scias.

Vulturo: Vi jam venis, Hu Biaŭ. Sed kie estas Luan Ping?

Jang: Luan Ping?

Vulturo: Jes.

Jang: Ej! Prefere ne parolu pri li!

Vulturo: Pro kio?

Jang (ĉirkaŭrigardas banditojn): Mi....

Vulturo signas al banditoj kaj ĉi tiuj eliras.

Vulturo: Kio okazis al adjutanto Luan, Hu Biaŭ?

Jang: Longa estas la historio! (Li kantas laŭ *hipi hiaŭdaŭban.*)

Je pens' pri Luan Ping tuj indignas mia koro—

Vulturo: Kion li faris?

Jang (kantas laŭ *hipi juanban*):

Neniom zorgas li pri nia solidaro.

Vulturo: Ej, en kio li ne zorgas pri solidareco?

Jang (kantas plu):

*Sukcesis ni forfuĝi kune je l' cic-monta falo,
Mi lin persvadis veni servi al ĉi mont' en paro.*

La Kolonoj montras kontentecon.

Vulturo: Ĉu li volas veni?

Jang (daŭrigas la kanton):

*Kvankam li, kiel ĉiu rajtas havi propran volon,
Sed li ne devis...*

Sed li ne devis fari ja ofendparolon.

Vulturo: Kion li diris?

Jang: Li diris....

Vulturo: Kion?

Jang: Oj!

Vulturo (senpaciencege): Ej, diru, maljuna Hu, diru tuj!

Jang: Li diris —

(Li kantas daŭre.)

Komisiiton Hoŭ obei devas ankaŭ —

Vulturo: Kiu?

Jang (kantas daŭre):

Vulturo.

Vulturo (kolere saltleviĝas): Ho! Kio? Mi devas obei lin?!

La Kolonoj: Al diabloj! Kia sentaŭgulo!

Jang: Tio ankoraŭ ne estis ĉio kion li diris!

La Kolonoj: Kion li diris krome?

Jang (kantas daŭre):

Kaj la Kolonoj estas nur nemenciindaj uloj.

La Kolonoj (kolerege krias): Ho! Bastardo!

Jang (kantas laŭ *hipi liuŝuj*):

*Li diris ke fenikso li okupi devas altan lokon,
Komisiiton Hoŭ potencan prenos li kiel apogon.*

La Kolonoj: Al diablo!

Jang (kantas daŭre):

Dirante li elprenas mapon —

Vulturo: Mapon?

Jang (kantas daŭre):

Jen trezoran!

Vulturo avide iradas ĉirkaŭ Jang Zijong.

Jang (kantas laŭ *hipi jaŭban*):

*Li volis doni ĝin al Moŝt' Komisiita por akiri
rangon gloran.*

Vulturo: Ĉu ĝi estis la interliga mapo?

Jang: Jes, ĝuste la sekreta interliga mapo.

Vulturo (maltrankvilege): Do li jam prezentis la la mapon al komisiito Hoŭ?

Jang: Ne maltrankviliĝu.

(Li daŭrigas sian kanton kaj sur lia vizaĝo aperas ironia rideto.)

Pro ĝoja rid' l' okuloj liaj iĝis du linioj,

Vulturo: Hm!

Jang (daŭre kantas):

Kaj el la domo elportiĝis —

(Laŭ *hipi liuŝuj*.)

Jen barel' da vino.

*Mi verŝis en lin en sinsekv' tasegojn ok da tio,
Kuŝiĝis Luan Ping pro ebrio kvazaŭ mola ŝlimo.*

La Kolonoj: Hahaha...li ebriiĝis.

Jang: Tiam profitante la ŝancon de lia senkonsciigo...

Vulturo: Mm!

Jang: Mi....

Vulturo: Buĉis lin!

Jang: Tion mi ne povis fari; ni estas amikoj de multaj jaroj!

Vulturo: O— o— (ŝanĝas sian tonon) Jes, jes, jes gravas la amikeco, gravas la amikeco! Daŭrigu vian parolon, maljuna Hu!

Jang: Li havis sian kalkulon, sed ankaŭ mi la mian.

Vulturo: Kion vi faris?

Jang: Mi —

Vulturo: Mm!

Jang (daŭrigas sian kanton):

*Je l' ŝanco mi surmetis tuj ĉi veston de la viro,
Sur la ĉevalo bronzkolhara rajdis tra neĝblovo,
Galopis mi al Tigra Monto en nur unu spiro.*

Vulturo: Laŭ via diro, maljuna Hu, la interliga mapo troviĝas en viaj manoj?!

Jang (ridetas): Hahahaha!

(Laŭ *hipi kuajban*.)

*Rigardu, brigadestro Cuj, al via moŝta povo
La mapon mi prezentas laŭ via deziro. (Li levas la mapon)*

Jang Zijong staras sur alta loko. Vulturo ĝin prenas foriginte la polvojn de sur siaj

manikoj kaj ekrigardas ĝin. Ankaŭ la aliaj banditoj ekrigardas ĝin.

Vulturo (kantas laŭ *hipi sanban*):

*Mi sopiradis tage-nokte pri la map' trezora,
Hodiaŭ, fine plenumiĝis la deziro kora.*

(Li ekridegas freneze.) Hahahaha!

La Kolonoj: Brava estas maljuna Hu! Vere brava viro!

Jang (duoblasence): Post akiro de la interliga mapo, brigadestro Cuj, la arco de Mudangiang ja fariĝis nia!

Vulturo: Jes, jes, jes, prave diris maljuna Hu. Tuj kiam la kuomintanga armeo alvenos, mi jam fariĝos komandanto. Kaj vi ĉiuj tiam fariĝos aŭ diviziestro aŭ brigadestro.

La Kolonoj: Tio dependos de Via Moŝto la Tria, hahahaha!

Jang (rikanas): Hihihih!

Vulturo: Vi faris grandan kontribuon al la citadelo de la Tigra Monto, maljuna Hu, tial mi nomas vin la Naŭa Kolono de la Tigra Monto.

Jang: Dankon al Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Estante parto de la kuomintanga armeo, ni devas havi rangojn kaj titolojn! Mi nomas vin kolonelo-vicregimentestro de la Kvina Sekuriga Brigado de Harbin-Sujfenhe-Tumen-Giamusi

Jang (surpaŝas la ŝtuparon): Dankon pro la favoro de Via Moŝto la Tria! Mi esperas, ke vi, frategoj, estos pardonemaj al miaj mankoj en la estonto!

La Kolonoj: Kompreneble, kompreneble.

B. stabestro: Alportu vinon!

La Kolonoj: Alportu vinon!

Envenas banditoj kaj disdonas vinon.

B. stabestro: Ni trinku pro la glora promociigo de la Naŭa Frato!

La Kolonoj: Ni trinku pro la glora promociigo de la Naŭa Frato!

Vulturo: Li faris grandan kontribuon per prezento de la mapo kaj grandan dankon li meritas!

Jang (en impona digneco li kantas laŭ *hipi kuaj-erliu*):

*Hodiaŭ ĝoje trinkas mi pro mia kontribu',
Kaj por atingi l' altan celon mi strebados plu.
Mi montros mian kapablecon en la estonteco,*

Kaj historion skribos mi per mia sangoflu'.

Kun venka rideto Jang Zifong eltrinkis la vinon per unu gluto.

Jang (heroe): Hahahaha!

—La kurteno falas.

S C E N O VII

MOBILIZO DE LA AMASOJ

La vilaĝo Giapi-valo. Ĉe la domo de Li Jongki.

Tagmezo. Furiozas neĝblovo.

Patrino Li (kantas laŭ *erhuang jaŭban*):

*Malsana mi malhavas grenon, vokas vane l'
filon,
En kiu tag' ni mizeruloj venĝos la sangkrimojn?*

Ĝang Daŝan envenas.

Ĝang: Onklino.

Patrino Li: Ho, Daŝan!

Ĝang Daŝan venas en la domon.

Ĝang: Ĉu vi fartas pli bone hodiaŭ, onklino?

Patrino Li: Ellitiĝinte ĉi-matene mi sentas ankoraŭ pli fortan kapturniĝon.

Ĝang: Onklino, jen iom da batat-radikoj...
(Li donas batat-radikojn al ŝi.)

Patrino Li (interrompante): Daŝan, vi denove...

Ĝang: Nun Jongki forestas, onklino, vi tamen povas ricevi nian helpon!

Ĝang Daŝan boligas akvon.

La patrino de Li Jongki iras en la internan ĉambrom kun la batat-radikoj.

Puŝante la pordon rapide eniras Li Jongki en difektitaj vestoj kaj kun longe ne razitaj lipharoj.

Ĝang (surpriziĝas): Jongki!

Li: Daŝan!

La patrino de Li Jongki venas el la interna ĉambro.

Li: Panjo!

Patrino Li: Jong—ki—!

(Ŝi kantas laŭ *erhuang sanban*.)

*Ĉu mi la filon karan vidas nur en sonĝo?
Ho, vi vundplenas! Kiel min doloras la sufero!
Ja kiel vi sukcesis
(Laŭ *erhuang erliu*.)
Savi vin el tigra faŭko?*

Li (kantas laŭ la sama melodio):

Mi saltis de montdorsa rok' kaj fuĝis el danĝero.

Patrino Li (kantas daŭre):

*Je la revido ĝojon triston mi samtempe sentas,
Sopir' pri l' bofilin' kaj nep' pli forte min turmentas!*

Li (kantas laŭ *erhuang duoban*):

*Ho, kiom da suferoj kaj kiom da malamo!
Mi ĉion tenos firme en mia kora konto.
Fariĝos la malamo potenca fajra flamo,
Por ĉiujn malamikojn detruu en l' estonto!*

Amasoj krias post la kuliso: "Soldatoj venas en la vilaĝon!"

PLA-anoj krias post la kuliso: "Ne foriru, samlokanoj! Ni estas viaj intimuloj!"

Ĝang: Ho, Vulturo venas denove!

Li: Por min persekuti!?

Ĝang: Tuj kaŝu vin, mi iros pririgardi. (Li elingigas la ponardon kaj eliras.)

Patrino Li: Kaŝu vin, mia infano! Nu?

Li: Kaŝi? Kie mi povus min kaŝi, panjo? Mi timas jam nenion! Mi ne mortos vane hodiaŭ, se mi sukcesos mortigi unu, kaj mia morto estos rekompencita superflue, se mi sukcesos mortigi du!

Patrino Li: Jongki, vi...

Envenas Ĝong Ĝiĉeng kaj Lju Hongje.

Lju (frapas sur la pordo): Ĉu estas samlokanoj dome?

Li: Jes! Ankoraŭ ne mortis ĉiuj!

Lju: Samlokano!

Ĝong: Onklino!

Li Jongki subite malfermis la pordon. Ĝong Ĝiĉeng kaj Lju Hongje eniras la domon. Ĝong Ĝiĉeng fermas la pordon.

La patrino de Li Jongki surpriziĝis kaj sin movas al la filo por lin protekti.

Lju: Ne timu, onklino, ni estas...

Li: Diru simple kion vi volas!

Lju (al Li Jongki): Ni estas la Ĉina Popola Liberiga Armeo, samlokano!

Li (esplora rigardante la alparolanton): Hm! Da tia "armeo" kaj ĉi tia "armeo" mi ja vidis tre multe, sed kiu scias, kia armeo vi estas!



El la naŭa sceno: Kun forta klasa malamo Ĉang Baŭ (la dua de maldekstre), la filino de la ĉasisto, firme petas partopreni la batalon por ekstermi Vulturon.

Diru rekte kion vi volas! Monon, ni ne havas! Grenon, vi jam forrabis tute! Vivon. . . .

Patrino Li: Jongki!

Ĝong: Samlokano, ni estas armeo de la laboristoj kaj kamparanoj, kaj nia devo estas protekti la popolon!

Li: Bele vi parolas!

La patrino de Li Jongki eksentas kapturniĝon.

Li: Panjo!

Lju (al Ĝong Ĝiĉeng): Ĉu la onklino malsanas? Ni venigu iun por ŝin kuraci.

Ĝong: Bone.

Li: Vanas via ruzo! (Li helpas la patrino iri en la internan ĉambron ŝin subtenante.)

Ĝong Ĝiĉeng geste signas al Lju Hongje, elpaŝas kune kaj refermas la pordon.

Ŝaŭ Gianbo kaj malgranda Guo envenas.

Ĝong: Stabestro!

Ŝaŭ: Kiel iras la afero?

Lju: Onklino en tiu ĉi domo malsaniĝis!

Ŝaŭ: Ho, tuj venigu la sanitaristinojn, kaj diru, ke ŝi alportu iom da greno.

Lju: Jes! (Li eliras.)

Ĝong: Ve! Estas tre malfacile por ni mobilizi la amasojn ĉi tie!

Ŝaŭ: La popolanoj en Giapi-valo ne komprenas nin kaj ili estis trompitaĵoj de banditoj. Ĉu vi forgesis, ke Lupa Hurlo pretendis esti unu el niaj rekognoskantoj?

Ĝong: Ho jes.

Ŝaŭ: Se ni ne mobilizas la amasojn, malgranda Ĝong, ni ne povos firme stari ĉi tie kaj ekstermi Vulturon. Kaj se ni ne faligas la banditojn, ni ankaŭ ne povos vere mobilizi la amasojn.

Ĝong (ridante): Mi komprenas.

Ŝaŭ: Iru por diri al niaj kamaradoj, ke ni devas zorgi pri la malfaciloj kaj malsanoj de la amasoj, pacience propagandi la politikojn de la Partio kaj rigore plenumi la tri ĉefajn disciplinojn kaj ok punktojn de atento. Ni devas forigi la dubojn ĉe la amasoj per nia praktika agado!

Ĝong: Jes. (Li sin turnas por eliri.)



El la naŭa sceno: La persekuta taĉmento kaj milicianoj skias renkonte al vento kaj fluge antaŭenmarŝas al la Tigra Monto sub la gvido de Ŝaŭ Gianbo.

Ŝaŭ: He, dum via laboro informiĝu pri tio, ĉu ĉasisto Ĉang jam venis.

Ĝong: Jes! (Li eliras.)

Envenas la sanitaristino.

Sanitaristino: Stabestro! (Ŝi transdonas la grensakon.) Kie estas la malsanulo?

Ŝaŭ: En tiu domo. (Li montras la domon de Li Jongki.)

Sanitaristino (ekfrapas sur la pordo): Samlokano!

Ŝaŭ: Venas nia kuracistino, samlokano. Tuj malfermu la pordon!

Kolere Li Jongki iras el la ĉambro kun ponardo en la mano. Lia patrino kuratingas lin kaj admonas lin.

Patrino Li: Jongki, vi nepre ne...

Li: Kion mi timas? Ankaŭ per tio ĉi mi povas lukti kun ili!

Li ĵet-enigas la ponardon sur la tablon.

Patrino Li (tre maltrankviliĝas): Jongki, mi petas vin! (Ŝi svenas.)

Li (haste subtenas ŝin): Panjo! Panjo!

Ŝaŭ Gianbo forte puŝmalfermas la pordon, kaj eniras la domon kune kun la sanitaristino kaj malgranda Guo.

Li Jongki protektas sian patrinon kaj ĵetas koleran rigardon al Ŝaŭ Gianbo.

Ŝaŭ: Urĝan helpon!

Sanitaristino: Jes!

Ŝaŭ Gianbo rapide demetas sian surtuton kaj ĝin surmetas sur la patrinon de Li Jongki. La sanitaristino helpas ŝin eniri en la internan ĉambron ŝin subtenante. Ankaŭ Li Jongki kaj malgranda Guo eniras sekvante ilin.

Ŝaŭ Gianbo verŝas iom da greno el la grensako en la kaldronon kaj komencas kuiri kaĉon.

Post momento, Li Jongki venas el la interna ĉambro por preni akvon. Ŝaŭ Gianbo iras en la internan ĉambron.

Li (ekvidas la kaĉon kuiritan en la kaldrono, kortuŝiĝas kaj meditas): La Ĉina Popola Liberiga Armeo?

(Li kantas laŭ *erhuang sanĵan*)

*Jen la soldatoj nin prizorgas kaj kuracas,
Afable nin pritraktas, en helpdon' ne lacas.*

*Kiel bandit' soldat' subpremas ĉiam la popolon,
Sed kial mi hodiaŭ vidas novan moron?*

Ĉu vere venis al ni la savantoj sopirataj?

Patrino Li (krias en la ĉambro): Akvon!

Li Jongki ĉerpas supon el la kaĉo. Malgranda Guo venas el la interna ĉambro, prenas la supon kaj reiras en la ĉambro kun ĝi. Ŝaŭ Gianbo venas el la interna ĉambro.

Ŝaŭ: La onklino jam rekonsciiĝis, samlokano, trankviliĝu do!

Li:

Ŝaŭ: Kio estas via nomo, samlokano?

Li: Li Jongki.

Ŝaŭ: Indiĝeno?

Li: Ne. Miaj prapatroj loĝis en Ŝandong. Antaŭe, mia patro laboris en fabriko de Ginan. Post la Incidento de la Dekdua de Aprilo, li partoprenis strikon kaj estis murdita de Ĉiang Kajŝek. . . .

Ŝaŭ (indigne): Aj! . . . (intime) Kiel vi venis ĉi tien?

Li: Post la morto de mia patro, mia patrino migris kun mi al la Nordoriento ekster Ŝanhajguan.

Ŝaŭ: Kio estas via okupo?

Li: Fervojistoj.

Ŝaŭ (tre ĝoje): Bonege, do vi des pli estas proksimumo por ni!

Li (detale pririgardante Ŝaŭ Gianbo): Kia armeo vi efektive estas? Por kio vi venas profunde en la montaron kun primitiva arbaro?

Ŝaŭ (intime): Samlokano!

(Li kantas laŭ *erhuang juanban*.)

Jen ni soldatoj de l' popolo venas inter montojn,

Por forekstermi la reakciulojn, kaj transformi l' mondon.

Jardekojn ni batalis tra Ĉinio por revolucio,

Nin gvidas en marŝado Prezidanto Maŭ kaj l' Kompartio.

Ni portas ruĝan stelon sur la ĉapo,

Du ruĝajn flagojn de revolucio

Sur la kolum'. Kaj kie flirtas ruĝaj flagoj,

Popolo liberiĝas, falas bienuloj, regas hela tago.

L' arme' popola solidaras kun popolo sia,

Ni venas por nuligo de la bandit-plago!

Li (vulkane elŝprucigas siajn sentojn el la korfundo kantante laŭ *erhuang pengban*):

Ni tage-nokte sopiregis la armeon nian,

Sed ne atendis, ke al ni ĝi venis jam hodiaŭ
En la montaron por ekstermi la rabistajn bandojn

Kaj el mallumo savi nin malriĉajn suferantojn!
(Sincere, laŭ *juanban*.)

Karulo mia! mi tre hontas, ke mi missintenis,
Erare mi por malamikoj vin karulojn prenis!

(Li kuŝigas la ponardon starantan sur la tablo.)
Jam tridek jarojn mi ĉevale en mallum' laboris,

Kun vundoj kaj cikatroj kaj indigno en la koro,
Mi baraktadis en abism' senfunda de doloro.

En tristo kaj indigno ni silentis pri l' turmentoj,
Kaj pro la plag' de l' Tigra Monto grincis niaj

dentoj.

Ni pensis, ke senfine daŭros la sufer' sen ŝanĝo,
Sed ne atendis, ke cikas' hodiaŭ floras kaj

burĝonas velka branĉo!

(Laŭ *duoban*.)

De nun la Kompartio mi sekvados por lupĉas' estonte,

Kaj sturmos tra torent' kaj fajr' kaj vivoferos mi volonte.

Kiom ajn multas malfaciloj kaj danĝeroj,
La Tigran Monton mi ja sturmos la unua por ĝia konkero!

Ŝaŭ Gianbo ekpremas la manon de Li Jongki.

Lju Hongje krias post la kuliso: "Stabestro!" kaj envenas poste.

Lju: Stabestro, la samlokanoj venas por vidi vin!

Amasoj envenas kun la batalantoj inter ili.

La sanitaristino venas el la interna ĉambro subtenate la patrinon de Li Jongki.

Popolano A: Via Moŝto...

Batalanto: Oĉjo, ni ne kutimas titoli per tio, sed per estro.

Ŝaŭ: (tuj sekve): Per kamarado,

Ĝong: Stabestro, li estas ĝuste maljuna Ĉang.

Ŝaŭ (iras al Ĉang renkonte kaj ekpremas lian manon): Ĉu vi venis el la montaro?

Ĉang: Ni jam ne plu povas loĝi en la montaro, tial mi kaj mia infano venis ĉi tien por loĝi ĉe ŝia onklo Daŝan.

Ŝaŭ (karese frapante la ŝultron de Ĉang Baŭ): Bona knabino!

Li: Frato Ĉang!

Ĉang: Jongki, jen fine venas la savantoj longe sopirataj!

Ĝang: Flamas la koroj de la vilaĝanoj, estimata estro, kaj ĉiuj konkure petas partopreni batalon kontraŭ la citadelo de la Tigra Monto!

Ŝaŭ: Samlokanoj! La Ĉina Popola Liberiga Armeo akiris grandan venkon sur la fronto kaj jam liberiĝis ankaŭ la areo de Mudangiang!

Amaso: Hura!

Ŝaŭ: Vulturo jam ne povas fuĝi!

Ĝang: Ni iru ataki lian neston!

Li: Tuj disdonu al ni pafilojn, estimata estro!

Amaso: Jes, tuj disdonu al ni pafilojn!

Li: Havante pafilon en mano, ĉiu el Giapi-valo povas batali kontraŭ du aŭ tri banditoj!

Ŝaŭ: Pafilojn ni certe disdonos al vi! Sed nun vi havas nek varmigajn vestojn kontraŭ la frosto, nek grenon por la sekvanta tago en la domo, kiel do vi, samlokanoj, povas iri en la primitivan arbaron en la montaro por batali kontraŭ la banditoj?

Amaso: Kion fari do?

Ŝaŭ: Ĉe Giapi-valo, ĉie sin trovas drogherboj kaj monte gigantaj amasoj de ligno. Ni ja povos interŝanĝi ilin por vestoj kaj greno, se nur ekfunkcios la mallarĝtrakaj vagonaroj, ĉu ne?

Amaso: Jes ja!

Ŝaŭ: Restarigu la milican organizon kaj la mallarĝtraka vagonaro certe povos trafiki; kaj akirinte manĝaĵojn kaj vestojn, ni povos, kun ankoraŭ pli granda energio, batali kontraŭ Vulturo.

Li: Kiam do ni komencu ripari la fervojon?

Ŝaŭ: Ago tuj sekvu la diron, kaj ni laboru kune.

Popolano A: Tio ĉi ja estas peniga laboro, estimata estro!

Ĝong: Onklo, ni ĉiuj devenis de malriĉaj familioj kaj scipovas batali per pafilo kaj labori per instrumento!

Li: (kuras al Ŝaŭ Gianbo kaj firme premas lian manon): Bonege, estimata estro! Ni vere apartenas al la sama familio!

(Li kantas laŭ *erhuang duoban*.)

*Montanoj ni por ĉiam niajn vortojn firme tenas,
Kaj nia kor' je fideleco ĉiam plene-plenas!*

Por kapti drakon—

Amaso (ĥore): *Kune iru ni en maron,*

Li (kantas daŭre): *Por buĉi tigron —*

Amaso (ĥore): *Kune iru ni sur monton.*

Li (kantas daŭre):

*Ho tondro de printemp' tremigas jen la tutan
mondon!*

Ci, Vulturo!

Amaso kaj la batalantoj (kantas ĥore laŭ *erhuang sanban*):

Kiom da tagoj ci bandito povos plue vivi?

Impone pozas la popolanoj kaj armeanoj starante kompakte unuj kun aliaj kvazaŭ statuaro de herooj.

— La kurteno falas.

S C E N O VIII

SAGACA ELSEENDO DE INFORMO

Tagiĝo. Loko sur la Tigra Monto. Altaj rokoj, aro da subteraj fortikaĵoj, neĝo sur ĉio kaj ondumaj montoj en la fono. Dekstre vidiĝas grava vojo kondukanta malsupren de la monto.

Vulturo: Ĉu Frato la Naŭa ofte gimnastikas ĉi tie?

B. stabestro: Jes.

Vulturo: Kaj kien li iris krome?

B. stabestro: Li iris al ĉiuj kvin montpintoj.

Vulturo: Kio? Ĉu vi lasis lin vidi eĉ la 27 subterajn fortikaĵojn en 9 grupoj?

B. stabestro: Li ja estas nia frato, kial do ne lasi lin vidi la mirindaĵojn!

Vulturo: Ej! Ne bela estas la situacio lastatempe. Streĉita stato estas sub la monto, ne revenas Lupa Hurlo, neniu el ni vidis Hu Biaŭ antaŭe kaj li venis al ni tamen ĝuste en tiu ĉi momento. Mi devas esti singardema!

La bandita ĉefadjudanto envenas de la dekstra flanko.

B. ĉefad.: Via Moŝto la Tria, ĉio jam estas pretigita laŭ via ordono.

Vulturo: Bone. Do faru kion mi diris al vi lastnokte, por ke li montru, kio li vere estas!

B. ĉefad.: Jes. (Li eliras dekstraflanke.)

Vulturo kaj la bandita stabestro ŝajne

vidas ion kaj haste eliras en la antaŭa parto de la maldekstra flanko.

Jang (kantas post la kuliso laŭ *erhuang daŭban*):
*Tra malfaciloj mi batalas en la (envenante)
malamika koro!*

(Laŭ *hujlong*.)

*Pensante, ke la kamaradoj kaj popolo en foro,
Jam pretas ekbatali je signalo kontraŭ l' bandi-
taro,*

Ankoraŭ pli altiĝas mia batalvolo!

(Laŭ *erhuang manban*.)

*Multegon ja esperas de mi la Partio nia,
Kaj l' kamaradoj en kunven' de l' Komitat'
Partifilia*

*Konsilis kore al mi, kuraĝigas min sen fino,
Kaj pro iliaj fajraj koroj varmas mia sino.*

(Laŭ *kuajsanjan*.)

*Ĉiam mi nepre devas esti brava kaj singarda,
Sukces' dependas de kuraĝo kaj de saĝo alta.*

*Konsiloj de l' Partio estas venko-garantioj,
Maŭzedongpenso ĉiam brilos kiel sunradioj.*

(Laŭ *juanban*.)

*La Tigra Monto estas forte protektata vere,
Per fortikaĵoj kaj tuneloj kaŝe kaj surtere.*

*Sagacan kapton la gvidantoj nun aranĝas lerte,
Atak' perforta multajn mortojn al ni kaŭzus
certe.*

*Post rekognosk' septaga jam klariĝis ĉio plene,
Informan slipon mi jam skribis, portas ĉe mi
kaŝe.*

*Por ĝin forsendi mi promenas ŝajne, frumatene,
(ion rimarkante)*

Sed kial nun gardantoj multas pli ol ordinare!

Ho, la informslipo —

*Se mi ne povus ĝustatempe sendi l' slipon, tio
Detruus nian tutan planon kaj tiu eraro*

Ja estus krim' al la popolo kaj al la Partio.

(Laŭ *duoban*.)

Neniom devas mi heziti sojle de l' Novjaro.

Sentime sturmos mi eĉ tra glavaroj,

Mi nepre iros sub la monton tra mil baroj.

Ne povas bari min ja alta mont' sur vojo,

*Kaj kontraŭ frost' mi maten-sunon havas en
la koro.*

Matenruĝo ekbrilas tra la tuta ĉielo kaj ruĝigas la pinton de giganta roko.

Voĉoj post la kuliso: "He, rapidu!" "Jen mi venas!" Singardeme Jang Zijong demetas sian surtuton kaj komencas fari ŝajnige tradician gimnastikan ekzercon.

Banditoj B kaj C ŝajnigas sin patrolantaj kaj salutas lin.

Banditoj B kaj C: Halo, bonan matenon, la Naŭa Moŝto!

Jang: Bonan matenon, bonan matenon!

Banditoj B kaj C eliras.

Jang Zijong ĉesas ekzerci.

Aŭdiĝas pafoj.

Jang: Pafoj!

Aŭdiĝas krioj en malproksimo: "Sturmu!" "Sturmu!" Voĉoj en proksimo: "Venas komunistaj soldatoj!"

Intensiĝas pafoj.

Jang: Kio! Ĉu la kamaradoj venas? (Li ekpensas kaj tuj decidas.) Antaŭ ol la stabestro ricevos mian informon, la kamaradoj ne povos veni.

Ankoraŭ pli intensiĝas la pafoj kaj pli proksimiĝas la krioj.

Jang: Suspektindaj estas ankaŭ la pafoj. Hm hm, denove provo! Bone, do mi utiligos ilian ruzon por ilin superruzi kaj elsendi la informan slipon. (Li pafis dufoje en la aeron kaj krias al la maldekstra flanko.) Fratoj!

Envenas kvar banditoj.

Jang: Venas komunistaj soldatoj! Sturmu kun mi!

La kvar banditoj elkuras. Vulturo kaj la bandita stabestro ŝtele envenas. La bandita ĉefadjudanto envenas renkonte al Jang Zijong.

Vulturo: Momenton, Frato la Naŭa, Frato la Naŭa.

Jang (krias al la dekstra flanko): Haltu!

B. stabestro (krias samtempe al tiu direkto): Ne pafu plu! Ne pafu plu!

Banditoj krias post la kuliso: "Jes!"

Jang (al Vulturo): Kio?

Vulturo: Haha! Tio ĉi estas milita ekzerco aranĝita laŭ mia ordono.

Jang: Ho, se vi ne haltigus min, mi jam estus farinta pafserion kaj certe faligus kelkajn el ili.

Vulturo: Hahahaha!

Jang: Kial vi ne diris al mi, ke vi aranĝos tiun ĉi ekzercon, Via Moŝto la Tria! Vi...

Vulturo: Nu nu, ne estu suspektema, Frato la Naŭa. Al neniu mi diris pri ĝi. Se vi ne

kredas, vi demandu lin. (Li montras al la bandita ĉefadjutanto.)

B. ĉefad. (ŝajnage): Ho, jes, ankaŭ mi pensis, ke efektive venis komunistaj soldatoj.

Jang: Hihi, (diras dusence) estus bone, se ili estus venintaj. Mi ja atendas ilin.

Vulturo: Brave vi faris, Frato la Naŭa! Hahaha!

B. rotestro (post la kuliso): Iru, rapidu!

Envenas la bandita rotestro eskortante banditon A kaj tiu ĉi falas teren.

B. rotestro: "Liuzi" frapiĝis kontraŭ muro ekstere, Via Moŝto la Tria!

Vulturo: Kio?

Bandito A (tremas de timo): Ni descendis la monton laŭ ordono, Via Moŝto la Tria, kaj vidis de malproksime, ke la malgranda vagonaro funkcias. Sed antaŭ ol ni eniris Giapi-valon, ni jam renkontis komunistajn soldatojn!

Vulturo: Giapi-valo? (suspekteme) Ĉu nur vi sola revenas?

Bandito A: Jes!

B. ĉefad.: Tre verŝajne vi estis kaptita de la komunista armeo kaj ili lasis vin reveni?

Bandito A: Ne! Ne!

Vulturo (eltiras sian pistolon kaj ĝin direktas rekte al la bandito A): Sentaŭgulo!

Jang (admonas): Ne incitiĝu, Via Moŝto la Tria. Se li estus kaptita de la komunista armeo, li certe ne kuraĝus reveni.

B. stabestro: Jes, ĉiu scias, ke Via Moŝto la Tria plej malamas homon iam kaptitan de la komunista armeo!

Vulturo: Hm!

Jang (al la bandito A): Kial vi ankoraŭ ne foriras kaj incitas Lian Moŝton per via resto?

B. stabestro (piedbatas la banditon A): For!

Bandito A (iras flanken kaj diras mallaŭte): Ja bona estas la Naŭa Moŝto! (Li eliras.)

B. stabestro (al la bandita rotestro): Diru al la subuloj, ke oni streĉu la gardon!

B. rotestro: Jes. (Li eliras.)

Vulturo (deprimite): Ej!

B. stabestro: Mi tuj sendos kelkajn homojn malsupren por kapti iom por celebri la centkoka festenon, Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Bone, sed ĉi foje ni devas esti aparte singardemaj!

B. stabestro: Jes, mi scias. (Li eliras.)

Jang: Pri la defendo de la Tigra Monto, Via Moŝto la Tria, oni povas trovi nenian mankon. Sed ni ja ne devas nur atendi ĉi tie la atakojn de ili.

Vulturo: Jes. Kion do ni devas fari laŭ via opinio?

Jang: Ni devas ekzerci persekutadon jam nun—

Vulturo: Oj.

Jang: Kaj fari niajn soldatojn vere kapablegaj.

Vulturo: Jes.

Jang: Kaj post la centkoka festeno ni ataku Giapi-valon!

Vulturo (kaptas la manon de Jang Zijong): Vere brava vi estas! Prenu komandon, Frato la Naŭa, kaj gvidu niajn fratojn fari ekzercon de persekutado.

Jang: Jes.

Vulturo: Hahahaha!

Vulturo kaj la bandita ĉefadjutanto eliras.

Jang (mallaŭte kaj malestime): Idioto!
(Li kantas laŭ *hipi kuaj-erliu.*)
*Malsaga Vulturo ruza artifikojn uzis,
Sed lasi min descendi l' monton tamen ne
rifuzis.*

Kamarado Dehua,

*Vi devas fari l' pezan taskon de informo-preno,
Triumfe kantos ni post la ekstermo
De la banditoj je centkoka la festeno!*

Li malfermas sian surtuton kaj faras *liang-hiang-on.*

— La kurteno falas.

SCENO IX

ATAKO SENPROKRATA

Antaŭtagmezo de la 29-a de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro. Placo antaŭ la domo de Li Jongki. Du ruĝaj paperslipoj kun versparo estas gluitaj sur la barila pordo. Ĉie regas ĝoja atmosfero de liberiĝo.

La kurteno levigas en longa fajfo de lokomotivo.

Popolanoj de Giapi-valo, kiuj ŝultre portas grensakojn, rigardas la vagonaron forkuri kaj ĝoje eliras. Iu popolano demetas antaŭ la pordon de la patrino de Li Jongki la grensakon, kiun li alportis por ŝi.

Patrino Li (kantas laŭ *hipi liuŝuj*):

L' armeo kaj l' popolo ligigas firme kor' kun koro,

La montvilaĝo nia iĝis bild' de ĝojo-riĉo.

*Bonvenas neĝ' kaj ĉiuj ridas en ĉi tiu horo,
Pro dividad' de gren' kaj vestoj, je la liberigo.*

Envenas Ŝaŭ Gianbo.

Ŝaŭ: Onklino!

Patrino Li: Kamarado estro!

Ŝaŭ: Ĉu jam sufiĉas la objektoj por la Novjaro?

Patrino Li: Jam sufiĉas. Ni eĉ ne songis, ke Giapi-valo povas havi tiel bonan Novjaron! Se vi ne venus al ni, ni ne scius kiel pasigi la feston!

Ŝaŭ: Plej bonaj tagoj venos ankoraŭ poste!

Patrino Li: Ĉion ni ŝuldas al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ!

Ŝaŭ metas la sakon da greno sur sian ŝultron kaj pretas ĝin porti en la domon por la patrino de Li Jongki. Aŭdiĝas post la kuliso voĉo de Li Jongki trejnanta la milicianojn.

Li (post la kuliso): Unu, du, tri, kvar!

Milicianoj (post la kuliso): Unu, du, tri, kvar!

Patrino Li: Ho! La milicianoj plenas je energio! Sed grumblas la milicianoj kiuj restas en la vilaĝo por ĝin gardi! Kaj precipe Ĉang Baŭ, kiu simple ne volas resti!

Ŝaŭ: Ho, la knabino... (Aŭdiĝas voĉoj de la milicianoj post la kuliso: "Ŝa, Ŝa, Ŝa!")

Ŝaŭ Gianbo eliras interparolante kun la patrino de Li Jongki.

Denove aŭdiĝas voĉo de la milicianoj en ekzerco: "Celo rekte antaŭe. Ŝa! Ŝa! Ŝa!"

Ĉang Baŭ envenas rapide retropaŝe kun la vizaĝo al la direkto de la milicianoj en ekzerco.

Baŭ (kantas laŭ *erhuang hiaŭdaŭban*):

*Jen sur la ekzercplac', kun krioj de sonoro
(Laŭ hujlong.)*

*Kaj alta batalvolo l' kamaradoj por bandit-eksterm' sin trejnas en ĉi horo,
Ho, pro l' deziro fajre arda brulas mia koro!
(Laŭ juanban.)*

*Mi tage nokte volas venĝi min al la luparo,
Kaj sub la luno kaj stelaro iras batala preparo.
Por sturmi tigran neston en neĝvent' ja havas mi kuraĝon,*

Sed kial oni nepre min restigas gardi la vilaĝon!?
(Laŭ duoban.)

*Al la stabestro mi tuj iros,
Kaj l' kordeziron mi rediros,
Ke nepre partoprenos mi l' batalon
Por plene forbalai l' banditaron.*

Envenas la sanitaristino

Sanitaristino: Ĉang Baŭ!

Baŭ: Franjo, helpu min per viaj vortoj! Ni iru por vidi la stabestron!

Ŝi estas eliranta tirante la manon de la sanitaristino. Ŝaŭ Gianbo venas el la domo de Li Jongki.

Ŝaŭ: He, pri kio vi murmure interparolas tie?
Envenas Li Jongki.

Baŭ: Onklo, lasu min iri!

Ŝaŭ: Ankaŭ protekti la vilaĝon ja estas la devo de milicianoj!

Baŭ: Hm, tiel forte mi malamas Vulturon, ke mi deziras lin mortigi nepre per miaj propraj manoj. Se vi ne lasus min iri..., kiel mi povus ne iri!

Ŝaŭ: Vi estas ankoraŭ tro juna, Ĉang Baŭ!

Baŭ: Kio?! Ankoraŭ tro juna?

Sanitaristino: Stabestro, Ĉang Baŭ havas klas-konscion, ŝi scipovas lerte skii kaj pafi kaj krome ŝi ankaŭ povas helpi min en flegado de vunditoj. Do lasu ŝin iri kun ni!

Li: Kamarado estro, la knabino multe suferis kaj deziregas venĝi sin. Lasu ŝin iri kun ni!

Ŝaŭ: O? Ĉu ankaŭ vi, milica estro, tiel pensas?

Li: Tiel decidiĝu.

Ŝaŭ: Do vi tri estas unuanimaj. Bone! Tiel decidiĝu do!

Baŭ: Jes! (Ĝoje eliras saltetante kaj la sanitaristino ŝin sekvas.)

Li: Kamarado estro, la krimuloj Luan Ping kaj Lupa Hurlo jam estas foreskortitaj. Verŝajne,

ni tuj atakos la Tigran Monton?!

Ŝaŭ: Malpacientiĝis, ĉu?

Li (ridas stultece):....

Ŝaŭ: He. Diru al mi, kiom da tempo ni bezonos por atingi la lokon, se ni skios laŭ la danĝera vojo en la dorsa flanko de la monto.

Li: Tiu vojo estas ok dek liojn pli longa ol tiu en la antaŭa flanko de la monto. Mi pensas, ke ni bezonos maksimume unu tagon kaj unu nokton.

Ŝaŭ: Bone! La milico plene sin pretigu!

Li: Jes! (Li eliras.)

Ĝong Ĝiĉeng kaj Lju Hongje envenas.

Lju: Kial ni ĉiam atendadas, stabestro? La skia rapideco de la kamaradoj jam atingis la difinitan normon....

Ĝong: Kaj la milico jam estas organizita....

Lju: Kaj krome, la supera instanco sendis al ni helpan trupon....

Ĝong: Se ni tuj ekiros, mi pensas, ni certe povos venki!

Ŝaŭ: Kamaradoj, en la ŝlosila momento ni des pli devas singardi de malpacienco.
(Aplombe li kantas laŭ *hipi sanban*.)
Atendu pacience la ordonon —

Ĝong: Jes! (Eliras kun Lju.)

Ŝaŭ (kantas laŭ *hipi juanban*):

Admonante ilin tamen mi ne povas kvietigi mian koron.

*Alproksimiĝas jam la tag' por malamik-ekstermo,
Ŝen Dehua iris por informopren', ankoraŭ
mankas signo de reveno.*

Se neatenditaĵo intervenos,

(Laŭ kuajban)

Mi novan paŝon prenos,

*Sed ne la daton ŝanĝos, ĉar tre bonas ŝanco de
centkoka la festeno.*

*Li Jongki diris, ke montdorse estas voj' danĝera,
Surprizos ni la Tigran Halon trans krutaĵo vera.*

Kriante envenas Luo Ĉanggiang.

Luo: Maljuna Ŝen revenas, stabestro!

Envenas Ŝen Dehua.

Ŝaŭ (rapidas antaŭen): Kamarado Dehua!

Ŝen (anhelante donas al li la informslipon): Mi ne malfruigis, ĉu jes?

Ŝaŭ (akceptas la informslipon): Ne. Tuj iru ripozi!

Ŝen Dehua eliras subtenate de Luo Ĉanggiang.

Ŝaŭ (urĝe legas la informon): "...dorsflanke de la monto sin trovas danĝera vojo kondukanta rekte al la Tigra Halo, ... pinbranĉa torĉo estos signalo...." (emocie) Brave, maljuna Jang, heroo!

Malgranda Guo krias post la kuliso:
"Stabestro —"



El la deka sceno "Triumfa Renkontiĝo ĉe la Centkoka Festeno": Jang Zifong indigne riproĉas banditon Luan Ping, persone pafmortigis kondamne tiun krimplenan banditon kaj venkis la danĝeron per revolucia saĝo kaj kuraĝo.

Haste envenas malgranda Guo. Lin sekvas Li Jongki kaj Ĝang Daŝan.

Guo: Raporton, stabestro. Kiam la mallarĝtraka vagonaro atingis Hiĉa-riveron, ni trovis ke la ponto estas detruita. Ni elvagoniĝis por urĝa riparo, sed subite nin atakis banditoj. Ni do forpelis ilin....

Ŝaŭ: Kie estas la du krimuloj?

Guo: Lupa Hurlo estis mortigita de hazarda kuglo.

Ŝaŭ: Kaj Luan Ping?

Guo: Li eskapis, dum ni persektutis la banditojn.

Ŝaŭ: Li eskapis? (flanken) Se li fuĝis al la Tigra Monto, li certe endanĝerigos kamaradon Jang Zijong kaj ruinigos nian planon! (Li sin turnas al malgranda Guo kaj Li Jongki) Urĝan kolektiĝon!

Guo kaj Li: Jes! (Ili eliras.)

Aŭdiĝas de malproksime urĝa tintado de relpeco kiel signalo por kolektiĝo.

Ŝaŭ: Kamarado Daŝan! Vi kaj ĉasisto Ĉang respondecu pri la defendo de la vilaĝo.

Ĝang: Jes!

Envenas la persekuta taĉmento, milicianoj kaj popolanoj.

Ŝaŭ: Kamaradoj!

(Li kantas laŭ *hipi sanban*.)

*Urĝas la tasko kaj ŝanĝiĝis dume l' stat' subite,
Ĉiun sekundon nepre albatalu ni decide,
Tuj vin pretigu, kamaradoj, por ekmarŝo flug-
rapide!*

Ŝaŭ: Marŝu!

Mallumiĝo por dekoraci-ŝanĝo.

Neĝoŝtormo.

La persekuta taĉmento kaj milicianoj kun Li Jongki kiel voĵgvidanto rapidas antaŭen kontraŭ neĝvento.

Atinginte montpiedon, ili demetas la skiojn. Iu batalanto komencas grimpi la krutaĵon kaj deglitas; du aliaj grimpas supren kun ŝnuroj, kaj ankaŭ unu el ili deglitas kaj poste grimpas supren denove. Ili ambaŭ ĵetas malsupren la ŝnurojn kaj ĉiuj sukcese grimpas supren sub la gvido de Ŝaŭ Gianbo.

Kiam la batalantoj descendas deklivon, iuj ruliĝas kaj aliaj saltas malsupren. Ili rapidas antaŭen brave.

— La kurteno falas.

S C E N O X

TRIUMFA RENKONTIĜO ĈE LA CENTKOKA FESTENO

Novjara antaŭvespero. La Tigra Halo. La kurteno leviĝas dum la krio: "Alportu liuzi!"

Du banditoj eskortas Luan Ping enveni.

Luan: Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Luan Ping!

Luan: Jes!

Vulturo: Adjutanto Luan!

Luan: Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Por kio vi venas ĉi tien?

Luan: Mi... mi venas por celebri vian naskiĝtagon. Hihhi!

Vulturo: Hm! De kie vi venis?

Luan: Mi....

Vulturo: O.

Luan: Mi....

La Kolonoj: Diru!

Luan: Mi....

La Kolonoj: Diru tuj!

Luan: Mi diru, mi diru... mi... venis de komisiito Hoŭ.

Vulturo (rikanas): O, vi venis de komisiito Hoŭ.

Luan: Jes.

Vulturo: Venigu Fratton la Naŭan!

Bandito: Jes, venigu la Naŭan Moŝton!

Jang Zijong envenas kun skarpo de deĵoranto sur la brusto.

Jang: Via Moŝto la Tria, ĉio jam estas en ordo.

Vulturo: Frato la Naŭa, rigardu jen kiu venis.

Jang: O. (Li surpriziĝas je ekvido de Luan Ping, sed li tuj trankviligas sin kaj kaptinte la malfortecan naturon de la malamiko li decidias sian batalan taktikon.) O! Frato Luan, kio portis vin ĉi tien? Nu? Kian gloran rangon vi ricevis pro via turniĝo al komisiito Hoŭ? Mi, Hu Biaŭ, gratulas vin pro via promociiĝo.

La Kolonoj (ironie): Kio vi estas nun? Regimentestro? Hahaha!

Luan Ping konfuziĝas.

Vulturo: Kian postenon komisiito Hoŭ asignis al vi?

Luan: (rekonas la alivestitan Jang Zijong kaj ekridas ruze): Hihhi, jen kia Hu Biaŭ! Vi... vi mensogis....

Jang: Mi mensogis? (severe) Ĉu mi mensogis aŭ vi mensogis? Mi, Hu Biaŭ, estis sufiĉe amika al vi kaj agis solidare! Tute malsame ol vi, Luan Ping. Mi persvadis vin, ke vi serĉu protekton ĉe brigadestro Cuj, sed vi klopodis treni min al komisiito Hoŭ. Vi ne povas diri, ke mi ne agis solidare! — (kun plua premo) Tuj respondu al Lia Moŝto la Tria, por kio vi venis ĉi tien hodiaŭ?

Luan (sin turnas de Jang Zijong): Via Moŝto la Tria, mi volas diri....

Jang: Ne babilaĉu! Hodiaŭ estas la kvindeka datreveno de la naskiĝtago de Lia Moŝto la Tria kaj ni ne havas tempon por aŭskulti vian sensencaĵon!

Vulturo: Prave. Sensencaĵon ne babilu! Diru al mi nur, por kio vi venis?

Luan: Por aliĝi al la fortoj de Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Hm!

Jang: Kial do vi vin turnis al komisiito Hoŭ por ricevi altan postenon?

Luan (konfuzita, ne scias kiel respondi):....

Jang: Diru tuj la veron, sinjoro Luan, por kio komisiito Hoŭ sendis vin ĉi tien!

La Kolonoj: Jes, prave, diru! diru tuj!

Luan: Ne de komisiito Hoŭ mi venis!

B. stabestro: Jen vidu, tiu ĉi bastardo ĵus diris ke li venis de komisiito Hoŭ, sed tuj jam tion malkonfesas. Kia mensogulo!

La banditoj brue ridas.

Luan: Ne ridu! Vi estas ruze trompitaĵ! Li ne estas Hu Biaŭ. Li estas komunista soldato!

La Kolonoj elprenas siajn armilojn kaj ilin direktas al Jang Zijong.

Jang (aplombe): Hahahaha! Bone, do mi estu komunista soldato, ĉar vi tiel asertas. Nun diru al Lia Moŝto la Tria kaj la frategoj ĉi tie pri la deveno de tiu ĉi komunista soldato.

Vulturo: Jes. Vi diris, ke li ne estas Hu Biaŭ, sed komunista soldato. Kiel do vi konatiĝis kun li?

Luan (balbute): Li...li....

Banditoj: He!

Luan: Li....

Jang: Hodiaŭ tiu ĉi ulo nur balbutas kaj kontraŭdiras al si mem, Via Moŝto la Tria. Mi pensas, ke li certe ludas ian ruzon!

B. stabestro: Tre verŝajne la komunista armeo kaptis lin kaj lin liberigis!

Luan: Ne, ne!

Jang: Ĉu vi ne estas liberigita de la komunista armeo? Aŭ ĝi sendis vin ĉi tien?

La Kolonoj: Diru!

Luan: Mi....

B. ĉefad.: Jes! Ĉu ne la komunista armeo sendis vin ĉi tien?

La Kolonoj: Diru! Diru! Tuj!

Luan (gapas kun rigida lango):....

Jang: Via Moŝto la Tria, bonege protektata estas nia Tigra Monto, kaj la komunista armeo ne povas enveni per atako. Sed nun tiu ĉi ulo envenas, kaj en ĉi tio certe estas intrigo!

Luan (haste): Ne! Ho ne!

Jang: Luan Ping!
(Li kantas laŭ *hipi kuajban*).
Kaprica ulo insidema, ci vipuro,
Balbuto cia certe kaŝas en si ruzon.
Por sur la monton alkonduki l' komunistojn,
Envenis ci perfide postlasante spurojn.

Li suriras la ŝtuparon.

La tria rotestro

Envenas la bandita rotestro.

B. rotestro: Jes!

Jang (kantas daŭre):

La gardon intensigu per aldono de l' deĵor-personoj,
Neniu ĉesu gardostari sen ordono!

Vulturo: Jes, sen ordono de Frato la Naŭa, neniu forlasu sian postenon!

B. rotestro: Jes! (Li eliras.)

La Kolonoj balancas la kapon aprobe.

Vulturo: (forlasas sian sidlokon, ekprenas Luan Ping kaj lin ĵetas teren.) Hm hm, ci rabia hundo! Antaŭe ci provis treni kun ci Fraton la Naŭan por aliĝi al komisiito Hoŭ, kaj nun ci klopodas disigi nin per intrigo, kaj krome ci ankaŭ volas enkonduki komunistajn soldatojn. Kiel mi povus toleri cin!

Luan: Li ne estas Hu Biaŭ, Via Moŝto la Tria. Li vere estas komunista soldato!

Jang: Vera vipuro ci estas, Luan Ping! (Li kuras de sur la ŝtuparo.) Vi deziras min mortigi per la mano de Lia Moŝto la Tria. Mi bedaŭris, ke mi ne mortigis vin, kiam ni drinkis ĉe Baj-songvan!

La Kolonoj: Jes, vere!

Jang: Via Moŝto la Tria, mi Hu Biaŭ, neniam lasis fiulon tirani super mi. Pro via bono, mi ofendis la rabian hundon, kaj sekve li tiel malice atakas min! Se vi kredas, ke mi estas komunista soldato, do tuj ekzekutu min. Se vi kredas, ke mi estas Hu Biaŭ, do lasu min forlasi la monton. Kunesti kun li mi ne volas. Teni lin aŭ min, Via Moŝto la Tria, decidu laŭ via bontrovo! (Li deprenas la skarpon de deĵoranto kaj ĝin ĵetas teren.)

Vulturo konfuziĝas.

Banditoj: Ne foriru, la Naŭa Moŝto. Ne foriru, la Naŭa Moŝto!

La Kolonoj: Frato la Naŭa ne foriru, Via Moŝto la Tria! Frato la Naŭa, vi nepre ne foriru!

B. stabestro (levas la skarpon kaj ĝin donas al Vulturo.): Via Moŝto la Tria, Frato la Naŭa ne povas foriri!

Banditoj: Ne foriru, la Naŭa Moŝto!

Vulturo: Hohohoho, kial vi kondutas infanece, Frato la Naŭa. Nu, nu, venu, surmetu ĝin, surmetu. Mi ja ne mistraktos vin, hahahaha!

La bandita stabestro prenas la skarpon por deĵoranto el la mano de Vulturo kaj ĝin surmetas al Jang Zijong.

B. stabestro: Surmetu ĝin.

Luan Ping (petegas vidante, ke la situacio malfavoras al li): Via Moŝto la Tria. . . .

Vulturo (eksvingas malaprobe la manikon): Hm! (Li revenas sur sian sidlokon.)

Luan: Via Moŝto la Tria! (Li sin ĵetas sub la piedoj de Jang Zijong.) Bona Frato Hu Biaŭ!

Jang (senmove staras kaj ignoras lin.):

Luan (vangfrapas sin): Mi . . . Mi estas besto, mi estas damninda. Mi estas besto!

Jang (krias al la banditoj): Jam estas tempo. Ni gratulu Lian Moŝton la Trian je lia naskiĝtago!

Banditoj: Pretiĝu ĉiuj! Ni gratulu Lian Moŝton la Trian je lia naskiĝtago!

B. stabestro: Hodiaŭ estas la ora festo de la naskiĝtago de Lia Moŝto la Tria. Ni nepre ne lasu tiun ĉi senhejman hundaĉon altrudi malordon.

B. ĉefad.: Estos malfortuno por nia monto, se ni ne buĉos ĉi tiun malbonaŭguran stelon!

La banditoj: Prave, nepre buĉu lin! Buĉu lin! Buĉu lin!

Luan: Frategoj, bona frato Hu Biaŭ, frategoj . . . Via Moŝto la Tria. . . . Via Moŝto la Tria!

Luan Ping sin-ĵete surgenuiĝas antaŭ Vulturon.

Vulturo (rikanas malice): Hahahaha!

Luan: Ho! Ŝparu mian vivon, Via Moŝto la Tria!

Vulturo eksvingas sian manon.

La Kolonoj: Buĉu lin!

Luan: Ŝparu mian vivon, Via Moŝto la Tria!

B. ĉefad.: Eltrenu lin!

Jang: Lasu lin al mi!

Luan: la Naŭa Moŝto!

Jang Zijong eltrenas Luan Ping, kiu paraliĝas pro timo.

Jang (kantas laŭ *hipi kuajban*):

*Vi rabis kaj mortigis dum jardekoj,
Terure multaj estas viaj sangkrimegoj.
Mi damnas vin en nomo de l' Patrio,
Por venĝi la popolon jam hodiaŭ.*

Jang Zijong eltrenas Luan Ping je la kolumo. Aŭdiĝas pafoj. Jang Zijong envenas denove.

Jang: Ĉio jam pretas, Via Moŝto la Tria. Nun lasu nin esprimi al vi niajn gratulojn.

Vulturo: Frato la Naŭa, vi estas la deĵoranto, do vi donu ordonon!

Jang: Fratoj!

La Kolonoj: Jes.

Jang: Lumigu lampojn en la halo kaj bruligu pinbranĉajn torĉojn ekstere. Ni gratulu Lian Moŝton la Trian okaze de lia naskiĝtago!

Envenas la bandita rotestro.

B. rotestro: Jes. Jam estas tempo por la celebrado! (Li eliras.)

La Kolonoj: Plej bonajn dezirojn al Via Moŝto la Tria!

La banditoj riverencas al Vulturo.

Jang (surpaŝas lignan stumpon): Fratoj, manĝu kaj drinku laŭ via plaĉo kaj ĝuu la festenon ĝis ebrio!

La banditoj: Jes, jes, ĝis ebrio!

Jang: Sidiĝu ĉe la tablon, Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Fratoj, unue sidiĝu vi.

Jang: Hodiaŭ estas la ora festo de via naskiĝtago, do unue sidiĝu vi.

La Kolonoj: Jes, prave! Do sidiĝu Via Moŝto la Tria.

Vulturo: Bone, ni sidiĝu! (Li ekridegas kontente.) Hahahaha!

La banditoj venas en la apudan kavernon kaj sidiĝas ĉe la tabloj. Envenas la bandita rotestro.

Jang (descendas la lignan stumpon): La tria rotestro!

B. rotestro: Tie ĉi.

Jang: Revenigu la fratojn gardostarantajn, ke ili ĝuu bonan drinkon.

B. rotestro: Jes! (Li eliras.)

La banditoj faras bruon drinkludon en la apuda kaverno kaj ekregas tie ĥaoso.

Jang Zijong denove surpaŝas la lignan stumpon kaj ĉirkaŭrigardas.

Jang (kantas laŭ *hipi kuaj-erliu*):

Antaŭvespere de l'Novjaro lumas tuta l'citadelo,
(Li descendas la lignan stumpon.)

Per iluminaj signaltorĉoj en konform' al mia celo,
Laŭ nia plano jen centkoka la festeno aranĝitas,
Kaj la banditoj ebriiĝis, tute mankas ord' en vero.
Mi deziregas, ke tuj miaj kamaradoj antaŭ mi
aperu,

Frakasu la banditan neston kaj ekstermu la
banditojn.

Maltrankvilegas mia kor', ho kiel nun la tempo
malrapidas!

Sed kial nun ankoraŭ ne aperas signoj de ekag'
de l' kamaradoj?

Mi tre deziras nun eliri por esplorigardo,
(aplombe, laŭ jaŭban)

Sed restos mi aplomba en ĉi kriza horo por
tunelblokado.

(Li montras al la loko sub la seĝo de Vulturo.)

El la deka sceno: Jang Zijong kaj la persekuta taĉmento en kunago ekstermis la tutan banditaron de la Tigra Monto kaj kaptis ĝian ĉefon Vulturo.



Vulturo, bandita stabestro kaj aliaj ebric envenas.

Vulturo: Frato la Naŭa, Frato la Naŭa, Frato la Naŭa! Kial vi ne altabliĝas? Niaj fratoj deziras trinki pro via sano.

Jang: Hodiaŭ estas la ora festo de via naskiĝtago, ni devas trinki pro via sano. He, plenigu la bovlon de Lia Moŝto la Tria.

Ĉiuj eltrinkas.

Aŭdiĝas pafado de mitralo. La banditoj forĵetas la bovlojn. Envenas Kolono B vundita.

Kolono B: Via Moŝto la Tria, komunista armeo blokadus la Tigran Halon per mitraloj!

Vulturo: Ho, fratoj, rapidu! Sturmu eksteren!

La banditoj: Sturmu, sturmu, sturmu!

Voĉoj de PLA-anoj: "Formetu viajn armilojn, alie ni vin ekstermos!"

Vulturo: Frato la Naŭa, tuj forkuru kun mi tra tiu ĉi tunelo!

Vulturo levas la seĝon, sed Jang puŝas lin flanken.

Jang: Vi jam neniel povas forkuri!

Ensturmas kelkaj PLA-anoj kaj krias: "Formetu viajn pafilojn, alie ni vin ekstermos!"

Vulturo (al Jang Zijong): Vi estas...

Jang: Mi estas membro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo!

Vulturo: Ho!

Vulturo volas ekpafi, sed lia pafilo estas faligita de Jang Zijong. Vulturo elkuras. La banditoj fuĝas en la kavernon.

Ŝen: Maljuna Jang!

Jang: Kamaradoj! Tie ĉi estas tunelo. Elsavu la popolanojn kaj kaptu Vulturon vivan! (Li elkuras por persekuti Vulturon.)

Ŝen: Kamaradoj! Sturmu!

La PLA-aj batalantoj elkuras por persekuto.

I am Ŝen Dehua luktas kun iu bandita Kolono, envenas la bandita stabestro kaj ekpafas al Ŝen. Tiu ĉi rapide evitas la kuglon kaj ĝi trafas la Kolonon.

Envenas Luo Ĉanggiang persekutante alian Kolonon kaj luktas kun li. Dume en-

venas Ĉang Baŭ persekutante unu banditon. Ili luktas kun la banditoj kaj ilin kaptas. Luo Ĉanggiang kaj Ĉang Baŭ eliras eskortante la banditojn.

Li Jongki, la sanitaristino, batalantoj kaj milicanoj elsavis la popolanojn, kiujn la banditoj kaptis kaj alportis sur la monton, kaj trapasas la scenejon.

La bandita rotestro fuĝe envenas kaj estas pafmortigita de Li Jongki. Enkuras alia bandito kaj estas kaptita de Li Jongki.

Vulturo enkuras en paniko kun du banditoj lin sekvantaj. Jang Zijong envenas ilin persekutante, pafmortigis la du banditojn kaj komencas lukti kun Vulturo.

Ĝong Ĝiceng kaj batalantoj envenas persekutante la banditan ĉefadjutanton kaj banditojn kaj batalas kun ili.

Jang Zijong deprenas pafilon de bandito kaj pafmortigis kelkajn banditojn.

Ŝaŭ Gianbo, Ŝen Dehua, Li Jongki, la sanitaristino, malgranda Guo kaj la milicanoj envenas unuj post aliaj. Vulturo kaj la aliaj banditoj estas kaptitaj.

Ĉang Baŭ deziras pikmortigi Vulturon pro indigno, sed la sanitaristino sukcesis dekonsili ŝin de tio.

Ŝaŭ (firme premante la manon de Jang Zijong kaj emocie): Maljuna Jang!

Jang: Stabestro!

Ŝaŭ Gianbo prezentas al li Li Jongki, kaj ĉi tiuj du varme manpremas. Ĉiuj faras *lianghiang-on*.

— La kurteno falas.

(Fino de la tuta opero)

1. **Hipi jaŭban** kaj la kursivaj vortoj en la sekvanta teksto **kuajban**, **hipi hiaŭdaŭban**, **hipi sanban**, **fan-erhuang daŭban**, **erhuang manban**, **erhuang erliu**, **liuŝuj**, **hujlong ktp.** estas nomoj de diversaj formoj de melodioj de pekina opero. Ĉiu el tiuj melodiaj formoj havas siajn relative fiksjajn melodion, strukturon, tonalon, temp-arangon kaj taktrapidecon. Por krei la figuron de proletara heroo, la melodioj de la modelaj revoluciaj modernaj pekinaj operoj kritike heredis la tradiciajn formojn de melodioj kun multaj novaj kreaĵoj kaj disvolvoj.

2. **Lianghiang:** Termino de ĉina opero por formula movo de prezentado. Ĝi estas drama pozado de ĉefaj roloj dum sia sursceniĝo aŭ elsceniĝo, aŭ je la fino de danco aŭ akrobataĵo. Dum ludado, oni ofte montras koncentre la spiritan fizionomion de herooj en opero per ilia **lianghiang dum sia unuafoja sursceniĝo**.

Verkoj de Prezidanto Maŭ

(en Esperanto)

(Parto de la Verkoj el la Periodo 1926 — 1939)

Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio	24	pg.
Kial Ruĝa Politika Potenco en Ĉinio Povas Ekzisti?	28	
Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio	28	
Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon	28	
Kontraŭ Libroadorado	20	
Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro	16	
Pri Taktiko kontraŭ la Japana Imperiismo	60	
La Taskoj de la Komunista Partio de Ĉinio en la Periodo de Rezistado kontraŭ Japanio	56	
Pri Praktiko	28	
Pri Kontraŭdiro	68	

Baldaŭ Aperos en Esperanta Traduko

Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, Volumo Unua

En la unua volumo estas kolektitaj 17 verkoj de kamarado Maŭ Zedong, skribitaj dum la periodoj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) kaj la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937).

La Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Novaj Atingoj en la Geologia

Afero de Ĉinio

SUB la brilo de Maŭzedongpenso gigantaj atingoj estas akiritaj en la geologia afero de la nova Ĉinio. Paŝon post paŝo maturiĝas kaj kreskas la vicaro de ĉinaj geologiaj laborantoj kiuj posedas la modernan sciencan kaj teknikan kaj kapablas memstare solvi siajn profesiajn problemojn. Timante nek danĝeron nek malfacilojn, ili surgrimpas altajn montojn kaj transpasas profundajn valojn, malgraŭ kruela varmego kaj rigora frosto. Ili manĝas kaj tranoktas sub la libera ĉielo, vojaĝante inter sovaĝaj kaj dezertaj montoj. Ili vizitas ĉiujn riverojn kaj montojn de la patrio kaj vekis el eterna profunda dormo la mineralojn sub la tero.

I

En la malnova Ĉinio antaŭ la Liberiĝo, sub la longa regado de la putra reakcia reĝimo, la industrio kaj agrikulturo estis ekstreme subevoluintaj, la establo de geologiaj institucioj servis nur por ornami la reakcian reĝimon, kaj la geologiaj laboroj limiĝis nur en kadro de esploroj disiĝintaj de la praktiko kaj fragmentaj priskriboj pri iuj geologiaj fenomenoj. Tial, dum la 50 jaroj antaŭ la Liberiĝo en la tuta lando troviĝis nur kelkaj centoj da laborantoj okupiĝintaj pri geologia laboro kaj esploris nur dekelkajn mineralojn kaj, cetere, tute ne informiĝis pri rezervokvantoj bezonataj de industria projektado. En la 20 jaroj post la Liberiĝo, ni serĉis en nia lando ĉiujn utilajn mineralojn konatajn en la mondo kaj eksciis la lokojn kaj rezervokvantojn de plejparto de ili. Dank' al tio estas fundamente garantiitaj la nunaj bezonoj en la socialisma konstruado de nia lando kaj estas

farita certa preparo por longperioda konstruado. Inter la pli ol 30 jam esploritaj specoj de ofte uzataj ĉefaj mineraloj la rezervokvantoj de fero, kupro, tungsteno, stano, molibdeno kaj aliaj mineraloj de nia lando estas tre grandaj. Samtempe kun tio estas akiritaj ankaŭ grandnombraj materialoj hidrogeologiaj kaj inĝeniergeologiaj bezonataj en irigacio kaj konstruado. Ankaŭ oceangeologio kaj sismogeologio akiris grandajn atingojn.

II

Antaŭ pli ol 50 jaroj, por rabi niajn naftajn riĉfontojn la usonaj imperiistoj sendis siajn kortegajn erudiciulojn al Ĉinio por fari esploradon, sed sen rezulto; por kovri sian sentaŭgecon tiuj absurde asertis, ke "Ĉinio malriĉas je petrolo". Ili diris, ke nafto povas formiĝi nur en la sedimenta tavolo sub la maro de certa geologia epoko. Ili opiniis, ke la sedimenta tavolo de tiu geologia epoko en Ĉinio ja formiĝis dum enfalo de la tero, kaj asertis, ke en Ĉinio ne ekzistas petrolkampo, por ne paroli pri granda petrolkampo. Ankaŭ la burĝaraj reakciaj akademias "aŭtoritatuloj" de la malnova Ĉinio, kiuj kutimis ripeti fremdlandajn opiniojn, papage kriegis ke "Ĉinio malriĉas je petrolo".

Tamen, la revoluciaj geologiaj laborantoj ripetate studis la verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*. Prezidanto Maŭ diris: "... la vereco de multaj teorioj estas nekompleta, kaj la nekompleteco estas korektita tra la kontrolo de praktikado. Multaj teorioj estas eraraj kaj iliaj eraroj estas korektitaj tra la kontrolo



La mezuristoj kaj desegnistoj surgrimpis montpinton altan je 6,300 metroj super marnivelo kaj venke plenumis sian taskon.

de praktikado.” La instruo de Prezidanto Maŭ multe inspiris kaj kuraĝigis ilin. Ili decidis elhaki al si vojon propran al Ĉinio por serĉi petrolon.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la geologiaj laborantoj de nia lando transpasis montojn kaj riverojn ofte sub la luno kaj steloj, profundigis en la amasojn kaj praktikadon por fari enketadon kaj esploradon kaj tiel paŝon post paŝo ekkonis la internajn rilatojn de la formiĝo kaj konservo de petrolo kun certa karaktero de roko kaj certa geologia strukturo. Ili venis al la opinio: se nur troviĝas la necesaj kondiĉoj, nafto povas formiĝi ĉie, ĉu sub la fundo de malprofunda maro, ĉu sub la kontinenta sedimento; kaj se nur troviĝas geologia strukturo konvena por konservi oleon, en aŭ proksime al la olenaska tavolo, povas formiĝi petrolkampo.

Post malfacila luktado la geologiaj laborantoj de nia lando fine trovis grandan petrolkampon en tavolo de kontinenta sedimento. Ili malkovris

la leĝojn de formiĝo, moviĝo, koncentriĝo kaj konserviĝo de petrolo, elhakis tute novan vojon por petrolserĉado kaj per tio ĵetis la teorion de “malriĉeco de Ĉinio je petrolo” en la historian rubejon.

III

Kupra minaĵo de skarna tipo formiĝis per la kontakto de rokoj enhavantaj kalcion kun magmo enhavanta kupron, kiam la lasta leviĝis el la profunda interno de la tero tra rokfendoj, dum movado de terkrusto. La “aŭtoritatuloj” kaj “fakuloj” pri kupra mino de la moderna reviziismo opiniis, ke oni ankoraŭ ne trovis en la mondo grandan kuprominejon de tiu tipo, kaj tial verdiktis ke “ne ekzistas granda kuprominejo de skarna tipo” kaj plenenergie malaprobis serĉadon de tia min-tavolo. Post serioza enketado kaj esplorado iu geologia esplora trupo boris truon en kupra min-tavolo de skarna tipo, kiu estas plurfoje neita de iu reakcia geologia “aŭtoritatulo”, kaj trovis



Mezuristoj kaj desegnistoj de la Instituto pri Glaciejo, Frosta Grundo kaj Dezerto de la Ĉina Akademio de Sciencoj serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

riĉan kupran mintavolon kun dikeco de kelkdek metroj. Novaĵo pri sukceso en la unua batalo multe ĝojigis kaj kuraĝigis la revoluciajn laboristojn kaj oficistojn. Sed, la plenmano da burĝaraj reakciaj akademias "aŭtoritatuloj" falis en panikon kaj urĝeme venigis reviziisman "specialiston" pri kupra mineralo. Impertinente rigardante ĉion de alte, tenante sian nazon supren, tiu "specialisto" kritikis tion kaj ĉi tion kaj insultis la ĉinajn geologiajn laborantojn, ke ili estas "sensciaj" kaj "malprudentaj". Ankaŭ iuj burĝaraj "aŭtoritatuloj" en la geologia rondo de la lando papage kriegis, ke tiu mintavolo "ne havas perspektivon", kaj ĉiurimede malhelpis por strangoli tiun ĉi novan ĝermon.

Kion fari fronte al tia granda premo? Ĉu submetiĝi al aŭ rompi la "fremdlandajn rutinojn"? Ĉu rampi post la "fremdlandanoj" aŭ memstare kaj sendepende elhaki la propran vojon? La revoluciaj geologiaj laborantoj unuanime esprimis firme: "Ni luktos por la gloro de Prezidanto

Maŭ kaj por la gloro de la socialisma patrolando. Ni daŭrigu nian laboron kaj ne aŭskultu ilin." Ili tuj boris du aliajn truojn kaj ricevis la saman rezulton. Tiel, estis fundamente konfirmita la industria valoro de tiu kupra mintavolo de skarna tipo. Post penado en certa periodo estis fine certigite, ke tiu mintavolo estas ne nur granda kaj riĉa, sed ankaŭ sufiĉe koncentrita, kun favoraj kondiĉoj por elfosado kaj ekstraktado. Laŭ la sperto de tiu trupo, ankaŭ en aliaj regionoj estis trovitaj nemalmultaj grandaj kupraj mintavoloj de skarna tipo, tiel ke kupra mino de tiu tipo restarigis sian reputacion kaj ricevis "novan vivon" el la morta verdikto farita de la geologiaj "aŭtoritatuloj" de la moderna reviziismo.

Rompante la superstiĉojn kaj liberigante la penson laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj geologiaj laborantoj de nia lando peneme luktas kaj seninterrompe marŝas antaŭen sur la larĝa vojo de sendependa kaj memstara disvolvo de la geologia afero de nia lando!

Nia Lando Refoje Ākiris Riĉrikolton de Āgrikulturo

PLUAPASE efektivigante la grandan strategian orientilon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, alte tenante unuigan kaj venkan standardon de la Naŭa Kongreso de la Partio, forte tenante la revolucion kaj stimolante la produkton,

la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de la kamparo de nia lando venkis diversajn naturajn katastrofojn kaj refoje akiris riĉan rikolton de la agrikultura produkto en 1969 sur la bazo de riĉaj rikoltoj dum la sinsekvaj pluraj jaroj. En la vasta kamparo de la

Gianĉangbaŭ-brigado, Liaŭning-provinco, akiris riĉan rikolton en la sinsekvaj jaroj kaj estas honorita de popolamasoj kiel la “Daĝaj en Liaŭning-provinco”.



tuta lando ĉie regas ĝojiga atmosfero. Cent-millionoj da komunumanoj aktive liveris kaj vendis al la ŝtato riĉrikoltajn grenon, kotonon kaj aliajn agrikulturajn produktaĵojn por subteni la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon.

En la jaro 1969 la somera kaj aŭtuna grenplantaĵoj de nia lando donis riĉan rikolton; la tutjara totala produktkvanto de greno havis novan pliiĝon kompare kun tiu de la riĉrikolta 1968, i. a. en partaj regionoj la grena produktkvanto pliiĝis kun pli granda skalo kompare kun tiu en 1968. En Guangdong, Gianghi, Ŝanhajo kaj Junnan serioze suferintaj pro sekeco, kaj Hebej surprizatakita de inundo, la produktkvanto de greno en 1969 superis la plej altan nivelon en la historio. En Ŝandong, Ŝanhi, Guanghi, Fugian, Ŝenhi, Hingiang, Kinghaj kaj Ninghia la produktkvanto de greno pliiĝis kun pli granda mezuro kompare kun tiu en 1968. En Giangsu, Ĝegiang, Hunan, Pekino, Tiangin kaj Tibeto la grenplantaĵoj en 1969 refoje donis riĉrikolton surbaze de la riĉrikolta 1968. En Henan, Gujĝoŭ, Hubej, Anhuj,

Liaŭning, Gilin, Hejlonggiang, Gansu, Siĉuan kaj Interna Mongolio, kvankam estis naturaj katastrofoj, tamen dank' al la kontraŭkatastrofa batalo de la vastaj revoluciaj amasoj armitaj per Maŭzedongpenso, ankaŭ estis akirita plibona rikolto. En la jaro 1969, ankaŭ la kotona produkto de nia lando akiris riĉan rikolton. La ĉefaj kotonproduktaj regionoj Giangsu, Ĝegiang kaj Ŝanhajo, sinsekve akiris altan produktkvanton en 1969. En Henan, Ŝenhi, Hebej kaj Ŝanhi la kotona rikolto ĝenerale pliboniĝis kompare kun tiu en 1968. Krome, silkraŭpa kokono, teo, tabako kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj donis riĉrikolton. La vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj ĝoje diris: "En 1969 la agrikultura produkto refoje akiris riĉrikolton, tio estas la granda venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio.


En la batalo por akiri riĉrikolton de agrikultura produkto en 1969 la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, aliaj

Riĉa rikolto de kotono en la suda Ŝanhi-provinco



komunumanoj kaj revoluciaj kadroj armitaj per Maŭzedongpenso kaj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, profunde disvolvis la movadon “lerni de Daĝaj en agrikulturo”, disvolvante la ĝisfundan revolucion spiriton “**timi nek malfacilojn nek morton**”, peneme luktante kaj sinapogante sur propraj fortoj heroe kaj obstine faris batalon kontraŭ trosekeco, superakvo, malalta temperaturo, hajlado, malutilaj insektoj kaj aliaj naturaj katastrofoj. Ĝuste kiel montris la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ke la agrikultura riĉrikolto de nia lando en 1969 estas la venko akirita per Maŭzedongpenso en la batalo kontraŭ naturaj katastrofoj.

Resumante la sperton pri la riĉrikolto en 1969, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj komunumanoj diris kun profunda kompreno, ke la revoluciaj komitatoj en ĉiuj niveloj firme tenis la revoluciigon de la gvidantaj grupoj, tio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de riĉrikolto de la agrikultura produkto en 1969. Laŭ la granda instruo de Prezidanto



Serioze plenumante la instruon de Prezidanto Maŭ “Nepre havu rezervon de greno”, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Huĝen-komunumo de Boluo-gubernio, Guangdong-provinco efektivigis la principon, ke ĉiu brigado havas sian rezervon de greno kaj ĉiu familio havas superfluan grenon. Sur la foto, la grenakceptejo de Huĝen-komunumo portas la grenon liveritan kaj venditan de komunumanoj en cilindrajn grenejojn.

Riĉa rikolto de rizo en Guanghi




Maŭ pri “La plej grava punkto en la reformo de ŝtataj organoj estas intima ligiĝo kun la amasoj” kaj “Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro”, la membroj de la revoluciaj komitatoj en ĉiuj niveloj unuj post aliaj profundigis en la kamparan fronton. Tie ili kune kun komunumanoj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, laboras, enketas kaj esploras, resumas kaj plivastigas avangardajn spertojn. Same kiel komunumanoj, multaj kadroj de gubernioj, komunumoj kaj brigadoj laboras en ŝvito tra la tuta korpo dum suna tago kaj kotumado dum pluva tago. Kie estas malfaciloj, tie ili komandas batalon.

Respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, vastaj amasoj de intelektaj junuloj, urbaj loĝantoj kaj instituciaj kadroj iris al kamparo por fiksloĝi en brigado. Ili jam fariĝis forta trupo de la agrikultura produkto. En kuna studo kaj laboro kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, ili modeste akceptas reedukon de ili, dediĉas sian forton por konstrui novan socialisman kamparon kaj faris kontribuon al akcelado de la agrikultura riĉrikolto en 1969.

Nun la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, aliaj komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de nia lando venke marŝas antaŭen alte tenante la ruĝan standardon de Maŭzedongpenso!

Respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ “lerni de Daĝaj en agrikulturo”, Bajdaŭkoŭ-komunumo de Huahian-gubernio, Henan-provinco transformis la pasintajn sterilajn kampojn sablozajn kaj alkalajn en daĝaj-tipajn kampojn kun irigaciaj retoj, kiuj garantias bonan rikolton eĉ en sekeco aŭ en troa pluvo. La produktkvanto de greno grandskale kreskas en la lastaj sinsekvaj jaroj.



Amase Lerni de

Daĝaj en

Grandskala

Pliprodukto



Lernante de Daĝaj, oni devas antaŭ ĉio lerni de daĝaj-anoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. La komunumanoj de Bajjangju-komunumo metas en la unuan lokon vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso.

Ĝojiga informo pri riĉa rikolto senĉese alvenis de la piedo de Tajhang-montaro. La produktkvanto de greno de Hijang-gubernio pliiĝis je unu oblo en tri jaroj. La bona situacio de produkto kuraĝigas la vastajn amasojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hijang. Ili varme aklamas tiun grandan venkon de Maŭzedongpenso, tiun grandan frukton de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Firme plenumante la instrukciojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo” kaj “lerni de Daĝaj en agrikulturo”, la diversnivelaj revoluciaj komitatoj de Hijang-gubernio gvidas malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn de la tuta gubernio firme teni revolucion kaj forte stimuli produkton, kondukis senlacan batalon kontraŭ naturaj katastrofoj kaj gajnis riĉajn rikoltojn de agrikulturo en la sinsekvaj jaroj. Ĉijara produktokvanto de ĝia greno atingis 163,000,000 ĝinojn kaj superis tiun de 1966 je pli ol unu obloj.

Nun, la amasa movado de la tuta gubernio en lerno de Daĝaj vige disvolviĝas antaŭen. La vasta komunumano decidis pli alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj akiri pli grandajn venkojn.



Post la riĉa rikolto, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hijang-gubernio kondukas subjugadon de malutilaj riveroj kaj servigas ilin al la popolo, kio pliapaŝe kreos favorajn kondiĉojn por grand-skala pliprodukto de la tuta gubernio.

La membroj de diversnivelaj revoluciaj komitatoj de Hijang-gubernio persistas partopreni kolektivan produkton kaj laboron. Jen kamarado Ĉeng Jongguj, ĉefkomitatano de la gubernia revolucia komitato kaj sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, konstruas ŝtuparajn kampojn kune kun komunumanoj.





“La tuta lando lernas de Daĝaj kaj Daĝaj lernas de la tuta lando”. La agrikulturaj reprezentantoj de la diversaj lokoj de Ŝanĥi-provinco venis al Daĝaj-brigado por interŝanĝi spertojn de riĉikoltoj.



Nun Hijang-gubernio levas amasan movadon transformi montojn kaj riverojn por gajni pli grandajn riĉikoltojn.

Daĝaj-brigado gajnis riĉan rikolton en la sinsekvaj 8 jaroj, kaj ĉijare ĝia meznombra produktokvanto atingis pomue 942 ĝinojn.



Liugi-komunumo Unuapaŝe

Efektivigis Mekanikigon

ĈENG GINGIE*

SUB la brila direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia Liugi-komunumo unuapaŝe efektivigis agrikulturan mekanikigon dank' al la revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema luktado. Nia komunumo kun pli ol 11,000 loĝantoj nun havas 15 traktorojn (=22.65 normaj traktoroj), 39 movfortajn maŝinojn kaj 3 kamionojn, kiuj posedas sume 1,545 ĉevalpovojn, t.e. ĉiu ĉevalpovo servas al 6.5 muoj da agro. Krome, ĝi havas 8 elektrajn motorojn kaj pli ol 230 maŝinojn kaj aparatojn por irigaciado, drenado, prilaboro, degrajnigo kaj diversaj ĉefaj kamplaboroj. En irigacio, drenado, degrajnigo kaj prilaboro de agrikulturaj kaj flankaj produktoj, ni jam tute efektivigis mekanikigon; en plugado, transportado kaj protektado de plantaĵoj ni fundamente efektivigis mekanikigon.

En la pasinteco, Liugi-komunumo estis fame konata pro sia malriĉeco. Antaŭ la Liberiĝo, ĉi tie cirkulis tia popolkanto: "Ne edzinigu filinon al Liugi-vilaĝo, kiun trafas ĉiam superakvego aŭ sekego. Disiĝas tie geedzoj kaj gefiloj, kaj familioj translokiĝas per du korboj." Post la Liberiĝo, dank' al la agrara reformo, precipe la socialisma revolucio kaj paŝo-post-paŝe efektivigita kooperigo de agrikulturo, multe disvolviĝas la socialisma kolektiva produkto. Kaj post la fundamenta efektivigo de agrikultura mekanikigo, kiel tigro kun flugiloj, ĝi radikale ŝanĝis la fizionomion de Liugi-komunumo. Dank' al elstarigo de la proletara politiko kaj decidema iro de la socialisma

vojo ni havigis al ni maŝinojn por irigacio kaj drenado. Ĉio ĉi tio plus la grandskala akvoutiliga konstruo en la lastaj jaroj garantias al 10,100 muoj da agro de la komunumo riĉan rikolton eĉ dum sekego aŭ tro abunda pluvo, escepte de okazo de eksterordinara superakvego. Antaŭ 1958, pomua produktkvanto de kotono ne atingis 100 ĝinojn; de post 1962 ĝi jam superis ĉiujare 100 ĝinojn. En 1965 sekego daŭris pli ol 120 tagojn, ni irigaciis kampojn per pli ol 40 pumpiloj kaj batalakiris grandan riĉrikolton. De 8,000 muoj da kotonkampoj pomua produktkvanto de sensemigita kotono atingis pli ol 180 ĝinojn. Antaŭ 1958 estis nur sola grupo por ripari ferajn, lignajn kaj bambuajn ilojn. Post la unuapaŝa efektivigo de mekanikigo en agrikulturo, granda kvanto da laborfortoj estis ŝparita por disvolvi socialisman multflankan entreprenadon. Nun inter ĝiaj pli ol 10 entreprenoj estas mekanika stacio, brikaj bakejoj, prilaborejoj por greno, kotono kaj oleo, konstrua brigado, bredejoj kaj aliaj. La enspezo de neagrikulturaj entreprenadoj en 1968 pliiĝis 11-oble kompare kun tiu en 1957, ĝia proporcio en la tuta enspezo leviĝis de 4.3% ĝis 24%.

La gigantaj ŝanĝiĝoj alportitaj de la agrikultura mekanikigo komprenigis al ni profunde: La brila penso de Prezidanto Maŭ pri efektivigo de agrikultura mekanikigo sur la bazo de agrikultura kooperigo estas senkompare saĝa kaj prava, kaj estas brila vojmontra lampo por firmigi kaj disvolvi socialisman kolektivan ekonomion.

En nia Liugi-komunumo la tutan procezon de paŝo-post-paŝa efektivigo de agrikultura mekani- kigo sur la bazo de agrikultura kooperigo trairis intensa batalo inter la du linioj.

Jam frue en 1943, en sia grava artikolo *Organi- ziĝu* la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris al ni kamparanoj brilan vojon de organizado de “**agrikultura produkta kooperativo de kolektiva interhelpo**”. En la brila verko *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* skribita en 1955, Pre- zidanto Maŭ refutis diversajn absurdaĵojn de dekstraj oportunistoj oponentaj kontraŭ la agri- kultura kooperigo kaj montris al ni revolucion linion por efektiviĝi socialisman transformon de agrikulturo, tio estas: “**En agrikulturo, sub kon- diĉoj en nia lando, devas esti unue kooperigo kaj poste la uzo de grandaj maŝinoj (en kapitalismaj landoj oni kapitalismigas agrikulturon).**” Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki freneze oponis kontraŭ tiu proletara revolucia linio kaj elmetis kontraŭrevolucion reviziisman linion “unue mekaniĝo kaj poste kooperi- go”, vane provante konduki la agrikulturon de nia lando al kapitalisma vojo. Firme plenumante la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampara- noj de nia Liugi-komunumo donis fortan rebaton al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki.

Prezidanto Maŭ plej zorgas nin malriĉkam- paranojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj plej komprenas nian deziron. En la serioza mo- mento, kiam la movado de agrikultura kooperigo suferis subfoson de Liu Ŝaŭki — tiu malnova kontraŭrevoluciulo, Prezidanto Maŭ publikigis sian kuraĝigan brilan raporton *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo*. Post kiam la raporto de Prezidanto Maŭ estis komunikita al nia distrikto, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampara- noj rapide informis ĝin unuj al la aliaj, kaj la tuta distrikto bolis en ĝojego. Kvazaŭ bambuidoĵ post pluvo, rapide disvolviĝis la agrikulturaj koo- perativoj. En tiu jaro nia kooperativo disvolviĝis en altgradan agrikulturan produktan koopera- tivan kun pli ol 1,100 familioj. Tre alta estis la socialisma entuziasmo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la jaroj 1956 kaj 1957, ni sinsekve akiris senprecedencajn riĉri- koltojn, kaj la enspezo de la kooperativoj kaj la akumulo de kolektivo multe pliiĝis. En 1957, ni unu fojon aĉetis 3 movfortajn maŝinojn per

monsumo akumulita de nia kooperativo. Post komunumigo en 1958, kun pli granda skalo, pli- multaj nombroj kaj plivasta agro, la kolektiva ekonomio fariĝis pli potenca, kaj nombro kaj specoj de agrikulturaj maŝinoj senĉese plimultiĝis. La komunumo faris grandan paŝon antaŭen sur la vojo de agrikultura mekaniĝo.

En la problemo kiel efektiviĝi agrikulturan mekaniĝon, ĉu oni sinapogu sur investo de la ŝtato aŭ sur la propraj fortoj de la kolektivo? Iuj pledis por peti subtenon de la ŝtato kaj sinapogi sole sur investo de la ŝtato. Tiuj diris: “La mekaniĝo postulas grandan monrimedon, se ni volas tion entrepreni, ni povas nur apogi nin sur la ŝtato.” Rilate al tia opinio, ni kondukis grandan diskuton. Post studo de la instruo de Prezidanto Maŭ pri “**sinapogo sur propraj fortoj**” kaj “**penema luktado**”, ni unuigis nian konon kaj altigis nian socialisman konscion, kaj vigle dis-

Konkerinte multajn malfacilojn, la laboristoj de la ko- munuma mekanka stacio povas ripari ne nur motorojn, sed ankaŭ aŭtojn.



volviĝis movado de mekanikigo surbaze de la propraj fortoj.

Post la komunumigo, la produkto pli disvolviĝis kaj estis pli granda ebleco por disvolvi agrikulturan mekanikigon surbaze de akumulado de la kolektivo. Garantiante paŝo-post-paŝan altigon de enspezo de la komunumanoj, ni konvene pliiĝis la kolektivian akumulon por aĉeti agrikulturajn maŝinojn. La investo de nia tuta komunumo en agrikulturaj maŝinoj atingis 1,200,000 *yuan*, inter kiuj escepte de unu traktoro Dongfanghong kaj 4 traktor-tirataj agrikulturiloj donacitaj de la ŝtato en 1963, ĉiu cetera sumo estas akumulita de ni mem per nia penema luktado.


Por kulturaj mekanikajn laborantojn, nia komunumo ĉefe aplikas ankaŭ rimedon sinapogi sur siaj propraj fortoj. En ĝi nun laboras pli ol 110 mekanikaj laborantoj, kiuj ĉiuj estas gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo. Escepte la unuajn pli ol dek senditajn al la gubernio por lernado, la ceteraj ĉiuj estis kulturitaj de nia komunumo per la rimedo instrui novajn per la malnovaj. Laborante kiel laboristoj kaj samtempe kamparanoj, la mekanikaj laborantoj estas varme laŭdataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la kamaradoj de la mekanika stacio de la komu-

numo, kun la revolucia spirito kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi, rompis rutinajn regulojn kaj konkeris unu post alia malfacilojn en riparo de maŝinoj. Antaŭe ili povis ripari nur malgrandajn difektojn de maŝinoj, sed nun ili povas mem fari mezajn kaj grandajn riparojn ne bezonante peti helpojn de ekster la komunumo. En 1968, ili faris grandajn riparojn ne nur por du kamionoj de sia komunumo, sed ankaŭ por tri kamionoj de aliaj. En la pasinteco ĉiuj traktoraj partoj estis aĉetataj aliloke, se iu peco difektiĝis kaj ne estis akirebla por iu tempo, do la maŝinoj devis ĉesi funkcii. Nun ili mem faras iujn maŝinpartojn disvolvante sian teknikan latentan forton. Ili ankoraŭ pliiĝis laborkapablecon de siaj maŝinoj kaj tiel plivastigis ilian uzeblecon.

Retrorigardante la iritan vojon, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Liugi-komunumo profunde komprenas, ke por disvolvi la agrikulturan mekanikigon oni devas sinapogi sur Maŭzedongpenso, kaj por bone utiligi agrikulturajn maŝinojn oni devas sinapogi ankaŭ sur Maŭzedongpenso. Nur se la mekanikigo estas gvidata per revoluciigo, ĝi povas esti vere efektiva.

**La verkinto de tiu ĉi artikolo estas ĉefkomitatano de la revolucia komitato de Liugi-komunumo de Hingŝou-gubernio, Hubej-provinco.*



La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo ofte organizas junulojn de tiu teknika trupo studi verkojn de Prezidanto Maŭ.

Elektrejoj

Dislokiĝas Dense

en Nova

Montregiono



La hidraŭlika elektrejo de Hongŝan-brigado konstruita sur alta monto

EN Jongĉun-gubernio sudoriente de Fugian-provinco, ondiĝas montoj kaj interplektiĝas riveretoj. Ĉie ĉi tie vidiĝas hidraŭlikaj elektrejoj, kiujn la popolaj komunumoj konstruis per riverbarado kaj akvokonservo. Akvo el elektroirigaciaj stacioj senĉese fluas en rizkampojn laŭ zigzagaj kanaletoj. Sur montdeklivoj kaj ĉe ambaŭ flankoj de ŝoseoj staras vicoj da elektraĵoj, kiuj ligas disajn vilaĝetojn.

BOLANTA MONTVILAĜO

Jongĉun-gubernio estis izolita kaj dezerta montregiono. Antaŭ la Liberiĝo, tieaj laborantaj popolanoj vivis tiel mizere, ke ili ne havis sufiĉe

da manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Kiam nokto falis, la tuta montregiono dronis en fulga mallumo pro manko de lampoj. Ĉiu domo estis solide fermita kaj neniu kuraĝis iri eksteren. Post la Liberiĝo, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj fariĝis mastroj de la montregiono kaj prosperigis la montregionon per sia konstruado. Kun la rapida disvolviĝo de konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj en la lastaj pli ol dek jaroj, preskaŭ en ĉiuj vilaĝoj instaligis elektraĵoj kaj megafonoj. Nun, kiam la suno subiras malantaŭ monton, eklumiĝas lampoj en ĉiuj domoj de montvilaĝoj, kaj la megafonoj disaŭdigas sonorajn revoluciajn kantojn kaj belsonajn revoluciajn modelajn operojn k. a.. Tiam ekbolas la tuta montvilaĝo.

En la domo de malriĉkampano Onklo Kang Ŝiŝa oni povas vidi la ŝanĝiĝon de la montregiono

post konstruiĝo de hidraŭlikaj elektrejoj. Antaŭ kelkaj jaroj jam estis instalita elektra lampo en lia domo. Sed nun sur la muroj en lia domo ankoraŭ restas kavetoj kien antaŭe oni enigis rezinan torĉon por lumigado. Ne nur en la domo de Onklo Kang, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj domoj de vilaĝanoj troviĝas tiaj postsignoj sur la muroj. Ili estas atestoj de mizera vivo de la montregiona popolo en la pasinteco. Nun, kvankam en ĉiuj domoj jam instaligis elektraj lampoj, tamen neniu volas ilin plenigi per mortero. Konservante ilin oni plie sentas la hodiaŭan vivon feliĉa, kaj ankaŭ la posteuloj ne devos forgesi la amaran pasintecon. Onklo Kang Ŝiŝa estas maljuna malriĉkampano, kiu havis profundan suferon kaj malamon en la malnova socio. Li senlime amas Prezidanton Maŭ kaj ofte edukas la tutan familion aŭskulti Prezidanton Maŭ kaj bone konduki la revolucion. Sed antaŭe la rezinaj torĉoj duonlumigis ĉambron kaj tio tre malfavoris studon de verkoj de Prezidanto Maŭ. Post kiam la brigado konstruis hidraŭlikan elektrejon en 1965, li tuj instaligis elektran lampon en sia domo. De tiam ĉiuvespere la tuta familio persistas en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Dank' al la nutrado de Maŭzedongpenso ĉiuj en la familio montriĝas bonaj kaj en ideologia revoluciigo kaj en fizika laboro. La komunumanoj honoras ĝin per "la ruĝa familio".

La ŝanĝiĝo de la familio de Onklo Kang estas miniaturo de tiu de la tuta montvilaĝo. Nun post la vespermanĝo, ĉirkaŭsidante sub brila elektra lampo, iuj el la komunumanoj batalas kontraŭ egoismo kaj kritikas reviziismon en kurso de Maŭzedongpenso dum aliaj disvolvas revolucionan kritikon. Je la 12-a horo de la profunda nokto de la 24-a de aprilo en la pasinta jaro, kiam la komunumanoj informiĝis el megafonoj pri la triumfa fermiĝo de la Naŭa Kongreso de la Partio, ili tuj okazigis mitingon por varma celebrado. La komunumanoj diris emocie: "Jubilas Pekino, jubilas la tuta lando kaj jubilas ankaŭ nia montvalo! Ni estas ankoraŭ pli proksime de Prezidanto Maŭ kaj pli strikte sekvas lin!"

POST FINKONSTRUO DE LA UNUA MALGRANDA HIDRAŬLIKA ELEKTREJO

La hodiaŭaj montvilaĝanoj de Jongĉun ĝenerale uzas elektron ne nur en produktado kaj konstruado sed ankaŭ en la vivo, studo kaj kultura vivo. Tamen la historio de elektro ĉi tie havas nur kelkajn paĝojn.

En Jongĉun la unuaj malgrandaj hidraŭlikaj elektrejoj estis konstruitaj en la alta tajdo de la agrikultura kooperigo.

En 1956, la organiziĝintaj popolanoj de Jongĉun kun alta entuziasmo sin ĵetis en la batalon por konstrui novan socialisman montregionon. Rapide disvolviĝis la agrikultura produkto, kaj riĉa rikolto de greno estis akirita en sinsekvaj jaroj. Sed prilaborado de greno per postiginta metodo de manlaboro konsumis grandan nombron da laborfortoj, precipe virinoj okupantaj 50 procentojn de la laborfortoj, kiuj ĉiutage okupiĝis pri rizpistado kaj farunmuelado, ne povis rekte partopreni kolektivan produktadon. La vastaj amasoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj elmetis la batalan sloganon "gajnu laborfortojn per konstruo de hidraŭlika elektrejo". "En Montvaloj funkciigos elektrejo!" Tio estas

Juna komunumano fariĝis teknikisto de la hidraŭlika elektrejo de komunumo.






Malgrandaj hidraŭlikaj centraloj, kiujn konstruis la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Jongĉun-gubernio sinapogante sur siaj propraj fortoj, dislokiĝas ĉie en ĝia montregiono. Sur la foto estas la Dakingjuan-a hidraŭlika centralo de tiu ĉi gubernio.



La hidraŭlikaj centraloj en la kamparo multe stimulis la disvolviĝon de lokaj industrioj. Jen estas angulo de la ĥemisterka fabriko de Jongĉun-gubernio.




La prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj estas mekaniĝita, kaj tio multe ŝparis laborfortojn.

(Maldekstre sube) Irigacio per elektraj pumpiloj kreis favorajn kondiĉojn por la riĉa rikolto de agrikulturo.

Kampa observa stacio por ekstermi fiinsektojn.



*Sub la brila lampo,
onklo Kang Ŝiŝa studas
verkon de Prezidanto Maŭ kune kun
siaj edzino kaj nepino.*



afero, pri kiu oni neniam kuraĝis pensi. Dum konstruado de elektrejoj la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj neniam sin retiris antaŭ opono kaj malhelpo de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili diris: “Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, ni liberiĝis kaj fariĝis mastroj de la montregiono. Hodiaŭ, kun kolektivaj fortoj kiel nia apogilo ni nepre konstruos la hidraŭlikan elektrejon!” Tiam la membroj de la agrikultura kooperativo “Aŭroro” la unuaj rompis obstaklojn kaj aĉetis simplajn ekipaĵojn sin apogante sur kolektiva akumulo kaj sia propra investo. Poste ĉiuj, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, sin ĵetis en la laboron kaj fine ili sukcese konstruis la unuan malgrandan hidraŭlikan elektrejon en montvilaĝetoj de Jongĉun nur per du monatoj.

Daŭre disvolviĝis la konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj de la tuta gubernio, kaj neniam ĉesis ankaŭ la klasbatalo. En 1958, kiam la jongĉunaj popolanoj levis altan tajdon konstrui hidraŭlikajn elektrejojn multe, rapide, bone kaj ekonomie sub la lumigo de la tri ruĝaj standardoj, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman

vojon elmetis sloganon forme “maldekstran” sed esence dekstran, nome “pene lukti du monatojn por konstrui mil elektrejojn kun dek mil ĉevalpovo”, provante subfosi la konstruadon de hidraŭlikaj elektrejoj. Ili invitis du fremdlandajn hidroelektrajn “specialistojn” al malproksima montvalo de Jongĉun, kiuj plenenergie bremsis la revolucian amasan movadon, malice kalumniante ke “tio ne estas hidraŭlika elektrejo, sed primitiva malgranda muelejo taŭga por nenio”. Sed la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj tute ignoris ilian absurdaĵon. Hongŝan-brigado multfoje petis por konstrui hidraŭlikan elektrejon sur la monto alta je mil metroj super marnivelo. Sed la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ne donis sankcion, pretekstante, ke tie mankas akvofonto. Sidante ĉirkaŭ rezina torĉo, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ĉerpis el ili saĝon kaj forton. 72-jara malriĉkamarano Kang Ĵufu diris: “Prezidanto Maŭ instruas nin rigardi problemojn el vidpunkto de divido de unu en du. En nia Hongŝan altas la tereno kaj mankas akvo, tio estas malfavoraj kondiĉoj, sed pro alteco de la monto ankaŭ granda estas la distanco de akvo-

falo, tio estas favora kondiĉo. Ne sufiĉas akvofonto, ni do fosu akvokonservujon, farante la malfavorajn kondiĉojn en la favorajn.” Tuj poste ili fosis akvokonservujon kaj kondukis en ĝin kvar malgrandajn fontfluojn, tiamaniere ili konstruis malgrandan hidraŭlikan elektrejon kun kapacito sufiĉa por la tuta brigado. Sub la kuraĝigo de la revolucia spirito de Hongŝan-brigado, aperis unu post alia la hidraŭlikaj elektrejoj kun “hongŝan-stilo” en la tuta gubernio, kiuj disradias per brilaj lumoj. En la tri jaroj de la granda antaŭensalto, en la gubernio konstruiĝis sume 26 malgrandaj hidraŭlikaj elektrejoj, kaj la subfosado de la klasaj malamikoj denove trafis senhontan malvenkon.

En la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio aperis ankoraŭ pli prospera situacio de konstruado de malgrandaj hidraŭlikaj elektrejoj en Jongĉun. En la lastaj tri jaroj, konstruiĝis 49 tiaj elektrejoj en la gubernio. En la pasintaj dek jaroj la plej malproksima Idu-komunumo konstruis nur du hidraŭlikajn elektrejojn. Sed en la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝi konstruis 10 sinapogante sur la propraj fortoj, tiel ke la 12 brigadoj de la tuta komunumo havis siajn hidraŭlikajn elektrejojn.

GIGANTA FRUKTO DE PENEMA LUKTADO


En Jongĉun-gubernio la hidraŭlikaj elektrejoj estas multaj en kvanto kaj malgrandaj en skalo. Iliaj ekipaĵoj, labormanieroj kaj teknikaj fortoj ĉiuj estas “indiĝenaj”, tial la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj figure priskribas ilin, ke iliaj trajtoj estas “malgrandaj, indiĝenaj kaj multaj”. Nun, el 124 hidraŭlikaj elektrejoj de tiu gubernio la plej granda estas kun pli ol 700 kilovatoj kaj la plej malgranda nur kun 2.5 kilovatoj. Ĉiuj ĉi tiuj estas konstruitaj de la montregiona popolo per diligenta kaj ŝparema manieroj kaj per la kolektivaj fortoj.

En Vudong-brigado de Vuligje-komunumo sin trovas hidraŭlika elektrejo kun 12 kilovatoj, kiu estas instalita per malnovaj kaj simplaj ekipaĵoj kaj komplete konstruita nur paŝon post paŝo. En 1963, tiu brigado havis nur unu hidraŭlikan stacion por prilabori agrikulturajn kaj flankajn produktaĵojn por la komunumanoj. Post la akumulado de kapitalo en unu jaro kaj duono, oni transformis ĝin en hidraŭlikan elektrejon. En

la komenca periodo, ĝi posedis nur rizmuellilon, senŝeligilon kaj batatmuellilon, kaj poste tiuj maŝinoj plimultiĝis ĝis 6, kiuj povas prilabori diversajn ĉefajn agrikulturajn kaj flankajn produktaĵojn por komunumanoj. En la unua jaro post la konstruiĝo de la hidraŭlika elektrejo oni instalas nur du kilometrojn da feraj fadenoj por konduki elektron, kaj en vintro de la sekvinta jaro la elektra linio jam plilongiĝis ĝis kvar kilometroj. En la granda kultura revolucio ili ordigis kaj riparitis malnovajn elektrajn liniojn kaj anstataŭigis ferajn fadenojn per aluminiuj. Nun, tiu hidraŭlika elektrejo jam etendis siajn elektrajn liniojn ĝis 12 kilometroj, tiel ke 90% el la produktaj grupoj ekuzis elektron. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: “Grandan rolon ludas tia hidraŭlika elektrejo, kiun ni kapablas funkciigi kaj mastrumi.”

Turbino estas unu el la ĉefaj ekipaĵoj de hidraŭlika elektrejo. Konstruado de malgrandaj hidraŭlikaj elektrejoj en Jongĉun bezonis grandan kvanton da turbinoj, kaj preskaŭ ĉiuj ĉi tiuj estas provizitaj de la malgranda mekanika fabriko funkciigata de la gubernio. Ĝi antaŭe estis fabriko de agrikulturaj instrumentoj, en kiu laboris nur tri laboristoj per unu mantornilo. Por kontentigi la bezonon en konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj en kamparo ĝi aplikis indiĝenan teknikon kaj paŝopostpaŝe faris produktadon de turniĝaj turbinoj el ligno ĝis tiu de multspecaj turbinoj el fero. Nun ĉiujare ĝi jam povas produkti turbinojn kun 6,000 kilovatoj kaj maŝinojn por prilabori agrikulturajn kaj flankajn produktaĵojn kaj aliajn ekipaĵojn. Krome, en la granda kultura revolucio ĝiaj laboristoj sukcese provfabrikis generatorojn.

En la komenco de konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj, en Jongĉun-gubernio troviĝis nur unu diplomito el teknika lernejo pri hidroelekto. Kiel solvi la problemon pri teknikaj fortoj por multe konstrui hidraŭlikajn elektrejojn en la montregiono? La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme sin apogis sur siaj “indiĝenaj specialistoj”. Multaj brigadoj elektis junajn komunumanojn bonajn en ideologio kaj laboro kaj sendis ilin al hidraŭlika elektrejo funkciigata de la komunumo por tie studi kaj praktiki en mallonga periodo. Ellerninte teknikon, ili revenis al sia brigado. Iam la hidraŭlika elektrejo de komunumo sendis teknikistojn al brigadoj por doni helpon, por ke ili studu teknikon dum la konstruado. Tiuj teknikistoj faras kampan laboron tage kaj produktas elektron nokte. Same kiel komunumanoj, ili ricevas laborpontojn noti-



La konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj akcelas la disvolviĝon de loka industrio. Jen malgranda karbominejo tuj komencos produkton.

tajn laŭ laboro. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris kontente: “Niaj propraj teknikistoj ja estas bonaj!” Nun la tuta gubernio jam elkulturis pli ol 2,000 tiajn teknikistojn kiuj kapablas kaj en industrio kaj en agrikulturo. Plejparto el ili ellernis esplormezuradon, projektadon, konstruadon, instaladon, mastrumadon, kontroladon kaj riparadon.

EFEKTIVIGAS LA REVO

Kun rapida disvolviĝo de konstruado de elektrejoj por agrikulturo, en Jongĉun la kompare pezaj fiziklaboroj estas anstataŭataj per mekanikigo kio liberigas grandan nombron da laborfortoj.

Komunumanino Vang Hiu estas patrino kun pluraj infanoj. Antaŭe ŝi lacege okupiĝis pri rizpistado, farunmuelado, kuirado kaj flegado de

infanoj, ne povante partopreni la kolektivan laboron. Post la efektiviĝo de mekanikigo de prilaborado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj en la brigado, ŝi liberiĝis el peza hejma mastrumado kaj ĉiujare partoprenas kolektivan laboron per pli ol 200 labortagoj. Havante hidraŭlikan elektrejon la Luŝan-brigado de Idu-komunumo anstataŭigis prilaborajn ilojn, kiaj piedpistiloj kaj noriaj pistiloj, per tiuj kun elektro kiel movforto, kaj senigis la pezan laboron de komunumanoj en prilaborado, tial granda nombro da laborfortoj estas liberigita. Nun la gubernio sume instalas proksimume 800 diversajn prilaborajn maŝinojn funkciigatajn per hidraŭlikaj elektrejoj kaj hidraŭlikaj stacioj, efektivigis mekanikan prilaboron de 90% el agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj kaj ŝparis grandnombrajn laborfortojn. Multaj produktaj brigadoj organizis la ŝparitajn laborfortojn en montekspluatajn kaj flankokupajn trupojn por konkeri sovaĝajn montojn kaj gajni riĉaĵojn de la naturo.

En Jongĉun estas multaj sekkampoj, kies produktkvanto estas malalta. En la batalo transformi la kampojn en rizkampojn por akiri riĉan rikolton, la komunumanoj kombinis akvoutiligan konstruadon kun la konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj. Krom elektra pumpado de akvo por irigaciado, ili ankaŭ plilongigis kaj disvastigis kanalojn de hidraŭlika elektrejo por atingi la celon kaj irigacii kaj elektroprodukti. Ĉar la tuta gubernio havas hidraŭlikan elektron kaj pumpilojn kaj aliajn akvoutiligajn rimedojn, nun la irigaciata areo pliiĝis de pli ol 40,000 muoj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis pli ol 140,000 muoj

nun kaj la totala produktkvanto de greno kreskis je pli ol unu oblo.

Krome, malkara hidraŭlika kaj elektra povoj ankaŭ puŝis la disvolviĝon de lokaj industrioj ĉefe servantaj por agrikulturaj produktoj. Nun en la tuta Jongĉun jam sin trovas pli ol 70 malgrandaj karbminejoj, ferforĝejoj, maŝinfabrikejoj, ŝpinteksejoj kaj sukerpremejoj.

Nun la popolanoj de Jongĉun luktas por efektiviĝi novan planon de konstruado de hidraŭlikaj elektrejoj de la tuta gubernio.

Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj

Bonvena al Kamparanoj

VEJ NONG

SEKVANTE la instruon de Prezidanto Maŭ “politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro”, la revolucia komitato de Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj en Hiangjuan-gubernio, Ŝanhi-provinco, funkciigis kurson de Maŭzedongpenso por diskuti la ĉefan problemon, kiel la fabriko servas al la agrikultura produktado. En la kurso oni multe parolis pri la batalo inter la du linioj en la fabriko kaj entuziasme studis la brilan instruon de Prezidanto Maŭ pri gubernia industrio, kaj forte kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki, kia “profito en komando”. Tiel ke ĉiuj pli klare komprenis, ke ĝuste trakti la rilaton inter “fabrikado” kaj “riparado” estas problemo de produkta direkto, kiun sekvas la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj. La laboristoj opiniis, ke la ĝusta direkto por la fabriko estas produkti certan nombron da difinitaj produktaĵoj laŭ plano de la ŝtato sur la bazo de riparado de agrikulturaj maŝinoj, akomodigante al la bezono de loka agrikultura produktado.

Kun altiĝo de sia kono, ili, unuflanke, aktive

akceptis la taskon asignitan de la ŝtato provfabrike muelilon; aliflanke, ili organizis sturman taĉmenton de urĝa riparado kaj rebonigis ĉiujn difektitajn agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn neriparitajn en la pasintaj jaroj. Difektita akso alsendita de iu brigado de Bejdi-komunumo estis senzorge metita en la fabriko jam tri jarojn. Montrante la difektitan akson, laboristoj indigne diris: “Tio estas malbona sekvaĵo de antaŭenpuŝo de la reviziismaj nigraj varoj, kiaj ‘nura ĉasado al produkta valoro’ kaj ‘profito en komando!’” Ili okazigis kritikan kunvenon prenante la akson kiel “vivan edukan materialon”, kaj tio pli altigis fervoron de laboristoj por servi al la agrikulturo. Post luktado de ioma tempo pli ol 300 difektitaj agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj estis tute riparitaj.

Post akcepto de la tasko donita de la ŝtato provfabrike muelilon, por ne malhelpi la riparan laboron, ili speciale fondis riparan grupon subtenantan la agrikulturon, kiu konsistas el 16 veteranaj laboristoj kun bona ideologio kaj alta tekniko. Laborejoj memvole subtenis la riparan grupon per siaj

bonaj ilmaŝinoj kaj elektroveldiloj. Krome ili difinis la laboran sistemon de la grupo: plej rapide plenumi urĝan riparon; kie oni bezonas, tien ili tuj iras; kiam venas ripara tasko, tiam ili senprokraste ĝin plenumas.

La laboristoj de la ripara grupo fervore servas al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Iun tagon, brigado sendis homojn al la gubernio por riparigi lagron de norio, sed tie la lagro ne estis riparita eĉ post tri tagoj. Jam estis tagmezo, kiam ili sin turnis al la ripara grupo kun malgranda certeco pri la sukceso. Laboristoj ne prenis manĝon, laboris en la daŭro de ses horoj kaj fine riparis la maŝinparton. Ili serioze riparis ĉiujn agrikulturajn instrumentojn grandajn aŭ malgrandajn. Iutage, kiam la laboristoj tagmanĝis, al ili venis kamparano ŝultroportante paron da siteloj por fekaĵoj kaj petis de ili riparadon. Iu veterana laboristo tuj flankenmetis la bovlon kaj rapide riparis la sitelojn por la kamparano.

Post komenciĝo de la somera rikolto iuj brigadoj portis al la ripara grupo pli ol 100 difektitajn agrikulturajn forkegojn, kiuj bezonas veldadon, sed tiam la gas-veldiloj estis portitaj al kamparo. Kion fari? Se oni atendas la revenon de la gas-veldiloj, do tio nepre prokrastos la urĝan rikoltadon de tritiko. Post eksperimentado la laboristoj de la grupo subtenanta la agrikulturon decidis uzi elektroveldilon anstataŭ gas-veldilon. Post luktado de pli ol 20 horoj ili finfine plenumis la taskon. Nur en julio de la lasta jaro la grupo riparis 14 noriojn kaj pumpilojn kaj pli ol 300 maŝinpartojn kaj faris pli ol 2,300 maŝinpartojn por kompletigi maŝinojn. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝoje diris: "La fabriko estas starigita por ni kaj ĉiamaniere servanta al ni kaj ni bonvenigas tian fabrikon de la agrikulturaj maŝinoj."

La fondiĝo de la grupo subtenanta la agrikulturon solvis nur la problemon ripari instrumentojn portitajn de kamparanoj en la fabrikon, sed tiamaniere ĝi ne povis kontentigi ankaŭ la bezonojn de la brigadoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Rilate al tiu ĉi problemo la fabrika revolucia komitato organizis la laboristojn de la tuta fabriko por fari amasan diskuton. Laŭ la proponoj de la amasoj kaj bezonoj de produktaj brigadoj dum la okupataj sezonoj, la revolucia komitato de la fabriko fondis malgrandajn taĉmentojn subtenantajn la agrikulturon por profundigi en la kamparon kaj ripari agrikulturajn instrumentojn por la brigadoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En la komenco de printempo de la lasta jaro, la laboristoj de la tuta fabriko iris al la kamparo fari amasan enketadon en libera tago por konduki riparadon laŭplane. Ili vizitis 130 produktajn brigadojn en 15 komunumoj kaj per tio ili klare konis la staton de maŝinoj por irigaciado, drenado, transportado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj, facile difekteblaj maŝinpartoj kaj specojn kaj tipojn de tiuj maŝinoj. Samtempe ili kreis sistemon: laboristoj tenas ligiĝon kun difinita komunumo kaj difinita brigado.

En feriaj tagoj multaj laboristoj de la fabriko iris al sia difinita brigado por propagandi Maŭzedongpenson kaj ripari agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn por la brigado kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili turnis liberan tagon en tagon subtenantan la agrikulturon.

En julio de la lasta jaro okazis serioza sekeco. Informiĝinte ke difektiĝis pumpilo de Ŝihujjaŭ-brigado, laboristoj tuj rapidis al tiu brigado kunportante siajn necesajn instrumentojn kaj rebonigis ĝin en malpli ol unu tago. Kiam la akvo elŝprucis, la ĉelokaj komunumanoj eksaltis de ĝojo kaj diris: "Laboristoj-fratoj ja tutkore kaj tutanime servas por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!"

Hiangjuan-gubernio havas 20 popolkomunumojn kun 279 produktaj brigadoj. En la lastaj jaroj ĝia agrikultura mekanikigo multe disvolviĝis. Nemalmultaj produktaj brigadoj posedas sufiĉe grandan nombron da grandaj kaj mezgrandaj agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj. Nur ĉirkaŭ 100 laboristoj de la fabriko jam ne sufiĉas por kontentigi la bezonojn de la agrikultura produkto. La Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj en Hiangjuan-gubernio decidis kulture riparistojn por komunumoj kaj brigadoj por pli bone servi al la agrikulturo.

Antaŭe Nantianĝang-brigado de Ĉengguan-komunumo ofte petis aliajn por ripari maŝinojn. Laboristoj de la fabriko faris interkonsenton kun tiu brigado kaj decidis kulture du metilernantojn por ĝi. Ĉiufoje, kiam ili riparis en tiu brigado, ili venigis al si tiujn du lernantojn, lernigis ilin kiel ripari maŝinojn kaj lasis ilin mem fari praktikon. Nun ili jam povas mem ripari pli ol dek agrikulturajn maŝinojn kaj sep noriojn de tiu brigado.

Tiu fabriko jam elkulturis pli ol 100 riparistojn de agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj por pli ol sepdek produktaj brigadoj. La vicaro de la riparistoj nun sane kaj rapide kreskas.

Bona Kondukanto

— Pri modelaj agoj de kompartiano



Li Deji (la unua de maldekstre) gvidas amason en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

LI DEJI, estro de la konstanta komitato de la Kongreso de Malriĉkamparanoj kaj Mal-superaj Mezkamparanoj de Lingbaŭ-gubernio, Henan-provinco, kaj vicsekretario de la partia filio de Panlong-brigado de Vumu-komunumo estas modela persono multe laŭdata de la popolo de Lingbaŭ-gubernio.

De dudek jaroj post sia partopreno en la revolucio, Li Deji ĉiam staras sur la plejfronto de klasbatalo kaj produkta batalo kaj heroe batalas kontraŭ klasaj malamikoj, kontraŭ la naturo. Li vere meritas la nomon de proletara avangarda batalanto kaj bona kondukanto por la revoluciaj amasoj.

La pli ol 400 muoj da agro de Vangjigoŭ-grupo de Panlong-brigado, al kiu Li Deji apartenas, dise lokiĝas sur montdeklivoj. La deklivoj estas krutaj kun maldika tavolo da tero kaj ne povis teni akvon. Tial plantaĵoj ne kreskis, se longe ne pluvus, aŭ ĉiuj ili estis forlavitaj, se torente pluvus.

En 1966, la potenca torento de la Granda Proletara Kultura Revolucio puŝis la batalon de la popolo de Panlong transformi la naturon al nova alta tajdo. Tiutempe, Li Deji revenis post vizito al Daĝaj-brigado en Ŝanhi-provinco kaj decidis gvidi la komunumanojn fari novan aranĝon de la montoj kaj akvoj de Panlong. Li diris al ĉiu renkontita: "Daĝaj estas bona ekzemplo lernenda

por ni! Ni plene streĉu niajn fortojn en batalo kontraŭ la naturo kaj post dek- aŭ ok-jara batalado ni certe aliigos la fizionomion de nia malriĉa valo!" Li Deji interkonsiliĝis kun la komunumanoj kaj kune decidis komenci la batalon per konstruado de ŝtupaj kampoj.

En frosta vintro, la malriĉkamparanoj kaj mal-superaj mezkamparanoj klarionis sian batalon de konstruado de ŝtupaj kampoj.

Kune kun la komunumanoj Li Deji portis ŝtonojn por konstrui baraĵojn kaj vektoportis teron por fari agrojn. Li iris al laboro frue kaj hejmenrevenis malfrue, eĉ ankaŭ en neĝblova vetero. Daŭre penlaborinte kun alta batalspirito ĝis la sekvinta printempo, ili ebenigis la montpintojn, plenigis kavaĵojn kaj formis vastajn parcelojn el terpecetoj, tiel ke la pli ol 400 muoj da agro sur la montdeklivoj fariĝis tavoloj kaj tavoloj da ebenaj ŝtupaj kampoj.

En la batalo de konstruado de ŝtupaj kampoj, Li Deji estis fame konata kiel "fera vekto". En vektoportado de tero, li portis ĉiam pli multe kaj kuris pli rapide ol la aliaj. Kaj dum la vintro kaj printempo li eluzis du vektojn kaj kelkajn parojn da korboj. Kiam oni demandis Li Deji, de kie li akiris tiel grandan forton, li respondis: "Studinte la artikolon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, pririgardinte la ŝanĝiĝojn de Daĝaj, rememorinte la suferojn en la malnova socio kaj ilin komparinte kun la feliĉoj en la nova socio, mi eksentas min plena de energio kaj kore ĝojas, eĉ se la penlaboro mallongigus mian vivon!"

En aŭtuno de 1968, tie senĉese torentis pluvego. Furioza diluvo disfalis dekkelkajn ŝtonbaraĵojn de la ŝtupaj kampoj.

"Kion fari?" kadroj de la produkta grupo demandis Li Deji.

de la Revoluciaj Amasoj

o kamarado Li Deji

“Kontraŭ tio ni havas nur unu rimedon, nome ‘batali!’” respondis Li Deji. “Prezidanto Maŭ diris: ‘La ĉinoj eĉ morton ne timas, ĉu ili povas timi malfacilon?’ La diluvo disfalis dekkelkajn ŝtonbaraĵojn, ĝi tamen neniam povos disfali la firman decidon de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por transformi la naturon! Kie ĝi detruis, tie ni rekonstruu!”

La vortoj de Li Deji varmigis la korojn de la aŭskultantoj. Sub lia gvido, la komunumanoj streĉe penlaboris dek tri sinsekvajn diurnojn manĝante kaj dormante en la konstruejo, kaj rekonstruis la disfalitajn ŝtonbaraĵojn kaj restarigis la sternitajn plantojn. En tiu aŭtuno, Vangjigoŭ akiris riĉan rikolton.

Post la riĉa rikolto, Li Deji refoje elmetis la proponon konstrui akvokonservejon.

En frua printempo de 1958, Li Deji gvidis la komunumanojn de Vangjigoŭ penlabori duonmonaton kaj finkonstrui la unuan malgrandan akvokonservejon. Dank’ al tio ili akiris abundan rikolton en somero. Sed kiam okazis aŭtuna montdiluvo, la akvokonservejo estis plenigita de leŭsoj alportitaj de la akvofluo. En la sekvinta jaro, Li Deji gvidis la komunumanojn rekonstrui la akvokonservejon. Iutage, kiam Li Deji fosas teron sur monto, subite disfalis tera krutaĵo, kaj li estis puŝfaligita en la valon kaj svenis. Dank’ al urĝa savo li sekuriĝis, sed liaj kruroj ŝveliĝis kaj estis tre malfacile por li fari paŝojn. Sed malgraŭ tio, li ankoraŭ persiste iris al la konstruejo ĉiutage kun lambastono.

La rekonstruita akvokonservejo ekfunkciis efike, irigaciante la ŝtupajn kampojn de Vangjigoŭ.

Sed en la jaro 1965, la akvokonservejo denove estis plenigita de leŭsoj alportitaj de diluvo.

Li Deji denove proponis konstrui akvokonservejon kaj ricevis aprobon de ĉiuj komunumanoj.

En novembro de 1968, komenciĝis la konstruado de la akvokonservejo. Portante vatitan litkovrilon sub la brako kaj keston da dinamito sur la ŝultro, Li Deji venis la unua al la konstruejo. Frosta vento sin ĵetis al li ŝutante neĝerojn, kaj li eksentis doloregon en la brusto. Li sin kurbigis forte premante sian bruston per ambaŭ manoj.

Lia ftizo graviĝis. Komunumanoj sincere admonis lin ripozi kelkajn tagojn.

Sin rektiginte Li Deji diris gaje svingante sian manon: “Kiel mi povus ripozi en tia laborplena tempo?”

La konstruado de la akvokonservejo urĝe bezonis brikojn, kaj oni devis vektporti ilin en nokto de vilaĝo 5 kilometrojn fora. Kaj por tion fari oni devis transiri monton kaj travadi riveron. Ĉiuj kiuj iris tiunokte estis fortaj junuloj escepte de Li Deji, kiu estis malsana maljunulo. Oni ne lasis lin iri, sed li insistis pri iro, kaj li vektportis brikojn same kiel la aliaj.

Sur la konstruejo, Li Deji ĉiam iris tien, kie estis peza laboro kaj rapidis tien, kie estis danĝero. En borado de mintruoj, li ĉiam aperis la unua pendante sur rokmuro ŝnurligite ĉe la talio; en plenigado de kavegoj li ofte staris ĉe plej danĝeraj lokoj; kaj ĉe eksplodigo de minoj, ĉiam estis li, kiu la lasta forlasis la danĝeran areon. Li Deji ofte diris: “Ni komunistoj devas nur iri antaŭ la amasoj, sed ne post ili!”

Li Deji ofte diris al la kadroj: “Ni kadroj estas servantoj de la popolo. Ni devas tutkore zorgi pri la popolamasoj kaj atenti pri problemoj en ilia vivo. Se ni tiel agos, do la vastaj amasoj certe subtenos nin kaj prenos la revolucion kiel sian vivon, prenos ĝin kiel sian senkomparan gloron kaj kondukos revolucion kune kun ni, strikte sekvante Prezidanton Maŭ.” Tiel li diris, kaj tiel li agis.

De multaj jaroj, ĉiufoje kiam longe pluvadis kaj furiozis montdiluvo, li ne povis endormiĝi, ne havis apetiton kaj ĉiam pensis, ĉu stalo de iu grupo likas, ĉu okazos io danĝera al kaverndomoj de iuj komunumanoj kaj detruigis iuj kamprandoj pro akvofluo. Kaj nokton kaj tagon, li faradis kontrolon kune kun la aliaj brigadaj kadroj, iris de monto al monto, de vilaĝo al vilaĝo, vadante en pluvo.

En iu somera vespero, ĉiam pli furiozis vento kaj pluvo. Por ekzameni la inundakvon de ĉiuj grupoj, Li Deji iradis tutan tagon. Apenaŭ reveninte al sia hejmo, subite li ekmemoris, ke fendigis la kaverndomo de malriĉkampano Guo Gaŭming sur la kontraŭa montdeklivo kaj pensis, ke eble okazos al ĝi akcidento en tia pluva torento. Li do sin turnis kaj iris al la deklivo. Lia maljuna edzino admonis lin icm ripozi hejme, sed li diris: "Ne! Kiam la amaso troviĝas en malfacilo, ni devas helpi ilin por ĝin venki." Malgraŭ la pluvego, li rapidis al la domo de Guo Gaŭming, translokgis lian familion kun tri membroj al alia loĝejo kaj tiel evitigis al ili la danĝeron.

Li Deji (la dua staranta de dekstre) batalas kune kun la amaso por haki monton kaj formi kampojn.



Li Deji vere estas tia homo, kiu zorgas nur pri la amasoj sed tute ne pri si mem. Li ofte diris: "En malfaciloj kompartiano devas zorgi pri la amasoj, zorgi pri la revolucio."

Sed Li Deji ne zorgis pri sia malsano kaj neniam menciis sian malsanon antaŭ aliaj. Nur kiam la brusto akre doloris al li, oni trovis, ke li kaŭras premegante sian bruston sur la femuroj. Li ofte forte ĉirkaŭligis sian bruston per larĝa ŝtofstrio, kaj luktis kontraŭ la malsano, por kvietigi la doloron per premado. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Panlong-brigado ĉiuj zorgis pri lia sano kaj ofte admonis lin ripozi kaj invitis kuracistojn por kuraci lin. Respondeca kamarado de la revolucia komitato de Lingbaŭ-gubernio fojrefoje proponis al li enhospitaliĝi. Sed Li Deji ĉiam diris: "Por ŝanĝi la fizionomion de Lankaŭ, kamarado Giaŭ Julu tutforte penlaboris malgraŭ sia grava malsano. Ja bagatela estas mia malsaneto! Kaj krome, nun estas tiel multaj farendaj laboroj, kiel mi povus forlasi! Mi konsideru pri tio en tempo sen laboro!" Li Deji estas tia homo, kiu ne lasas sin senfara, kaj li ĉiam obstine batalas per mirinda volo.

Antaŭtagmeze de iu vintra tago de 1968, Li Deji portadis fekaĵojn kune kun la komunumanoj. Kiam li revenis al la vilaĝo je tagmezo, subite li ekmemoris, ke la maljuna paŝtisto foriris pro io, kaj oni ne manĝigis la bovojn de la grupo dum la tuta antaŭtagmezo. Do, anstataŭ preni tagmanĝon, li pelis kune kun sia filino la gregon al la montdeklivo. Transirinte kelkajn montojn, li subite sentis malfacilecon en spirado kaj kapturniĝon. Li ne povis plu teni sin kaj falis svena teren. Informiĝinte pri tio, komunumanoj laborantaj proksime de li alrapidis kaj lin portis hejmen. Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj iris viziti lin kaj multaj diris kun larmoj: "Ja pro zorgoj kaj penlaborado por ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, maljuna Li tiel grave malsaniĝis. Ni nepre klopodu ĉiamaniere por resanigi lin!"

Informiĝinte pri tio, la revolucia komitato de Lingbaŭ-gubernio tuj sendis homojn eskorti Li Deji al Hi-an por kuraci. Post ekzameno en la hospitalo kuracistoj diris, ke li devas resti en hospitalo por kuracado. Tion aŭdinte, Li Deji tre maltrankviliĝis.

Li pensis: "Kiel mi povus trankvile resti en hospitalo por kuraci la malsanon, dum la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Panlong-brigado batalas tage kaj nokte?" Sekve li insiste postulis elhospitaliĝon. Li diris al la kuracistoj: "Mi suferas de kronika malsano. Estas sufiĉe, ke vi preskribu por mi medikamentojn kaj mi resaniĝos post iom da ripozo en la hejmo. Mi volas fari pli multan servon al la popolo kaj kontribui pli multe al la revolucio. Se nur mi vivos unu plian tagon, mi do portos pezan ŝarĝon por la revolucio je unu plia tago." Kaj la kuracisto neniel povis lin persvadi.

La trian tagon, Li Deji jam reveturis de Hi-an al Lingbaŭ.

Li multe pensis en la vagono. Li pensis pri la montoj kaj akvoj de Panlong, pri ĝiaj vilaĝoj kaj familioj; li pensis pri la suferplena pasinteco de Panlong, pri ĝia feliĉa hodiaŭo kaj la pli bela estonteco.

Kiam li descendis la trajnon, jam vesperiĝis. Li Deji aĉetis faskon da pomarbidoj kaj rapidis hejmen transgrimante montojn. Kiam li atingis Panlong, jam estis profunda nokto.

Kvankam Li Deji forlasis Panlong nur tri tagojn, tamen tiuj tri tagoj estis kvazaŭ tri jaroj por lia vivo. Ĉiu herbo kaj ĉiu arbo de Panlong ŝajnis por li pli intimaj.

Kiam li venis al la stalo kun la arbidoj sur la dorso, la bredisto estis preparanta nutraĵojn por la brutoj. Li pririgardis la brutojn kaj trovis, ke tiuj ŝajne pli grasiĝis ol antaŭ tri tagoj. Li demetis la arbidojn, iris al la apudaj ŝtupaj kampoj kaj trovis, ke iuj estis vektoportantaj fekaĵojn en la tritikajn kampojn. Li surgrimpis la kontraŭan montdeklivon kaj trovis, ke oni jam plantis fruktarbidojn sur ĝi, . . . Jam plene elkrepuskiĝis, kaj Li Deji denove gvidis la komunumanojn fari sturmon al la sovaĝaj montoj.



X-RADIA APARATO APLIKEBLA POR LOKO SENELEKTRA

Post serioza studo de la grava instrukcio de Prezidanto Maŭ pri higiena laboro, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la Fabriko de Fizikterapiaj Aparatoj de Tiangin multe altigis sian politikan kaj ideologian konscion. Ili organizis enketajn grupojn por profundigi en la vastan kamparon de ok provincoj en suda Ĉinio por peti opiniojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Post ripetataj provoj en pli ol unu jaro, lastatempe ili sukcesis elfari X-radian aparaton F-10 kaj petrolan generatoron QJF-06 malgrandajn kaj malpezajn. En senelektra loko, la du maŝinoj en kuna funkcio ebligas fari X-radian ekzamenon pri ostodifekto, brusto kaj membraj malsanoj de homo.

BONA SPECIO DE MAIZO BAJDAN-4

Firme irante la vojon kombiniĝi kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, en la Granda Proletara Kultura Revolucio sciencaj kaj teknikaj laborantoj de la Instituto pri Selektado kaj Plantado de la Ĉina Agronomia Akademio solvis la problemon pri selekta procedo en 3 jaroj, kio bezonis 7-8 jarojn en la pasinteco, kaj sukcese selektis bonan maizan specion de simpla hibridigo de mempolenado — maizon bajdan-4, per kio ili faris novan kontribuon por stimuli maizan produkton.

Bajdan-4 estas bona maiza specio akirita el simpla hibridigo de du sistemoj de mempolenado. En la printempo de 1969, ili sendis tiun novan bonan specion al kvin provincoj kaj pekina kamparo por fari modelan disvastigon, kaj akiris rimarkindan sukceson. Interalie la meznombra pomua produktkvanto de bajdan-4 prove kulturita de la agrikultura eksperimentejo de Zunji-regiono, Gujĝoŭ-provinco atingis ĉ. 500 kg., kiu estas 20-30% pli multa ol tiu de alispecaj maizoj kulturitaj de la eksperimentejo.

La ekzemplodona kulturado de ĝi en diversaj lokoj montris ke tiu maiza specio posedas la superecojn en rezisto kontraŭ malsanoj, sekeco kaj troabundo de akvo kaj en spikodonoj ĉe oportunaj partoj de la trunko.

Ŝaŭŝan-Ginggangŝan-a Ŝoseo Venke Malfermiĝis al Trafiko

LA ŝoseo inter Ŝaŭŝan — la hejmloko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Ginggangŝan — la unua revolucia bazloko en kamparo de nia lando fondita persone de Prezidanto Maŭ estas finkonstruita lastatempe kaj inaŭgurita al trafiko je la 11-a de novembro, 1969.

La ŝoseo kun totala longeco de 465 kilometroj iras tra Anjuan, la lulilo de la laborista revolucia movado de nia lando persone kreita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vilaĝo Sanvan, kie Prezidanto Maŭ siatempe reorganizis la trupojn de la Aŭtunrikolta Ribelo, post kiam la trupoj atingis sub lia gvido Jonghin-gubernion de Gianghi-provinco, Guĉeng, kie okazis la Guĉeng-kunveno persone kunvokita kaj prezidita de Prezidanto Maŭ en Ninggang-gubernio, tra Hingguo, Maŭping, Huangjanggie, Bamianŝan, Ŝuangmaŝi, Daging en la montaro Ginggangŝan, kie siatempe loĝis Prezidanto Maŭ, kaj aliaj lokoj. Laŭ la ŝoseo de Ŝaŭŝan tra Anjuan ĝis Ginggangŝan, ĉiuj lokoj disradias la brilon de Maŭzedongpenso. Vizitante tiujn memorindajn lokojn de revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj povas plibone kaj pliprofunde kompreni kaj studi la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ kaj ricevi tre grandan edukadon.

La 11-an kaj 12-an de novembro okazis inaŭguraj solenoj en Ginggangŝan kaj Ŝaŭŝan respektive. Kiam aŭtobusoj ekiris, multaj ruĝaj flagoj flirtis kaj hurado ektondris en la montaro Ginggangŝan

kaj Ŝaŭŝan-valo. Kun ruĝaj trezoraj libretoj en la manoj, la heroaj gefiloj de Ginggangŝan kaj Ŝaŭŝan, tamtamante kaj tamburante, kriadis entuziasme: “Vivu, vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”

La konstruo de la ŝoseo inter Ŝaŭŝan kaj Ginggangŝan estis la urĝa deziro de la vastaj revoluciaj amasoj. Por konstrui tiun ŝoseon, la revoluciaj komitatoj de la provincoj Hunan kaj Gianghi kaj respondeculoj de koncernaj institucioj multfoje pristudis la aferon kaj persone venis sur la konstruejon por labori kiel komandantoj kaj ankaŭ kiel batalantoj. Kun profunda proletara sento de senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kun plej altaj politika entuziasmo kaj revolucia laborenergio, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA konstruis la ŝoseon. En la parto de la ŝoseo de Ĝuĝoŭ ĝis Liling, Hunan-provinco, estas krutaj deklivoj, akutaj kurboj kaj mallarĝaj lokoj. La revoluciaj laboristoj de la Ĝuĝoŭ-a Sekcio de Ŝosea Riparado kaj Protektado kiu respondecis pri urĝa riparado de la ŝoseo, foje kaj refoje studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* dum laborado kaj disvolvis sian pli grandan revolucionan energion. Kun la revolucia spirito “**timi nek malfacilojn nek morton**” ili en tre mallonga tempo sukcese plenumis la malfacilajn taskojn mildigi la krutajn deklivojn kaj akutajn vojkurbojn.

Argilaj Statuetoj el Hujŝan

EN serena aŭtuno, ni venis al la produktoj de hujŝanaj argilstatuetoj, la urbeto Hujŝan de Vuhi, kaj vizitis la plastikan fabrikan Dongfanghong, kiu produktas argilajn statuetojn.

Hujŝan, kiel unu el la ĉefaj produktoj de argilaj statuetoj en nia lando, laŭdire, jam havas historion de pli ol 400 jaroj.

En la nomita fabriko, ni pririgardis ĝian montran ĉambron de produktaĵoj, kaj tie ni vidis en vitrinoj multajn diverskolorajn statuetojn, kiuj estas vivsimilaj kaj allogas la okulojn. Inter ili iuj prezentas heroajn personojn el la revoluciaj modernaj pekinoperoj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang*, *Surprizatako kontraŭ la Blank-tigra Regimento* kaj *La Haveno* kaj la revoluciaj modernaj baledoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino*, iuj prezentas la brilajn figurojn de Oŭjang Haj, Caj Jonghiang, Giaŭ Julu kaj aliaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj aliaj spegulas heroojn el *Milicaninoj de la Suda Vjetnamio*, *Militaj Tamburoj en Afriko* kaj aliajn. Plejparto el ili estas kreita de tiu fabriko en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

En la laborejo por modli argilajn homfigurojn, du lertaj laboristinoj tiris al si nian atenton. Ili kolorigis ĉe stabloj la jam modlitajn figurojn de la heroo Jang Zijong el la revolucia moderna pekinopero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*. Ili unue ŝmiris la figurojn per blanka farbo kiel fona koloro kaj poste kolorigis iliajn vestojn, ĉapojn kaj ŝuojn per diversaj farboj. Fine ili donis al ili fizionomion,

nome: pentri ilian vizaĝon. Ili tre atentis pri tiu laboro kaj ĉiuj strekoj estas tre zorgeme faritaj. Kiam la vizaĝo estis pentrita, la figuro jam tre similas al vera homo, sed al ĝi ankoraŭ mankis animo. Tiam iu laboristino kun granda absorbiteco prenis sian penikon, iom trempis ĝin en nigran inkon kaj poste tuŝetis per ĝi la okulglobojn de la figuro. Mirinde, per tiuj tuŝetoj la figuro de la sagaca kaj brava Jang Zijong tuj ricevis vivon, kaj oni kvazaŭ vidus en ĝi la heroon galopantan surĉevale tra neĝan arbaron al batalo kontraŭ malamiko.

Kvankam la hujŝanaj argilaj statuetoj havas sian longan historion kaj respegulas la saĝon kaj kreivon de la laboranta popolo de nia lando, tamen en la longa periodo ĝi prezentis nur imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn. Antaŭ la granda kultura revolucio, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko, laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj**”, prove faris argilajn statuetojn, kiuj figuras personojn de la nova epoko, kaj ricevis varman bonvenigon de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed, la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki malebligis al tiu fabriko efektivigon de revoluciigo en argila skulptarto, senbride antaŭenpuŝante la kontraŭrevolucion reviziisman artan linion “emfazi la antikvajn pli ol la nunajn, alte taksi fremdaĵojn kaj imiti antikvaĵojn” pere de



Laboristoj de la Plastica Fabriko Dongfanghong faras modernajn argilajn statuetojn.

siaj agentoj en la metiartoj.

Depost la Granda Proletara Kultura Revolucio aktive respondante al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj alte tenante la grandan standardon prave ribeli kontraŭ la reakciularo, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko faris fortan atakon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj. Poste, ili disvolvis grandan debaton pri la problemo "kiun vojon devas iri la metiarto", tio multe altigis ilian konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. La laboristoj diris: Kiun klason prikanti kaj heroojn de kiu klaso modli estas problemo radika kaj principa. Klopodi por modli heroojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas fundamenta tasko de ni argilstatuaj skulptistoj.



La Plej Grava Afero

MATENON de iu dimanĉo, la heroa batalanto de ĈPLA Li Juanfu estis absorbate studanta *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* sub la brila suno. En tiu tempo kelkaj najbaraj knaboj gaje kuris al li. Atinginte antaŭ kamarado Li Juanfu, ili laŭte ekkriis: "Onklo Li, rakontu al ni ion!"

"Bone, mi rakontos al vi," diris kamarado Li Juanfu ame rigardante ilin, "sed, antaŭ tio, vi devas respondi al mi: Kion plej gravan vi pretas fari hodiaŭ?"

Aŭskultinte la demandon de kamarado Li Juanfu, la knaboj konkure ekparolis. Iu diris ke li falĉos herbojn por bovoj de la produktgrupo. Alia diris ke li kolektos triitikajn spikojn por la grupo... Fine venis la vico al Bajva. Iomete pensinte li prenis manon de kamarado Li Juanfu kaj diris: "Onklo Li, vi antaŭe diris, ke la plej grava afero estas studi verkojn de Prezidanto Maŭ, ĉu ne?"

"Jes, tio ĉi ja estas la plej grava afero." Karesante la kapon de

Por modli heroojn figurojn el la revoluciaj modelaj teatraĵoj, la laboristoj kaj oficistoj, unuflanke, adoptis tradician arton kaj, aliflanke, sendis al teatroj por tie atente studi la politikan enhavon kaj artajn karakterizaĵojn de la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj samtempe ili senĉese iris profunde en fabrikojn, kamparojn kaj trupojn por sperti la vivon kaj lerni la bonajn kvalitojn de la laboranta popolo. Post diligentaj studo kaj praktiko, ili finfine kreis aron da argilaj statuetoj, kiuj jam atingis certan nivelon en politika enhavo kaj arta esprimo. Estas laŭdinde ke inter tiuj estas multaj elstaraj artaĵoj kreitaj de gejunuloj, kiuj estas plenaj de vigleco. Nun tiuj gejunuloj faras sian kontribuon en respegulado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj de la afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado per argila skulptarto!

Bajva kaj sidigante la aliajn, kamarado Li Juanfu ekrakontis pri kamarado Men He kiu diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ.

"Kamarado Men He estis bona kadro de Prezidanto Maŭ. Li ĉiutage studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj rigardis tion kiel la plej gravan aferon. Kiom ajn okupata estis li, li ĉiam persistis en la studo. Profundan nokton de frosta vintro, li legis sub la lampo. Dum oficvojaĝo li lernis en balanciĝanta aŭto. Pro tio, ke li vive studis kaj vive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ, li povis tuj elpaŝi brave por savi aliajn oferante sian vivon, kiam popolamasoj estis minacataj de danĝero. Iufoje, en agrikulturejo, kiam li kune kun amasoj plenigis kontraŭhajlan raketon per dinamito en ĝia provfarado, subite okazis neatendita eksplodo. En tiu momento kamarado Men He senhezite sin ĵetis al la dinamito kaj savis la ĉelokajn 27 klasajn fratojn per sia vivo."

Ĝis ĉi tie rakontinte k-do Li Juanfu serioze diris al la knaboj: "Vi ĉiuj kreskas en la feliĉo, vi nepre

ne forgesu suferojn de gepatroj en la malnova socio! Vi ĉiuj devas, kiel k-do Men He, ne forgesi de infanaĝo la klasan suferon kaj ĉiutage lerni verkojn de Prezidanto Maŭ por fariĝi ruĝaj daŭrigantoj!"

Rondigante siajn okulojn, la knaboj silente aŭskultis kaj larmoj ŝprucis el ĉies okuloj pro emociiĝo. Kun seriozeco rigardante k-don Li Juanfu ili ĉiuj diris:

"Ni nepre, same kiel k-do Men He kaj ankaŭ onklo Li, neniam forgesos tiun ĉi plej gravan aferon kaj neniam forgesos studi verkojn de Prezidanto Maŭ, **diligente lernos kaj progresos kun ĉiu tago** kaj fariĝos bonaj knaboj de Prezidanto Maŭ!"

K-do Li Juanfu, ĝoje rigardante la knabojn, diris: "Amiketoj, nun ni kune faru tiun ĉi plej gravan aferon, ĉu bone?"

"Bone!" samvoĉe respondis la knaboj.



K-do Li Juanfu malfermis la artikolon "Servu al la Popolo" en la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj eklegis kune kun la knaboj.

Nia Aera Trupo Faligis Altan Rekognoskan Aeroplanon de Usona Imperiismo



La 28-an de oktobro, 1969, iu aera trupo de la heroa Ĉina Popola Liberiga Armeo, en la centro-suda Ĉinio, faligis unu senpilotan altan militan rekognoskan aeroplanon de la usona imperiismo. Tio estas venko de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en plenumo de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ "al-tigi la singardemon, defendi la patrolandon". Se la usona imperiismo kaj social-imperiismo aŭdacos invadi nian landon, ni do firme ekstermos ilin ĝisfunde kaj komplete.

Antaŭ la faligita aeroplano de la malamiko, niaj armeanoj kaj popolanoj indigne kondamnas krimojn de la usona imperiismo en agreso kontraŭ nia lando.



La faligita aeroplano de la usona imperiismo surhavas fabrikmarkon kun jenaj vortoj: Fabrikita de Ryan Aeronautika Kompanio de Sandiego, Kalifornio, Usono, je la 3-a de marto 1969.

Nova Paŝo de Koluzio inter Sovetunio kaj Japanio

EN la 5-a de novembro de 1969, la sovetunia registaro kaj la reaktia Sato-registaro oficiale subskribis en Moskvo interkonsenton pri aera transporto, kiu difinis ke japanaj aviadiloj povas libere flugi tra Siberio. Tio estas nova paŝo farita de la sovetunia registaro por intensigi sian koluzion kun la japana reaktiularo.

En sia informaĵo de la 5-a de novembro Telegrafa Agentejo de Sovetunio diris: "Aviadkompanio 'Japan-aeroplano' komencos sendependajn flugojn laŭ linioj Tokio — Moskvo — Parizo kaj Tokio — Moskvo — Londono je la 28-a de marto de la venonta jaro."

Laŭ la informo de la japana gazetaro, la sovetuni-japana traktado pri aera transporto komenciĝis en Moskvo je la 28-a de oktobro, interkonsento estis atingita en la vespero de la 4-a de novembro kaj oficiale subskribita je la posttagmezo de la 5-a. La japana gazetaro diris, ke la aviadlinio inter Tokio kaj Moskvo jam estis malfermita antaŭ kelkaj jaroj, tamen tiam Sovetunio ne konsentis malfermi aeran spacon super Siberio, sed nur aprobis "kunan operacion", t. e. plenumi aervojaĝon inter Moskvo kaj Tokio tra Siberio per luigitaj sovetuniaj aviadiloj manipolataj de sovetuniaj pilotoj. En la komenco de 1969, Japanio elmetis al Sovetunio postulon pri "sendependaj flugoj", t. e. Japanio uzas siajn aviadilojn manipolatajn de japanoj sendepende flugi super Sovetunio. TASU diris, ke en januaro de 1969 kiam la sovetunia ministro de civila aviado

vizitis Japanion, "principa interkonsento" pri flugado de japanaj aviadiloj al Eŭropo tra Moskvo jam estis atingita.

Post la venko de la Oktobra Socialisma Revolucio en 1917, sub la gvido de Lenin kaj Stalin, por defendi la sekurecon de la ŝtato kaj naciajn interesojn la sovetunia registaro neniam permesis fremdlandajn aviadilojn libere flugi tra Siberio. La japanaj aviadiloj flugis super la sovetunia teritorio nur en tiu tempo, kiam la japana imperiismo partoprenis la armitan intervenon de 14 landoj kaj ekspedis siajn trupojn al Siberio. Japana burĝara ĵurnalo diris, ke la sendependa flugado de japanaj aviadiloj super Siberio estas "epokfara evento en la monda historio de aviado".

Ĉiuj scias, ke la reaktia Sato-registaro, ĉiam sekvante la usonan imperiismon, faras ekspansion kaj rabadon eksterlande, freneze kondukas arme-ekspansion kaj militpreparon kaj intensigas revivigi la japanan militarismon enlande, intencante starigi sian hegemonian pozicion en Azio. Tamen, ĝuste en tiu tempo la sovetunia registaro subskribis la interkonsenton pri aera transporto kun la japana reaktiularo, kaj delegacioj de ambaŭ landoj faris intervizadojn en varma enamiĝo. En tio, oni povas nemalfacile vidi, ke falsaj estas diroj de la sovetunia registaro pri opono kontraŭ la usona imperiismo kaj diverslandaj reaktiularoj, sed vera estas ĝia aktiva koluzio kun la du lastaj. Ĉu oni ankoraŭ povus fari alian klarigon krom tio?

Bruligi la Incendion de Armita

Batalo tra la Tuta Hindio

ĈARU MAZUMDAR

Gvidanto de la Komunista Partio de Hindio (Marksism-Leninisma)

EN sia oktobra numero de 1969 la hinda gazeto *Liberigo* publikigis artikolon de Ĉaru Mazumdar, gvidanto de la Komunista Partio de Hindio (Marksism-Leninisma), en kiu la aŭtoro alvokas la hindan popolon plenforte disvolvi revolucionan armitan batalon kaj ekstermi agresan militon kontraŭ Ĉinio intrige planatan de la usona imperiismo kaj social-imperiismo.

La artikolo diras: “La usona imperiismo kaj sovetunia social-imperiismo helpate de ĉiuj reakciularoj de la mondo inkluzive de la reakcia reganta kliko de Hindio kaj la japanaj militaristoj, intensigis sian preparadon por lanĉi agresan militon kontraŭ Ĉinio, la lando kie iras la Granda Proletara Kultura Revolucio.”

Ĝi diras: “Ĉinio, la centro de la monda revolucio, fariĝis post la venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio tre potenca bastiono kontraŭ la monda reakciularo. La revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj rigardas la grandan Ĉinion kiel potencon bazon de sia propra revolucio. Por ili la ekzisto de la potenca socialisma Ĉinio estas la garantio por gajni venkon en iliaj propraj revolucioj. Ĉinio estas, hodiaŭ, la fonto de inspirado por la revoluciaj bataloj tra la mondo. Jen kial la usona imperiismo kaj sovetunia social-imperiismo, ambaŭ alfrontante neeviteblan pereon, freneze kovas intrigojn por ataki Ĉinion. Tio estas ĉar, kiel Prezidanto Maŭ instruas nin: ‘...ĉiuj pereontaj reakciaj fortoj ĉiam faras lastan baraktadon kontraŭ la revoluciaj fortoj.’”

“La usona imperiismo kaj sovetunia social-imperiismo estas nun senespere ĉirkaŭsieĝataj en ĉiuj flankoj rezulte de la ondantaj bataloj de la popoloj en iliaj propraj landoj kaj en aliaj landoj de la mondo. Jen kial ili freneze intrigas por lanĉi agresan militon kontraŭ Ĉinio. Se ili fine lanĉos

agresan militon kontraŭ Ĉinio, la nebarebla grandega rezistado de la sepcentmiliono ĉina popolo puŝos pli rapide ol antaŭe la imperiismajn kaj social-imperiismajn agresantojn al ilia tombo. Tio estos granda momentumo kaj stimulado por la revolucia batalo en ĉiuj landoj de la mondo kaj sekve estigos mondiskalan stepfajron kiu ĝis cindro bruligos ne nur la usonan imperiismon kaj sovetunian social-imperiismon sed ankaŭ la tutan imperiisman ekspluatan sistemon, kaj rezulte de tio fine aperos mondo sen ekspluatado.”

La artikolo montras, ke se la imperiismaj monstroj insistas pri tia milito por venigi al si propran pereon, do la revoluciaj popoloj de la mondo nepre donos al ili solidan baton.

Ĝi ankaŭ montras: “Se la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj social-imperiistoj sukcesus komenci agresan militon kontraŭ Ĉinio kiun ili nun freneze preparas, do Hindio, komplotanto de la usona imperiismo kaj sovetunia social-imperiismo, estos agresa lando. Tio ĉi faros la batalon de la hindaj revoluciuloj multe pli malfacila kaj ili devos surŝultrigi grandan devon... Ni povos venke plenumi tiujn taskojn nur per disvastigo de la klasa batalo, tio estas, la flamoj de agrara revolucio, al ĉiu *pradesh*, al la vasta kamparo kaj al la tuta Hindio.”

La artikolo alvokas bruligi la tutan Hindion per la fajreroj de la revolucia armita batalo. Ĝi diras: “Nenia agresa armeo aŭdacos ataki alian landon kun Hindio — lando kun kvincentmiliono popolo, kiel sia postfronto, kiam la flamoj de revolucia armita batalo komencas arde furiozi tra la tuta lando. La grandega stepfajro de revolucia armita batalo en Hindio skuos, en unu flanko, la tutan mondan imperiisman sistemon ĝis ĝia fundamento; dum en alia flanko, ĝi ege kreskigos la memfidon de la batalantaj fortoj en ĉiuj landoj, farante ilin



Kun respekta sento hindaj laboruloj rigardas portretojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

nesubpremeblaj. Plue, la kaŭzitaj de tio krizoj kaj paniko de imperiismo provizos novajn forton kaj kuraĝigon al la kelkcent milionoj da ekspluatataj popoloj en la imperiismaj landoj por doni tre fortajn batojn al imperiismo. La influo de la giganta forto kiun formas la unuiĝo de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo faros eĉ la postgintajn amasojn certaj pri la venko. La idealo kiun du junaj revoluciistoj elmetis antaŭ cent jaroj kaj la granda alvoko kiun ili donis en *La Manifesto de la Komunista Partio — 'Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!'* — fine realiĝos. La popoloj de la tuta mondo, inspirate de nova spirito de internaciismo, unuiĝos kun la granda Ĉinio, kaj, gvidate de Prezidanto Maŭ, transformos en realon la idealon kiun la homaro revis por miloj da jaroj, kaj la mondo sen ekspluatado estos starigita.”

La artikolo ankaŭ diras: “Ni, la revoluciuloj de Hindio, devas kompreni la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ: **'batali por ĉiu sekundo'** por povi ludi grandan rolon en efektivigo de la plej sankta tasko de la popoloj de la mondo. Ni scias, ke la popolo de Hindio neniam hezitis en oferfarado en sia batalo kontraŭ ekspluatado kaj por la liberigo de la lando.... La popolo de mia lando neniam

timas oferi sian vivon por la granda afero. La hinda kamparanaro, kiu donis sennombrajn martirojn, disvastigos al la vilaĝoj de Hindio la mesaĝon de la plej granda kaj la plej sankta tasko alfrontata de la popoloj de la mondo, neŝanceble marŝos antaŭen sur la scenejon de historio kaj per faktoj pruvos, ke ili estas kreantoj de historio. Estas ĝuste ili, kiuj, gvidate de la laborista klaso, frakasos la klasajn malamikojn, disrompos la ekzistantan ŝtatan maŝinon de subpremantoj kaj entombigos la imperiismajn militinstigantojn sur la tero de Hindio.”

La artikolo diras: “Membroj kaj simpatiantoj de la Komunista Partio de Hindio (Marksism-Leninisma) — vi, jam volonte preninte sur vin la taskon liberigi Hindion, devas inspiri la laboristan klason, konduki la agraran revolucion en la kamparo ĝis venko, disvastigi la flamojn de armita batalo tra la tuta Hindio, fondi revolucionan popolan armeon pere de organizado de kamparana gerila milito, firmigi kamparajn liberigitajn regionojn por gajni venkon en la revolucio, liberigi Hindion kaj transformi ĝin en popolan demokratian ŝtaton, kaj starigi Hindion sen ekspluatado pere de efektivigo de socialismo. Vi havas neflekseblan kuraĝon por



Okc-germana Leganto J.H. Skribis:

Ĉiuj artikoloj de via gazeto min treege interesigas, ĉar mi konas la grandan pasintecon de via popolo, la suferojn de ekspluato fare de kapitalistaj potencoj kaj la kruelajn militojn de la generaloj. Mi ĝojas, ke vi nun havas grandan gvidanton, kiu ne nur garantias la pacon en via lando, sed ankaŭ la socian kaj kulturan evoluon de via popolo.

Mi gratulas vin, ke vi uzas Esperanton por informi nin pri la situacio en via lando.

Finnlanda Leganto R.V. Skribis:

Mi ĝojas pro tio, ke via granda proletara kultura revolucio atingis plenan venkon, kaj mi gratulas al vi pro tio. Kaj mi gratulas vin pro tio, ke vi venkis la grandan renegaton Liu Ŝaŭki kaj lian nigran bandon.

Verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong estas neelĉerpebla fonto por revoluciuloj de la tuta mondo, kiu donas saĝon kaj forton por revolucia batalo. Sub la penso de Maŭ Zedong la popolo de Ĉinio marŝas antaŭen al venko per grandegaj paŝoj!

Samtempe la usona imperiismo agonie baraktas sur la batalkampoj de Vjetnamio, kaj sovetunia reviziisma renegata kliko komplotas kun la usona imperiismo por sieĝi Ĉinion. Sed mi kredas, ke la popolo de Ĉinio sub la saĝa gvido de kamaradoj Maŭ Zedong kaj Lin Biaŭ certe ekstermos la malpurajn intrigojn de rabistoj!

Mi deziras al vi plej bonan prosperon kaj potenciĝon.

Okc-germana Leganto K. N. Skribis:

Kiel unu el la plej grandaj verkoj de la ĉina popolo mi taksas la grandan Nankinan Pontegon. Laŭ la starpunkto pri konstruopobleco de ia kolonia popolo, nekredebla, oni povas diri, estas tiu ĉi giganta 7 km. longa, relpara fervojo finkonstruita super la riverego.

.....

Sed ankaŭ moderna nitrosterka fabriko sendube helpas pligrandigi kvante kaj kvalite la rikolton de diversaj grenaj produktoj.

.....

La nova ekonomia sistemo, sin bazante sur la scienca fundamento de nia granda instruisto Maŭ, donas garantion, ke la 700-miliona popolo de Ĉinio daŭrigas sian revolucion vojon kaj atingos venkon post venko. Mi persone estas certa, ke nur industria kaj ekonomia progresoj sur la tero aplikataj por la bono de la homaro gvidos la popolojn antaŭen al bonfarto.

Ĉiu nova numero estas vera trezoro. Mi ne konas duan ilustritan Esperantan monatan gazeton, kiu prezentas sin en tiu bonega formo kiel *El Popola Ĉinio*. Vi vere donas per la laboro ekzemplon por la monda Esperantistaro.

Itala Leganto E.M. Skribis:

Kiam mi unuafoje abonis EPĈ, mi skribis al vi leteron. En ĝi mi diris, ke ju pli oni revoluciigas EPĈ des pli mi ĝin ŝatas. Fakte, nun mi vidas ke EPĈ iĝis grava lernilo pri revoluciaj pensoj... Mi diras kaj esperas ke la kultura revolucio kontinue profundiĝu kaj multe disvastiĝu.

Finnlanda Leganto O. B. Skribis:

Fakte ĉiujn artikolojn mi legis kun grandega ĝuo. Viaj rubrikoj "Tra la Mondo" kaj "Internacia Revuo" estas interesaj, ĉar ili pravas la neeviteblan malvenkon de kapitalismo, reviziismo, imperiismo kaj koloniismo. Tion glореge faras ankaŭ la elstaraj tradukoj ekz. de artikoloj de ĉinaj gazetoj. La lingva nivelo de nia amata EPĈ estas grandioza. Estas ĝuego ĝin legi. Viaj kolorbildoj estas ĉiam sukcesaj. Mi volas menci tiujn en la numeroj 3, 5 kaj 6. Mi esprimas ankaŭ mian gratulon pro la bonege aspekta "Nova Metiarto".

Dankon al vi pro la elstara esperanto-gazeto *El Popola Ĉinio*, kiu estas efika interligilo de la esperantistoj-revoluciuloj!

gajni venkon ne timante vivoferon, ĉar vi daŭrigas la aferon por kiu sennombraj martiroj oferis sian vivon.

"Hodiaŭ, via batalo kombiniĝis kun la idealo kiun la homaro revis kaj penis realigi por miloj da jaroj. Hodiaŭ, via batalo estas ne nur la nacia batalo de Hindio, vi estas trupo en la frontaj vicoj de homaro en ĝia antaŭenmarŝado. Tia kombiniĝo de la nacia tasko kun la internacia tasko eble estis

neniam vidita antaŭe en la historio de la mondo. La revolucia batalo de la mondo gvidata de Prezidanto Maŭ jam atingis etapon de granda kunfluo. Ni estas partoprenantoj kaj kunbatalantoj en tiu ĉi granda batalo. Tial, ni ne povas toleri perdi eĉ unu momenton. Klopodu per tuta forto kaj marŝu antaŭen. La venko certe apartenos al ni. Liberigota Hindio en la liberigota mondo estas iom post iom vidiĝanta ĉe la horizonto. Kamaradoj, ni marŝu antaŭen por bonvenigi tiun grandan tagon."

人人¹ 爱 读 “老 三 篇”²

Rénrén Ài Dú Lǎo Sān Piān

(Ĉiuj ami legi maljuna tri ...)

Ĉiuj Amas Legi la “Tri Popularajn Artikolojn”

在 中国, 人人 都 经常 学习
Zài Zhōngguó, rénren dōu jīngcháng xuéxí
(en Ĉinio ĉiuj senescepte ofte studi

En Ĉinio ĉiuj senescepte studas ofte la verkojn de Prezidanto Maŭ “tri popu-

毛 主席 的 著作 “老 三 篇”。 这 三 篇
Máo zhǔxí de zhùzuò “lǎo sān piān”. Zhè sān piān
Maŭ prezidanto -a verko maljuna tri ... ĉi-tiu tri ...
larajn artikolojn”.

文章 是: “为 人民 服务”、 “纪念 白求恩”
wénzhāng shì: “Wèi Rénmín Fúwù”, “Jìniàn Báiqiú’ēn”
artikolo esti por popolo servi memori Bethune

koloj estas “Servu al la Popolo”, “Memore al Norman Bethune” kaj “Montotranslokigo

和 “愚公 移 山”。

hé “Yúgōng Yí Shān”
kaj malsaĝa-avo translokigi monto)

Fare de Malsaĝa Avo”.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografiaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas Esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. 人人: 人 signifas “homo”. Ĝia duobligo —人人— signifas “ĉiuj homoj”. Tia uzado estas ofte renkontebla en la ĉina lingvo, ekzemple, 天 tiān signifas “tago”, kaj 天天 signifas “ĉiuj tagoj”.

2. 老三篇: 老 signifas “maljuna”. Ĉi tie ĝi estas uzata en la senco “ofte (studata)”. Ĉar la tri artikoloj estas ofte studataj, do estas tradukite “popularaj”. 三 estas baza numeralo. 篇 estas nomo de unuo por artikoloj. En la ĉina lingvo, kiam oni parolas pri nombro de iu objekto, oni ĝenerale aldonas unuonomon post la nombro, ekzemple: 三篇文章. Al malsama objekto oni aldonas malsaman unuonomon. Sekve, oni povas el la unuonomo kompreni pri kio temas. Pro tio iafaje la nomo de objekto povas esti forlasita, ekzemple ĉe 老三篇, ĉe kiu la vorto artikolo 文章 estas forlasita.

NOVAJ Batalatingoj de la Armeo kaj popolo de Suda Vjetnamio

De novembro de 1969, la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio multfoje lanĉis atakojn kontraŭ la usonaj kaj pupaj trupoj kaj akiris novajn atingojn en la bataloj.

Tiuj atakoj estis faritaj kontraŭ apogpunktoj de la malamikoj en Quang Tri, Gia Lai, Dac Lac, Binh Dinh, Quang Nam, My Tho, Quang Duc, Tay Ninh, Bien Hoa, Quang Ngai, Tay Nguyen, la delto de Mekong-rivero k. a. En tiuj bataloj, la plej elstaraj atingoj estis akiritaj de PLAF en Tay Nguyen, la delto de Mekong-rivero kaj Rach Gia. En 8 tagoj PLAF de Quang Duc ekstermis sume 1,269 malamikojn, inkluzive du batalionojn de la pupaj ĉeffortoj ŝirmitajn de usona artilerio kaj komandatajn de usonaj "konsilistoj".



PLAF de Rach Gia surprizatakis unu brigadan komandejon de la pupa marinfanterio en Dong Hung de la distrikto An Bien kaj multajn malamikajn garnizonojn kaj komplete ekstermis unu brigadan komandejon, unu batalionan komandejon, unu komandan postenon de artileria pozicio kaj kvar rotojn de la pupa armeo.

VENKOJ DE TPLA EN Bataloj kontraŭ "Ĉirkaŭekstermo"

La Tajlanda Popola Liberiga Armeo batalanta en Phatalung de suda Tajlando ekstermis ĉ. 20 reakciajn armitajn policanojn de la Thanom-a naciperfida kliko en siaj bataloj kontraŭ "ĉirkaŭekstermo" de la malamiko dum la unua duonmonato de novembro de 1969.

En la 28-a de oktobro la Tajlandaj Popolaj Armitaj Fortoj en la regiono de Kuan Kanoon de Phatalung brave atakis surprize la "Specialan Polican Taĉmenton" de la Usona-Thanoma kliko, ekstermis 8 malamikojn kaj militakiris kvar radiotranssendilojn kaj nombbron da pafiloj.

VENKOJ DE LPAF EN sinsekvaj bataloj

De la komenco de novembro de 1969 la Laosaj Patriotaj Armitaj Fortoj akiris novajn venkojn en siaj sinsekvaj bataloj al la malamikoj en diversaj lokoj.

La patriotaj armitaj fortoj en la provinco Xieng Khoang faris plurajn atakojn kontraŭ la malamikaj trupoj en la regiono de Muongsui, la ebenejo de Jars, la ĉirkaŭaĵo de la urbo Xieng Khoang kaj Muongngan, kaj ekstermis pli ol 140 malamikojn.

Inter la 1-a kaj 4-a de novembro la patriotaj armitaj fortoj en la provinco Luang Prabang mortigis kaj vundis pli ol 100 malamikojn en la regiono de Bak Suong kaj la distrikto Xieng Ngan kaj militakiris grandajn kvantojn da armiloj kaj aliaj militaj ekipaĵoj.

En Savannakhet-provinco, la patriotaj armitaj fortoj forte atakis surprize kaj detruis en la 5-a de novembro la stabejon de la 202-a bataliono de la dekstrulaj trupoj, mortigis 60 kaj militkaptis 3 malamikojn kaj militakiris nombbron da armiloj kaj aliaj militaj materialoj.

La Laosaj Patriotaj Armitaj Fortoj nun persekutas la malamikojn por daŭre plivastigi la venkon.

Nguyen Tien Dung, Sop 8-Truong
cap 111 A, Yen-bai, Vjetnamio

Juna laboristo Nguyen Van Long,
57, str. van Huong-Hang bot,
Hanojo, Vjetnamio

Lidova Knihovna, Esperanto-klubo,
Str. ĉs. Armady 704/42, urbo Mo-
drany, distr. Praha-Zapad. Ĉeĥos-
lovakio

Nova esperantisto Josef Lanar,
Sokolska ul. 18, Praha-11, Ĉeĥos-
lovakio dez. kor. kun amikoj de la
tuta mondo.

14-jara esperantisto Stowomir Siejo,
Vroclav 2, ul. Pomarska 15/17m.
5, Pollando, dez. kor. kun geknaboj
de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

27-jara esperantisto Avo Suur-
mets, Str. Lomonosov 9, Tallinn,
Estonio, USSR, dez. kor. kun espe-
rantistoj de Britio, Svedio, Norvegio,
Afriko kaj Latinameriko

27-jara teknika desegnistino Brigitte
Kunert, 88 Zittau, Dr. Friedricha-
Strasse 26, DDR, dez. kor. Ŝi intere-
siĝas pri sporto, populara muziko
kaj bildkartoj.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (139) 1970


Ĉefa Enhavo

- Heroojn Verajn Oni Trovas Tamen Nur en la Tempo Nuna
En Klopodado Modli la Brilajn Figurojn de Herooj de la
Proletaro
- Sagaca Kapto de la Tigra Monto
- Novaj Atingoj en la Geologia Afero de Ĉinio
- Nia Lando Refoje Akiris Riĉrikolton de Agrikulturo
- Liugi-komunumo Unuapaŝe Efektivigis Mekanikigon
- Elektrejoj Dislokiĝas Dense en Nova Montregiono
- Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj Bonvena al Kamparanoj
- Bona Kondukanto de la Revoluciaj Amasoj
- Ŝauŝan-Ginggangŝan-a Ŝoseo Venke Malfermiĝis al Trafiko
- Argilaj Statuetoj el Hujŝan
- Nova Paŝo de Koluzio inter Sovetunio kaj Japanio
- Bruligi la Incendion de Armita Batalo tra la Tuta Hindio

Sur la kovriloj:

El la tria sceno de la revolucia moderna pekinopero
Sagaca Kapto de la Tigra Monto: Jang Zijong venas
profunde en la montaron por viziti malriĉulojn, pridemandi
iliajn suferojn en la pasinteco kaj mobilizi la amasojn por
ekstermi la banditaron de Vulturo.

Giganta Konstruo de la Okcidenta Bordo de Bohaj-maro



La PLA-anoj kaj popolanoj konstruas ŝultro ĉe ŝultro la grandan marbaran digon.





Sub la direktado de la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ en la 7-a de majo, kun la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema strebo al prospero, pli ol 10,000 heroaj PLA-anoj kaj popolanoj de Hingĉeng-gubernio, Liaŭning-provinco, komencis konstruon por bari maron okcidente de Bohaj-mar, en vintro de 1966. Sub la granda subteno de la laborista klaso kaj kun la revolucia spirito timi nek malfacilojn nek morton, ili konkeris sennombrajn malfacilojn sinapogante sur saĝo kaj mirinda energio de la kolektivo, venke finis la tutan konstruon en la lasta jaro. Kaj tiel ili konstruis grandan marbaran digon longan je 4.5 km. kaj per tio kreis 36,000 muojn da kampoj.

(Supre) Komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de PLA konstruas la kunligiĝontan parton de la granda digo.

(Maldekstre sube) Komandantoj kaj batalantoj de iu trupo, kiuj surportas la taskon ĵeti ŝtonojn de sur flasantaj glacioj, studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* antaŭ plenumo de la tasko.

(Dekstre sube) La granda marbara digo konstruita baras la furiozan maron kaj kulturebligis pli ol 30,000 muojn da kampoj.







**Granda Epopeo de Popola Milito
Bela Himno pri Revoluciaj Herooj**